

Esperanto

V-4853-1452

JARLIBRO

1939

Internacia
Esperanto-Ligo

JARLIBRO

de la Internacia
Esperanto-Ligo

1939

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne povas esti represata, ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de I.E.L.

Copyright by Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

NUR POR UZO DE MEMBROJ

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

ENHAVO

PRINTED IN ENGLAND



U-18679

d/84

	Paĝo
Antaŭparolo. La Prezidanto	5
Adresaro, Notoj pri la	171
Centra Oficejo	10
Ĉefdelegitoj	173
Delegitoj, laŭlanda resumo	292
Delegitoj kaj Grupoj	175
Dumviva Membraro	14
Entreprenej, Listo de	301
Fakaj Organizaĵoj	100
Fakaj Organizaĵoj Kunlaborantaj	90
Fakdelegitoj, Listo de la	294
Fakvortaroj: N-ro 1. Fervoja (konstrufako)	104
Gazetaro Esperantista	120
Honora Membraro	13
Informpeto, Regularo de	172
I.E.L., Statistikoj 1938	26
Komitato kaj Estraro	8
Kongresoj Esperantistaj, 1939	47
Kongresoj Universalaj	44
Konkurso Internacia	28
Kontoj de I.E.L., 1938	23
Kontoj de la 30a Universala Kongreso (Londono).. .. .	45
Korespond-anoncetoj	156
Landaj Asocioj	48
Landaj Raportoj	52
Lernejo, Esperanto en la	134
Librolisto	159
Lingva Komitato kaj Akademio	32

Membro-statistiko 1938.. .. .	20
Membro-subtenantoj 1938	17
Mortintoj, Niaj	38
Patronoj 1938	16
Perantoj	174
Radio, Esperanto kaj	149
Radio-stacioj, kiuj dissendas en Esperanto	154
Reklamoj, Listo de	302

LASTMOMENTA INFORMO.

Preskaŭ la tuta enhavo de la Jarlibro estis kompostita kiam okazis la politikaj ŝanĝoj en Eŭropo meze de Marto. Pro tio la informoj pri la antaŭa Ĉeĥo-Slovakujo plejparte ne plu validas.

Tio estas nova tute ne-atendita bato por nia movado kaj nia Ligo. Ĝi signifas la perdon de ankoraŭ 500 membroj, kaj povas grave endanĝerigi niajn financojn, malgraŭ la gravaj reduktaj jam faritaj pri la elspezoj. Ni do petas al ĉiu membro, ke li aŭ ŝi faru sian eblon varbi novan membron por la Ligo. Per pli forta laboro en la ankoraŭ libera landoj, ni devas provi kompensi la perdojn en tiuj partoj de Eŭropo portempe perditaj al la movado.

ANTAŬPAROLO

Jen la tria jarlibro de Internacia Esperanto-Ligo, la tria jaro de nia agado.

Certe tiu ĉi jaro estis tre malfacila por la esperanto-movado. Pro politikaj cirkonstancoj ni suferis gravajn batojn. Kiam, en la Londona Kongreso, ni priploris niajn aŭstrajn samideanojn, ni ne povis diveni ke, kelkajn semajnojn poste, ni perdos parton de niaj membroj en Ĉeĥo-Slovakujo. Ili estu certaj, ke ni konservos ilian memoron. Kaj, por "venĝi" ilin, ĉiu el ni promesu klopodi por plenigi la vakantajn lokojn, por igi la esperanto-movadon pli kaj pli potenca, ĝis la momento, kiam ĉiuj ŝtatoj—eĉ tiuj, kiuj ne konsentas pri nia idealo—devos konfesi ke eĉ sur la praktika kampo Esperanto valoras por ĉiuj. Tiam ni retrovos niajn fratojn forrabitajn, kaj ricevos la rekompencan de niaj penadoj.

Ĉu la Ligo prosperis tiun ĉi jaron ?

Post la politikaj okazintaĵoj, kiujn mi ĵus aludis, mi verŝajne devus respondi : Ne !

Fine de 1937, I.E.L. estis enskribinta 256 membrojn en Aŭstrujo, kaj 1,008 en Ĉeĥo-Slovakujo. Fine de 1938, restas nur 42 kaj 530. Entute, en tiuj du landoj ni perdis 692 membrojn, nome 631 asociajn kaj 61 individuajn.

Kaj tamen, malgraŭ tiuj perdoj, malgraŭ la timo pro milito, kiu tre malfavoris al varbado, nia membraro perdis nur 447 membrojn. Ni do progresis en la landoj, kie nia movado estas libera.

Sed la plej kuraĝiga konstato estas la plimultiĝo de niaj individuaj membroj : ili estis 2,697 fine de 1937, kaj 3,057 fine de 1938. Sen la politikaj malhelpaĵoj ni povas esti certaj, ke ilia nombro atingus 3,500.

Tio ne estas nur supozajo. En januaro 1938 I.E.L. enskribis 800 asociajn kaj 989 individuajn membrojn ; en januaro 1939 ĝi enskribis 1,165 asociajn kaj 1,343 individuajn membrojn ; el tiuj ĉi lastaj pli ol 400 estas novaj, el ĉiuj landoj.

Bedaŭrinde, nia financa situacio ankoraŭ ne estas kontentiga. En 1938 ni havas ankoraŭ deficiton, kiu certe ne estas okazinta, se la politika situacio estus normala. Mi montris ĉi supre, ke sen tiu krizo niaj kotizenspezoj estus multe pli altaj ; plie, la kongreso en Londono estus havinta pli multajn vizitantojn, k.t.p. . . .

Ĉar la eksteraj cirkonstancoj ne dependas de ni, ni devas submetiĝi. Tial, dum la Londona Kongreso, la Komitato decidis diversajn ŝparojn, kies efiko jam ekmontriĝis. Unu el la plej drastaj estis malmultigo de niaj oficistoj ĝis du personoj ! Mi dankas tie ĉi S-ron Goldsmith, kiu mem proponis labori sola kun nur unu helpantino, ĝis la kresko de nia Ligo devigos nin denove dungi aliajn helpantojn.

Dank'al tiuj rimedoj kaj al la tre kuraĝigaj konstatoj ĉi supraj, ni rajtas esperi ke, se la rilatoj inter ŝtatoj fariĝos normalaj en 1939, se ne okazos konstantaj minacoj pri milito, la ekvilibro de nia budĝeto kaj la prospero de nia Ligo estas certaj.

Unu el la ĉefaj celoj de nia Ligo estas kunagado de esperantistaj organizaĵoj.

En 1938 ni komencis efektivigi interkonsentojn kun jenaj fakaj asocioj :

- Skolta Esperantista Ligo.
- Kvakera Esperantista Societo.
- Denaska Esperantistaro.
- Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (T.E.K.A.)
- Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (T.A.G.E.).

Aliaj estas pristudataj, kaj verŝajne estos aprobitaj en 1939.

Tiamaniere nia Ligo pli kaj pli fariĝas la centro de la tutmonda neŭtrala movado, kaj efektivigas tiun unuiĝon postulitan de multaj samideanoj dum multaj jaroj.

Sed komence ni devis doni al la Landaj Asocioj fortan centron provizitan per la necesaj organoj ; nun ni devas altiri al nia centro la fakajn asociojn, por pravigi nian devizon : “ Unueco estas forto ! ”

Por atingi tiun celon, kelkjara persistado kaj pacienco estis necesaj. Sed de nun la tereno estas firma, kaj la konstruaĵo ekstariga. Dum la venontaj jaroj ĝi ankoraŭ kreskos kaj plifortiĝos.

Tiun ĉi jaron la internacia konkurso havis sukceson. La premion gajnis Svislando, kiu kvinobligis siajn poentojn en 1938. Mi tre sincere gratulas al niaj svisaj samideanoj, kiuj en tiu ĉi momento preparas kun granda zorgo la Bernan kongreson. La plej bela danko de la esperantistoj estos, ke tre multaj el ili vizitu la kongreson kaj tiun ĉarmoplenan landon.

Mi devas ankaŭ gratuli al niaj bulgaraj samideanoj, kiuj atingis preskaŭ la saman proporcion, kiel la svisaj.

La Londona Kongreso havis pli grandan sukceson, ol oni povis atendi pro la eksteraj cirkonstancoj. Sed la sukceso de kongreso ne dependas nur de la nombro de la vizitantoj. La Londona Kongreso meritis la titolon “ La Harmonia Kongreso.” Kia bela titolo ! De nun la esperantistoj komprenas, ke ili povas vivi en plena harmonio ; ke internaj disputoj estas vanaj, eĉ malutilaj kaj danĝeroplenaj ; ke ili devas batali nur kontraŭ la eksterajn malfacilaĵojn, kiuj baras la vojon. Kiel fortaj ni estos, kiam ĉiuj laboros kune, koro ĉe koro !

L. BASTIEN.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Fondita : 18 Septembro 1936.

Prezidanto :

Intendant-Generalo L. Bastien, Paris.

Komitato :

P. W. Baas, C. Krusemanstr. 43, Amsterdam-Z., Nederlando.

Intendant-Generalo L. Bastien, 116, rue de Vaugirard, Paris VI., Francujo.

P. Blaise, 19 Litchfield Avenue, Morden (Surrey), Anglujo.

Kapitano R. Bugge-Paulsen, Dunkersgt. 3-II, Oslo, Norvegujo.

Univ. Prof. D-ro Odo Bujwid, Lubicz 34, Kraków, Polujo.

Univ. Prof. D-ro med., D-ro jur. Giorgio Canuto, Istituto di Medicina Legale, Ospedale Maggiore, Parma, Italujo.

D-ro J. Couteaux, Faubourg St. Jacques 27, Paris XIV., Francujo.

Einar Dahl, Box 900, Uddevalla, Svedujo.

Delfi Dalmau, Valencia 245, Barcelona, Hispanujo.

D-ro Carlos Domingues, Rua Carioca 41-1, Rio de Janeiro.

René Dubois, 130 Rue Amelot, Paris XI., Francujo.

W. Grolleman, Burgemeester Keestrasingel, 10, Culemborg, Nederlando.

K. Th. Hansen, Oresunds Apotek, Strandvej, Köbenhavn, Danujo.

F. Heikenwälder, Vrchlického str. 18, Prostejov, Ĉeĥo-Slovakujo.

H. W. Hetzel, 119 S. 37th Street, Philadelphia, Pa., Usono.

Rektoro Sam Jansson, Bergsvägen 41, Lidingö, Svedujo.

D-ro Paul Kempeneers, 19, Avenue Montjoie, Uccle 3, Belgujo.

D-ro Ivo Lapenna, Deželićeva 44/II, Zagreb, Jugoslavujo.

Bernard E. Long, p.a. Brita Esp. Asocio, 142 High Holborn, London, W.C.1., Anglujo.

E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm 1., Svedujo.

Prof. St. Minkov, ul. Sredna Gora 129, Sofia, Bulgarujo.

A. C. Oliver, 28 Clarence Road, London, N.22., Anglujo.

P. Petit, 59 rue de Neuilly, Rosny-sous-Bois (Seine), Francujo.

M. Rollet de l'Isle, 35 rue du Sommerard, Paris V., Francujo.

Seitaro Ŝindo, 1301 Usogaŭa, Sumijoŝi apud Kobe, Japanujo.

Estraro

Prezidanto : Intendant-Generalo L. Bastien, Paris.

Vic-prezidanto : E. Malmgren, Stockholm.

Membroj : D-ro P. Kempeneers, Uccle.

D-ro I. Lapenna, Zagreb.

A. C. Oliver, London.

CENTRA OFICEJO DE I.E.L.

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Telefono : Chorley Wood 138

Ĝenerala Sekretario : Cecil C. Goldsmith.

Oficistinoj :

F-inoj E. C. Goldsmith, Renée Rivollet.

Banko :

Barclay's Bank Ltd., Rickmansworth.

Oficialaj Organoj :

Semajna : Heroldo de Esperanto.


Monata : Esperanto Internacia.

Redaktoro :

Teo Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Filia Oficejo—Propaganda fako
Tegelbacken, Stockholm, Svedujo.

KIEL ATINGI LA CENTRAN OFICEJON DE INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.



EDINBURGO

HISTORIA — ROMANTIKA — PENTRINDA



Abundas je lokoj pitoreskaj kaj historie interesaj. Provizas por la libertempulo senliman variecon de plezuro.

Oportuna centro por viziti famajn Skotajn pejzaĝojn

Bonega servado vagonare kaj aŭtomobile al ĉiu parto: ĉiutagaj ekskursoj dum la somero al "La Trossachs," "Melrose," la "Scott" Kamparo kaj la skotaj lagoj

Vastaj oportunoj por la Golf-ludo, la Teniso kaj aliaj sportoj

Por plena informo kaj oficiala gvidilo oni sin turnu al

**THE TOWN CLERK,
CITY CHAMBERS, EDINBURGH**

Honora Membraro de I.E.L.

Membroj Honoraj estas distingitaj de la Komitato per tiu titolo, pro gravaj servoj faritaj al I.E.L. aŭ al la Esperantomovado. Ili ne pagas kotizon.

Baghy, S-ro Julio, Budapest (Hungarujo)
Baudet, S-ro André, Paris (Francujo)
Blaise, S-ro Paul, Morden (Britujo)
Bosque, S-ro Antonio Carbonell y, Alcira (Hispanujo)
Bouvier, S-ro Louis, Le Havre (Francujo)
Briggs, S-ro Charles H., Minneapolis (Usono)
Bujwid, S-ro Prof. Odo, Kraków (Polujo)
Currie, S-ro Walter B., Romiley (Britujo)
Deligny, S-ro Ernest, St. Omer (Francujo)
Gasse, S-ro Emile, Le Havre (Francujo)
Hetzl, Prof. H. W., Philadelphia (Usono)
Hirst, S-ro William H., Huddersfield (Britujo)
Humez, S-ro Alberic, Douai (Francujo)
Jayet, S-ro Charles, Morges (Svisujo)
Kalocsay, S-ro D-ro Kolomano de, Budapest (Hungarujo)
Kudela, S-ro Antonín, Olomouc (Ĉeĥo-Slovakujo)
Kunerth, S-ro Stefan, Merano (Italujo)
La Colla, S-ro Stefano, Roma (Italujo)
Landenne, S-ro Armand, Huy (Belgujo)
Martin, S-ro Auguste, Mâcon (Francujo)
Noll, F-ino Margrethe, København (Danujo)
Nylén, S-ro Paul, Stockholm (Svedujo)
Page, S-ro William M., Edinburgh (Britujo)
Parrish, S-ro Donald E., Los Angeles (Usono)
Pitlik, D-ro Augustin, Praha (Ĉeĥo-Slovakujo)
Ploussu, S-ro Augustin, Grenoble (Francujo)
Rollet de l'Isle, S-ro M., Paris (Francujo)
Soubranne, S-ro François, Tulle (Francujo)
Stamatiadis, S-ro D-ro Anakreon, Athenai (Grekujo)
Steiner, S-ro Hofrat Hugo, Wien (Germanujo)

Dumviva Membraro de I.E.I.

Aae, S-ro, København (Danujo)
Bastien, S-ro Intendant-Generalo L., Paris (Francujo)
Bayes, S-ro W., Hove (Britujo)
Beaumont, S-ro B. F., Oxford (Britujo)
Boyer, S-ro André, Cannes (Francujo)
Buchanan, S-ro George D., Glasgow (Britujo)
Bünemann, S-ino Elisabeth, Hamburg (Germanujo)
Bünemann, S-ro Oscar, Hamburg (Germanujo)
Bušujev, S-ro J. A., Moskvo (Sovet-Unio)
Camuffo, S-ro Prof. Armando, Trieste (Italujo)
Cather, S-ro C. M., Port Said (Egiptujo)
Champy, F-no Agnès, Anvers (Belgujo)
Clough, S-ro John S., Folkestone (Britujo)
van Coeverden, S-ro E. C. C., Diepenveen (Nederlando)
Cottrell, S-ro F. G., Washington (Usono)
Crowley, S-ro D-ro R. H., Tewin (Britujo)
Daglio, S-ro Clemente, Tortona (Italujo)
Dalmau, S-ro J. Delfi, Barcelona (Hispanujo)
Delanoue, S-ro G., Le Vesinet (Francujo)
Dietl, S-ro D-ro Wilhelm E., Baden bei Wien (Germanujo)
Dinslage, S-ro J. F., London (Britujo)
van Doorne, S-ro C., Rotterdam (Nederlando)
Dust, S-ro L. E., Wellington (Nov-Zelando)
Dziedzic, S-ro D-ro Ignacy, Toruń (Polujo)
Fairman, S-ro C. A., Epsom (Britujo)
Fasce, S-ro Ettore, Genova (Italujo)
Fréchet, S-ro Maurice, Paris (Francujo)
Gila, S-ro Carlo, Locarno (Svisujo)
Gillett, S-ino M. C., Banbury (Britujo)
Ginsburg, S-ro Jules, Antwerpen (Belgujo)
Goemans, S-ro Henk, Istanbul (Turkujo)
Hammer, S-ro H., Zürich (Svisujo)
Harris, S-ro W. H., Lampeter (Britujo)
Henry, S-ino J. B., Hawthorn (Aŭstralio)
Hetzl, Prof. H. W., Philadelphia (Usono)

Hinde, F-ino M., Glenelg (Aŭstralio)
Hindmarsh, S-ro Hugh K., Kinangop (Kenja Kolonio)
Hirzel, S-ro Fritz, Schaffhausen (Svisujo)
Huttin, S-ro Henry, Bourg en Bresse (Francujo)
Huysman, S-ro J. J. W., Etterbeek (Belgujo)
Johnson, S-ro E. B., London (Britujo)
Juneby, S-ro E., Jönköping (Svedujo)
King, S-ro W. H., Masterton (Nov-Zelando)
Lechmere-Oertel, S-ro F. O., London (Britujo)
Lhermitte, S-ro Jules, Paris (Francujo)
Lukáš, S-ro Miloš, Hradec Králové (Ĉeĥo-Slovakujo)
Marseille, S-ro Charles, Paris (Francujo)
Megahy, S-ro B. P., Preston (Britujo)
Meihuizen, S-ro D-ro P. W., Arnhem (Nederlando)
Moutinho, S-ro Aurelio C. L., Meda (Portugalujo)
Norvega Esperantista-Ligo, Oslo (Norvegujo)
Nowell, S-ro Hugh N., Sandwich (Britujo)
Parrish, S-ro Donald E., Los Angeles (Usono)
Peter, S-ro Heinrich, Wien (Germanujo)
Phillips, S-ro E. G., London (Britujo)
Pointer, S-ino Mary, St. Neots (Britujo)
Popper, S-ro Hugo, Praha (Ĉeĥo-Slovakujo)
Potts, S-ro B., Wellington (Nov-Zelando)
Pratley, S-ro P. L., Westmount (Kanado)
Raven-Hart, S-ro R., La Ciotat (Francujo)
Rolle de l'Isle, S-ro M., Paris (Francujo)
Roscoe, S-ro Norman K., South Croydon (Britujo)
Sing, S-ino Pauline, Kreuzlingen (Svisujo)
Spindler, S-ro Frédéric, Touques (Francujo)
Stojan, S-ro P., Blausasc-Escarène (Francujo)
Stromboli, S-ro D-ro A., Firenze (Italujo)
Szulz, S-ro S., Bydgoszcz (Polujo)
Taylor, S-ro Charles, Haverford (Usono)
Vaughan, S-ro R. F., Sandakan (Nord-Borneo)
Vörös, S-ro D-ro Cyrill, Sátoraljaujhely (Hungarujo)
Williams, S-ro D-ro Frederick J., Port Moresby (Papuo)

I.E.L. PATRONARO—1938

1. S-ro W. E. Clayton, London, Anglujo.
2. S-ro T. J. Gueritte, London, Anglujo.
3. F-ino E. A. Sidebottom, London, Anglujo.
4. S-ro A. Engelmann, Rosny-sous-Bois, Francujo.
5. S-ino M. C. Gillett, Banbury, Anglujo.
6. F-ino I. C. Fortey, Croydon, Anglujo.
7. D-ro R. H. Crowley, Tewin, Anglujo
8. S-ino H. V. Cooper, Bromley, Anglujo.
9. S-ro Noel Wooding, Leicester, Anglujo.
10. S-ro J. R. Grocott, Blackburn, Anglujo.
11. F-ino H. M. Wolff, Bussum, Nederlando.

I.E.L. Membro-Subtenantoj, 1938

1. Hugo Popper, Praha, Ĉeĥo-Slovakujo.
2. T. L. C. Bluett, Worthing, Anglujo.
3. D-ro C. B. Fawcett, London, Anglujo.
4. J. C. Bley, Chicago, Usono.
5. W. Harvey, Edinburgh, Skotlando.
6. F-ino H. Monod, Morges, Svisujo.
7. J. Holland, Leighton Buzzard, Anglujo.
8. H. Davies, Manchester, Anglujo.
9. F. W. Shaw, Whitworth, Anglujo.
10. J. Rambousek, České Budejovice, Ĉeĥo-Slovakujo.
11. F-ino A. Christensen, Ambur, Hindujo.
12. L. A. Churchill, Derby, Anglujo.
13. F-ino A. B. Edwards, Bishop Auckland, Anglujo.
14. D. Christie, Aberdeen, Skotlando.
15. W. T. Gayfer, Cleethorpes, Anglujo.
16. D-ro S. Kamaryt, Bratislava, Ĉeĥo-Slovakujo.
17. J. Ravestein, Den Haag, Nederlando.
18. S-ino J. M. Ravestein, Den Haag, Nederlando.
19. J. v. d. Steur, Voorburg, Nederlando.
20. J. H. Roosdorp, Bussum, Nederlando.
21. P. H. Mooij, Den Haag, Nederlando.
22. P. Lebrun, Kreuzlingen, Svislando.
23. L. E. Tregubenko, Leningrad, Sovetunio.
24. W. Davies, Swansea, Anglujo.
25. D. Ponti, Nederlando.
26. C. H. Toms, London, Anglujo.
27. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Anglujo.
28. C. A. Baker, Bath, Anglujo.
29. J. De Maeyer, Nivelles, Belgujo.
30. S. C. Eby, New York, Usono.
31. W. W. Carpenter, Escondido, Usono.
32. S-ino M. Klimaševska, Taurage, Litovujo.
33. R. Milenkovic, Knjazevac, Jugoslavujo.
34. J. Kozlevčar, Ljubljana, Jugoslavujo.
35. G. L. Preeedy, Caversham, Anglujo.
36. W. Bailey, Penrhyn Bay, Kimrujo.
37. W. Norris-Jones, Dartmouth, Anglujo.
38. F. Archer, Hobart, Aŭstralio.
39. J. W. Hartley, Burnley, Anglujo.
40. Gen. G. Kyffin-Taylor, Birkenhead, Anglujo.
41. G. Bevan, Wrexham, Anglujo.
42. H. W. Smith, Watford, Anglujo.
43. C. Barnes, Colchester, Anglujo.
44. P. Th. Justesen, Fannerup, Danujo.

45. G. Gordon, Christchurch, Nov-Zelando.
46. F-ino S. W. Bloemendal, Lochem, Nederlando.
47. F-ino B. Bowier, Den Haag, Nederlando.
48. S-ino M. E. Körndöffer, Den Haag, Nederlando.
49. S-ino M. O'Brien Harris, London, Anglujo.
50. F. E. Wadham, Epsom, Anglujo.
51. M. Pearson, Sheffield, Anglujo.
52. F-ino E. M. Bartholomew, Letchworth, Anglujo.
53. D-ro G. T. Knol, Coevordon, Nederlando.
54. W. Baaten, Utrecht, Nederlando.
55. T. L. C. Enderby, Wellington, Aŭstralio.
56. E. Dodge, Washington, Usono.
57. D-ro J. Gian-Franceschi, Buffalo, Usono.
58. F. Weeke, Den Haag, Nederlando.
59. S-ino B. Blankensteijn, Vianen, Nederlando.
60. T. Postma, Rotterdam, Nederlando.
61. G. A. Connor, New York, Usono.
62. O. M. Wihl, Colwyn Bay, Kimrujo.
63. C. B. Morgan, Brightlingsea, Anglujo.
64. A. Clavenna, Genova-Sampier-Darena, Italujo.
65. A. Martin, Macon, Francujo.
66. N. Wooding, Leicester, Anglujo.
67. J. Couteaux, Paris, Francujo.
68. S-ino M. C. Gillett, Banbury, Anglujo.
69. F. G. Cesarini, Potenza, Italujo.
70. G. Waringhien, Lille, Francujo.
71. F. Zacché, Montava, Italujo.
72. A. C. Oliver, London, Anglujo.
73. C. M. Houghton, Welwyn, Anglujo.
74. N. C. Smith, Oxford, Anglujo.
75. F. H. Lockyer, Liverpool, Anglujo.
76. A. McDonald, London, Anglujo.
77. F-ino E. Squire, W. Hartlepool, Anglujo.
78. K. T. Hansen, Gentofte, Danujo.
79. D-ro S. Kozuchowski, Warszawa, Polujo.
80. M. Fejde, Nässjö, Svedujo.
81. J. A. Forsell, White Bear Lake, Usono.
82. D-rino E. Evans, Bangor, Kimrujo.
83. G. W. Roome, Sheffield, Anglujo.
84. D-ro E. Backheuser, Rio-de-Janeiro, Brazilo.
85. H. Boffejon, Antwerpen, Belgujo.
86. E. Jacques, La Louvière, Belgujo.
87. L. Magotteaux, Liège, Belgujo.
88. K. Gorter, Cheribon, Nederlandindio.
89. P. Petit, Rosny-sous-Bois, Francujo.
90. C. Tiard, Paris, Francujo.
91. S-ino F. Staes-Van de Voorde, Bruxelles, Belgujo.
92. J. Snykers, Oostende, Belgujo.
93. A. Couto Fernandes, Rio-de-Janeiro, Brazilo.
94. I. Gomes Braga, Rio-de-Janeiro, Brazilo.
95. D-ro A. Rudy, Washington, Usono.
96. C. F. Hayes, London, Anglujo.
97. P. Möller, Köbenhavn, Danujo.
98. D-ro P. Dolák, Spišské Vlachy, Ĉeĥo-Slovakujo.
99. D. Andreev, Assenovgrad, Bulgarujo.
100. W. M. P. J. Holzhaus, Amsterdam, Nederlando.
101. F-ino A. L. Borel, London, Anglujo.
102. J. Delor, Tlemcen, Alĝerio.
103. I. H. Wright, Birmingham, Anglujo.
104. S-ino F. Feaver, London, Anglujo.
105. F-ino J. B. Hopps, San Francisco, Usono.
106. R. Robertson, London, Anglujo.
107. A. de Vries, Soest, Nederlando.
108. Pastro E. N. Thomas, Stafford, Anglujo.
109. G. H. Parker, London, Anglujo.
110. C. A. A. Haccou, Djokjakarta, Nederlandindio.
111. J. R. Miller, Stone, Anglujo.
112. C. M. Hamaker, Hilversum, Nederlando.
113. S-ino C. M. H. Hamaker van Haeften, Hilversum, Nederlando.
114. A. S. Mellichamp, Peoria, Usono.
115. H. G. Schatz, Brooklyn, Usono.
116. F. de Maria, Iberlucea, Argentino.
117. R. Groverman, Gentbrugge, Belgujo.
118. F-ino I. C. Fortey, Croydon, Anglujo.
119. A. Cotton, Sèvres, Francujo.
120. F. L. Wharff, Los Angeles, Usono.
121. F-ino A. Waite, Birmingham, Anglujo.
122. J. J. Boutwood, Hastings, Anglujo.
123. E. Archdeacon, St. Cloud, Francujo.
124. O. Walder, Bern, Svisujo.
125. A. Miropolsky, Buenos Aires, Argentino.
126. J. Martin, Buenos Aires, Argentino.
127. S-ino P. Dr. Korabova, Ruse, Bulgarujo.
128. R. Rayner, Cambridge, Anglujo.
129. F-ino L. Sandberg, Bekkelaget, Norvegujo.
130. Seitaro Ŝindo, Osaka, Japanujo.
131. J. L. Mackenzie, Newport, Anglujo.
132. Arnfinn Jensson, Stabekk, Norvegujo.



MEMBROJ DE I.E.L. JE LA 31a DE DECEMBRO 1938

	AM	MJ	MA	MAH	MS	Pat.	DM	HM	Sumo	Ent.
Acoroj	—	1	—	1	—	—	—	—	2	—
Argentino	—	10	19	2	3	—	—	—	34	—
Aŭstralo	—	8	32	7	3	—	1	—	51	—
Aŭstrujo	—	17	19	3	—	—	2	1	42	—
Belgujo	330	42	88	16	7	—	3	1	487	3
Borneo	—	—	—	—	—	—	1	—	1	—
Brazilo	73	23	16	3	3	—	—	—	118	—
Britujo	1222	303	185	51	51	9	17	4	1842	13
Bulgarujo	—	31	17	8	2	—	—	—	58	—
Ĉeĥo-Slovakujo ..	344	78	82	18	4	—	2	2	530	1
Ĉinujo	—	—	2	1	—	—	—	—	3	—
Danujo	300	23	47	9	3	—	1	1	384	—
Egiptujo	—	2	1	—	—	—	1	—	4	—
Estonujo	—	3	1	—	—	—	—	—	4	—
Finnlando	—	4	1	6	—	—	—	—	11	—
Francujo	2458	273	125	15	8	1	11	9	2900	4
Germanujo	—	1	4	—	—	—	2	—	7	—
Gibraltaro	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Grekujo	—	—	—	—	—	—	—	1	1	—
Havajo	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Hindoĉinujo	—	3	1	—	—	—	—	—	4	—
Hindujo	—	—	—	—	1	—	—	—	1	—
Hispanujo	325	4	54	—	—	—	2	1	386	—
Hongkongo	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Hungarujo	—	22	26	12	—	—	1	2	63	6
Irlando	—	4	—	—	—	—	—	—	4	—
Islando	—	—	2	1	—	—	—	—	3	—
Italujo	230	12	13	8	3	—	4	2	272	—
Japanujo	200	12	17	6	1	—	—	—	236	—
Jugoslavujo	170	36	17	12	2	—	—	—	237	—

Kanado	—	5	3	2	—	—	1	—	11	—
Kenjo	—	—	1	—	—	—	1	—	2	—
Kolombio	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Kongo	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Latvujo	—	8	4	3	—	—	—	—	15	—
Litovujo	—	2	12	2	1	—	—	—	17	—
Luksemburgo	—	1	1	—	—	—	—	—	2	—
Madagaskaro	—	1	1	—	—	—	—	—	2	—
Madeiro	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Maroko	—	1	2	3	—	—	—	—	6	—
Meksiko	—	—	2	—	—	—	—	—	2	—
Monako	—	3	—	—	—	—	—	—	3	—
Nederlandindio ..	—	2	4	1	2	—	—	—	9	—
Nederlandujo ..	1200	123	70	34	18	1	3	—	1449	1
Norvegujo	620	46	12	5	2	—	1	—	686	—
Nov-Zelando	142	39	8	1	1	—	3	—	194	—
Palestino	—	9	1	—	—	—	—	—	10	—
Papuo	—	—	—	—	—	—	2	—	2	—
Polujo	151	33	22	11	1	—	2	1	221	—
Portugalujo	—	4	22	3	—	—	1	—	30	—
Rodezio	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Rumanujo	—	4	1	1	—	—	—	—	6	—
Siamo	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Sovet-Unio	—	—	—	—	1	—	1	—	2	—
Sud-Afriko	—	3	2	1	—	—	—	—	6	—
Svedujo	1879	103	53	23	1	—	1	1	2061	—
Svislando	200	41	14	9	2	—	4	1	271	1
Trinidado	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Turkujo	—	5	—	1	—	—	1	—	7	—
Urugvajo	—	—	5	1	—	—	—	—	6	—
Usono	139	88	61	19	12	—	4	3	326	—

61 landoj	9983	1433	1076	302	132	11	73	30	13040	29
-----------	------	------	------	-----	-----	----	----	----	-------	----

LA PRESISTOJ

de la I.E.L. Jarlibro volonte
citos prezojn kaj prizorgos
la presadon de ĉia eldonaĵo
por Esperantistaj Asocioj,
ekzemple:

LETERPAPERO	BROŝUROJ
MEMBRO-FORMULOJ	LIBROJ
GAZETOJ	BULTENOJ

LEICESTER CO-OPERATIVE PRINTING SOCIETY LTD.

CHURCH GATE, LEICESTER

Tel. 58204 (du linioj)

ANGLUJO

LA KONTOJ DE I.E.L. 1938

La kontoj por la lasta jaro troviĝas sur la sekvantaj paĝoj, kaj ni konsilas al niaj membroj, ke leginte ilin, ili relegu la vortojn de nia Prezidanto en la *Antaŭparolo*.

Ĉiu komprenos, ke la streĉa internacia situacio dum granda parto de la jaro povis nur malhelpi al internacia organizaĵo kia nia. Feliĉe, en la momento kiam ni pretigas la Jarlibron, la horizonto ŝajnas esti iomete pli hela, kaj, se ĝi tiel daŭros, ni rajtas esperi, ke la nuna jaro alportos al ni la firman bazon sen kio ni ne povas kontentige labori. Almenaŭ ĝi bone komenciĝis, kiel montras la jenaj ciferoj pri la kotizoj pagitaj ĝis Februaro 28a.

	28 Feb., 1937	28 Feb., 1938	28 Feb., 1939
Asociaj Membroj ..	1200	1843	2256
MJ	389	510	648
MA	505	580	640
MAH	194	227	311
MS	100	102	59*
Patronoj	8	4	13
Dumvivaj Membroj ..	75	72	71
Honoraj Membroj ..	31	29	30
	<hr/>	<hr/>	<hr/>
	2502	3367	4028

*En 1939 MS ne ricevas premion.

Se niaj membroj helpus instigi siajn Esperantistajn amikojn aliĝi al I.E.L. kiel individuaj membroj, plej kredeble ni ne nur evitus deficiton en la nuna jaro, sed eĉ povus fari ioman gajnon por parte forigi la antaŭajn deficitajn. Ni faris nian eblon, reduktante la elspezajn ĝis minimumo, kaj ni esperas, ke vi helpos pligrandigi la enspezojn.

Kuponlibretoj. En la lasta aŭtuno ni dissendis al preskaŭ ĉiu individua membro kuponlibreton, kies celo estis helpi en la ordigo de la kaso de I.E.L. kaj la forigo de la hipoteko je ĝia domo. Ĝis la fino de Februaro 1938 ni ricevis la pagon por 348 kuponlibretoj, kaj ni nun publike dankas al tiuj bonvolaj membroj pro ilia subteno. Ni ankaŭ uzas la okazon memorigi la aliajn membrojn pri tiuj libretoj, ĉar eble multaj el ili intencis fari la samon, sed tute forgesis pri la afero. Komprenoble, ni bone scias, ke ne ĉiu kapablas tiel helpi, kaj tiuj ne ĝenu sin pri la kuponoj. C.C.G.

LA KONTOJ DE I.E.L. SPEZOJ 1938

(En Svisaj frankoj laŭ kurzo 20 = £1)

	£.	s.	p.	sv. fr.		£.	s.	p.	sv. fr.
Salajroj	604	10	0	12090.00	Kotizoj, A.M. ..	221	1	0	4421.00
Rentumo kaj impostoj ..	74	13	3	1493.25	„ M.J. ..	220	10	2	4410.16
Gazeto "Esperanto Internacia" ..	338	1	1	6761.08	„ M.A. ..	401	2	7	8022.61
„ "Heroldo de Esperanto" ..	181	8	6	3628.50	„ M.A.H. ..	245	1	4	4901.33
Afranko	54	13	8	1093.70	„ M.S. ..	141	16	3	2836.25
Presajoj kaj Materialo ..	113	19	7	2279.60	„ Patronoj ..	46	9	2	929.16
Premioj	55	14	6	1114.50	Entreprenejoj ..	11	2	8	222.66
Oficejaj elspezoj	79	2	9	1582.75	Abonoj "Esperanto Internacia" ..	10	5	10	205.83
Lingva Komitato, Subvencio al ..	25	0	0	500.00	Donacoj	15	4	2	304.16
Vojaĝ-elspezoj	41	1	5	821.41	Kongresa Licencpago ..	235	16	6	4716.50
Dom-elspezoj	35	16	1	716.08	Libroservo	32	12	8	652.66
Jarlibro kaj suplemento ..	333	16	1	6676.08	Jarlibro-reklamoj ..	20	11	2	411.16
Propagando (Radio-servo, Konkursoj, k.t.p.) ..	29	1	6	581.50	Diversaj enspezoj ..	10	17	2	217.16
Stokholma oficejo	33	13	11	673.90	Deficito—al konto "Perdogajno" ..	410	0	7	8200.61
Diversaj elspezoj	21	18	11	438.90					
	2022	11	3	40451.25		2022	11	3	40451.25

BILANCO DE 31 DECEMBRO, 1938

(En Svisaj frankoj laŭ kurzo 20 = £1)

	£.	s.	p.	sv. fr.		£.	s.	p.	sv. fr.
Kreditoroj: Liverantoj ..	390	8	7	7808.60	Mono: en Barclay's Bank ..	13	1	8	261.66
„ Konthavantoj ..	911	9	6	18229.50	„ en la oficejo ..	2	9	0	49.00
Kotizoj antaŭpagitaj ..	248	6	4	4966.33	Domo en Heronsgate, Rickmansworth ..	1750	0	0	35000.00
Memoriga Kaso "Margareta Saxl"	34	19	5	699.40	Suldantoj diversaj ..	173	4	7	3464.60
Hipoteko	1040	0	0	20800.00	Meblaro	232	12	6	4652.50
Kapitalo	1103	11	10	22071.83	Libro-provizo	56	9	2	1129.15
					Konto "Perdogajno" je ..				
					31.12.1937 ..	1111	14	10	
					aldonu defici- ..				
					ton 1938 ..	410	0	7	
						1521	15	5	
					minus kupon- ..				
					libretoj ..	20	16	8	
						1500	18	9	30018.75
	3728	15	8	74575.66		3728	15	8	74575.66

Mi kontrolis la suprajn bilancojn, datumitajn 31-an Decembron, 1938. Mi havigis ĉiujn informojn kaj klarigojn, kiujn mi postulis. Mia opinio je la bilancoj estas tiel aranĝitaj, ke ili ĝuste montras la staton de la aferoj de la Ligo, laŭ mia plej bona informo kaj laŭ la klarigoj al mi donitaj kaj kiel montritaj en la kontlibroj de la Ligo. 2-an de Januaro, 1939. (Subskribis) H. MILSOM, F.C.I.S., A.T.I.I.

INTERESAJ CIFEROJ PRI I.E.L.

Post la fino de sia dua jaro I.E.L. konsistis el :

19	Landoj Asocioj
6	Fakaj Asocioj
13,040	Membroj (dividitaj laŭ la tabelo sur paĝo 20.)
23	Ĉefdelegitoj
12	Perantoj
976	Delegitoj
147	Vicdelegitoj
336	Fakdelegitoj

Dum 1938 la Delegitoj, VD, kaj FD faris 2,714 servojn al la membroj de I.E.L., nome : 590 komercajn servojn, 885 turismajn, 313 fakajn kaj 926 ĝeneralajn.

Dum 1938 la Centra Oficejo ricevis kaj sendis la jenan nombron da korespondaĵoj, (ne inkluzive da la gazeĵoj) :

	Ricevitaj :	Senditaj :	Sumo :
Januaro ..	980	2270	3250
Februaro ..	740	925	1665
Marto ..	858	2397	3255
Aprilo ..	705	1251	1956
Majo ..	805	2247	3052
Junio ..	808	2204	3012
Julio ..	1101	1085	2186
Aŭgusto ..	494	772	1266
Septembro	488	1095	1583
Oktobro ..	488	3299	3787
Novembro ..	591	1131	1722
Decembro ..	733	1977	2710

Do, entute dum la jaro : 8791 20653 29444

Por perfekte koni Esperanton kaj tiel fariĝi perfekta Esperantisto estas necese nepre studi la . . .

VERKOJN de D-ro L. L. ZAMENHOF

originalajn aŭ tradukojn eldonitajn de la "Esperantista Centra Librejo" de Parizo, kiuj estas la ĉefa kaj ĉiama Fundamento por la lingva unueco de la lingvo.

	§.	p.
Fundamento de Esperanto (eldono Franca-Angla-Germana-Rusa-Pola), kartonbindita	1	3
Fundamenta Krestomatio , entenanta : Ekzercoj, Fabeloj kaj legendoj, Rakontoj el la vivo kaj sciencoj, Artikoloj pri Esperanto, Poezioj	2	6
Lingvaj Respondoj (Plena Kolekto)	1	0
Proverbaro Esperanta , tradukita el la Verko "Frazeologio rusa-pola-franca germana" de lia patro M. F. Zamenhof	1	0
Fabeloj de Andersen (Plena Kolekto) la 3 unuaj libroj po	1	3
George Dandin , komedio en tri aktoj de Molière	0	6
Hamleto , tragedio en kvin aktoj, Shakespeare	1	0
Ifigenio en Taŭrido , drama en kvin aktoj de Goethe	1	3
	sur peza papero	1
	sur malpeza	0
La Rabeno de Baŝaraŝ , de H. Heine, kaj La Gimnazio , de Salom Aleĵhem	0	9
La Rabistoj , dramo en kvin aktoj de Schiller, sur peza papero	1	9
	sur malpeza	1
La Revizoro , komedio de N. V. Gogol, sur peza papero	1	6
	sur malpeza	1
Marta , romano de Eliza Orzesko	2	3

★

aĉeteblaj ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

(Aldonu 10% por sendkostoj.)

INTERNACIA KONKURSO, 1938

Kiel en 1937, tiel ankaŭ en 1938 Internacia Esperanto-Ligo aranĝis la t.n. "Internacian Konkurson," kies premio konsistas en kontanto de £ 10 (200 sv. frankoj) por la gajninta asocio kaj libro por ĉiu delegito en la koncerna lando. Pasintan fojon la feliĉa gajninto estis la Norvega Esperantista Ligo, kiu sukcesis, en 1937 plibonigi sian staton je 660%, kompare kun 1935. La nova konkurso (por 1938) havis kiel bazon la staton de 1937.

Estas speciale ĝojige ke la premion de ĉi tiu nova konkurso sukcesis akiri por si la Svisa Esperanto-Societo, kiu atingis preskaŭ 506% de la baza stato de 1937. Mallonge post ĝi sekvas Bulgarujo kun 490%, kie nia movado en la lasta tempo faris tiel bonan progreson. Kiel tria sekvas Jugoslavujo kun 270%. Atentinde estas ke ankaŭ Norvegujo ankoraŭ je 34% plibonigis sian staton de 1937! Entute ni vidas ke, kvankam la tutnombro de la membroj restis iom malantaŭ la nombro de 1937 (13.040 anstataŭ 13,487), la situacio de I.E.L. ĝenerale plibonigis en la pasinta jaro (1938) kompare kun la antaŭpasinta (1937), ĉar konsiderinde pligrandigis la nombro de la kategorioj MJ, MA kaj MAH.

Tamen la stato ankoraŭ ne estas kontentiga. Ĉu en 1939 ne estos eble, atingi minimume 15.000 membrojn de I.E.L. entute, kaj inter ili minimume 5.000 individuaj membroj?

Ni plej kore gratulas la Svisan Esperanto-Societon pro ĝia bona laboro, kaj ankaŭ ĉiujn ceterajn asociojn, kiuj atingis minimume 100% de sia antaŭa stato. Kaj ni ajn plej bonajn dezirojn al ĉiuj por la sekvanta konkurso.

Jen la finaj ciferoj pri la Internacia Konkurso 1938:

		POENTOJ.		
		1937	1938	%
1.	Svislando	137	693	505.8
2.	Bulgarujo	92	451	490.2
3.	Jugoslavujo	257	694	270.0
4.	Polujo	318	683	214.7
5.	Latvujo	55	116	210.9
6.	Nov-Zelando	265	444	167.5
7.	Finnlando	61	102	167.2
8.	Norvegujo	792	1060	133.8
9.	Litovujo	135	169	125.2
10.	Nederlando	2837	3253	114.6
11.	Aŭstralio	429	489	114.0
12.	Kanado	74	79	106.7

13.	Svedujo	3024	3215	106.3
14.	Usono	1513	1597	105.5
15.	Belgujo	1722	1762	102.3
16.	Britujo	6483	6604	101.8
17.	Sud-Ameriko	851	864	101.5
18.	Portugalujo	317	303	95.6
19.	Francujo	5907	5539	93.8
20.	Danujo	1118	1038	92.8
21.	Hungarujo	619	574	92.7
22.	Italujo	636	561	88.2
23.	Rumanujo	50	42	84.0
24.	Ĉeĥo-Slovakujo	2449	1840	75.1
25.	Afriko	137	99	72.3
26.	Azio	1321	793	60.0

INTERNACIA KONKURSO, 1939

Jen la reguloj por la nova Konkurso:

1. Por ĉiu membro, aliĝinta al I.E.L., estas donitaj (resp. donotaj) poentoj laŭ jena tabelo:

Asocia Membro	1
Membro kun Jarlibro	5
Membro-Abonanto	10
Membro-Abonanto-Heroldo	12
Membro-Subtenanto	15
Dumviva Membro (nova)	50
Patrono	50
Entrepreno	10
Vendo de kuponlibreto	5

2. La elirbazo estas la stato je la fino de 1938, laŭ jena tabelo:

Argentino	309
Aŭstralio	489
Belgujo	1747
Brazilo	429
Britujo	6594
Bulgarujo	451
Ĉeĥo-Slovakujo	930
Danujo	1038
Finnlando	250
Francujo (inkluzive de Alĝerio, Hindoĉinuoj kaj Madagaskaro)	5503
Grekujo	250
Hispanujo	885
Hungarujo	574

Italujo	561
Japanujo	517
Jugoslavujo	694
Nederlando	3253
Norvegujo	1060
Nov-Zelando	444
Polujo	683
Portugalujo (inkluzive de Acoroj, Madeiro kaj Port. Hindujo)	303
Svedujo	3215
Svislando	693
Usono	1597

Oni notu, ke nun partoprenas nur landoj kun minimuma elirbazo de 250 poentoj. Aliaj landoj povas partopreni, kondiĉe ke ili akceptu tiun minimumon.

3. Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando aŭ regiono, kiu montras la plej bonan progreson dum la jaro, kompare kun la supraj ciferoj, I.E.L. donos premion de £10 (200 svisaj frankoj) kaj artan diplomon. Plue, al ĉiu Delegito en la koncerna regiono ni sendos libro-premion.

**La plej malkara,
La plej akurata,
La plej bona,**

LA presejo

estas

Belga

Esperanto-Instituto

Koopera Societo

Lange Leemstraat 127
ANTVERPENO

Poŝtkonto : 1689.58
Telefono : 941.34

★

Southend-on-Sea

**LEIGH, CHALKWELL, WESTCLIFF,
THORPE BAY kaj SHOEBOURNE,
ESSEX, ANGLUJO**

POR SANIĜO, ENLOĜO AŬ LIBERTEMPO.

★

Fama pro siaj arbokovritaj krutaĵoj, herbobedoj, floroj, publikaj ĝardenoj, vigliga aero, sanigaj kaj fortikigaj klimato kaj ĉirkauaĵo.

La urbo posedas sepmejlajn promenejojn, 16 publikajn parkojn kaj plezur-ĝardenojn, urban golfejon, multajn banejojn, inkluzive je granda subĉiela naĝejo kun varmiga, puriga kaj filtra aparatoj, kaj sunbana teraso, du aliajn naĝejojn, kaj varmajn kaj malvarmajn marakvajn kaj ozonajn joditajn banojn.

Plej longa Marponto en la Brita Imperio (unu kaj triono mejlojn) ; kun sun-ripozejoj, promenejoj kaj ferdekoj. Pavilono, kun koncertoj kaj dancado ĉiutage. Du koncert-artistaroj, porinfanaj lagetoj kun rimedoj por remado kaj vadado. Kurŝal kun granda muzejo, kinejo kaj balĉambro (ĉiaj trinkaĵoj haveblaj).

★

Skribu al

**CORPORATION INQUIRY BUREAU
Pier Hill (84), Southend-on-Sea, Anglujo**

por bela ilustrita Gvidlibro, sendota senpage.

ESPERANTISTA LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO

Adreso: Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando.

Prezidanto:

Inĝ. J. R. G. Isbrücker, Hago, Nederlando.

Membroj de la Lingva Komitato:

Alberich, Jofrè S., Rambla del Prat, 1, 3-er, Barcelona, Hispanujo.
Andrejev, A. P. ?
Archdeacon, Ernest, surŝipe de "Jaĥto Esperanto," Quai Carnot, St. Cloud, Seine-et-Oise, Francujo.
Backheuser, Prof. D-ro E., Caixa postal 2494, Rio de Janeiro, Brazilo.
Baghy, Julio, Rottenbiller ut. 66, I, 20, Budapest VII., Hungarujo.
Bailey, Th. G., Laganville, 236 Nether Street, London, N.3, Anglujo.
Bailey, W., Mara Domo, Glan-y-Mor Road, Penrhyn Bay, Caernarvonshire, Kimrujo.
Baird, F-ino Jane, 95 Bellevue Road, Edinburgh, Skotlando.
Bastien, Louis, 116 Rue de Vaugirard, Paris VI., Francujo.
Belmont, Leon, Marszalkowska 97a, Warszawa, Polujo.
Bianchini, P. J., Cimpello de Pordenone, Friuli, Italujo.
Blicher, M., Hjørtøgade 1. 2. Köbenhavn 5, Danujo.
Blok, H., Amstellaan 55, Amsterdam, Nederlando.
Bobin, M., 80 Rue de la Tour, Paris XVIe, Francujo.
Bodó, K., Szabolcska Mihály ucca 18, fsz. 2, Budapest I., Hungarujo.
Bofill, M., Granada, N., 31 Decembre N-ro 46, 3izq., Palma de Mallorca, Hispanujo.
Boucon, H., 10 Boulevard du Lycée, Annecy, Haute-Savoie, Francujo.

Bremón y Masgrau, D-ro J., Balmes 102, Barcelona, Hispanujo.
Bugge Paulsen, R. E., Schives gt. 4-I, Oslo, Norvegujo.
Bulthuis, H. J. Kamillestraat 37, Hago, Nederlando.
Butler, Montagu C., 36 Penrhyn Road, Kingston-on-Thames, Surrey, Anglujo.
Chavet, Gabriel, Rue Gauthier de Chatillon 6, Lille, Francujo.
Cogen, Léon, 52 Drève, Ninove, Belgujo.
Couteaux, D-ro J., Hôpital Cochin, 27 Fbg. St. Jacques, Paris XIV., Francujo.
Cseh, Andreo, Riouwstraat 172, Hago, Nederlando.
Czubrynski, D-ro A., Wesola 32, Wtochy pod Warszawa, Polujo.
Dalmau, Delfi, 245 Valencia, Barcelona, Hispanujo.
Deligny, Ernest, 4 Rue Allent, St. Omer, Pas de Calais, Francujo.
Demidjuk, G., Degtjarnij per. 5, kv. 6, Moskva 6, U.S.S.R.
Diez, F., Zurbaran, 9, Begona, Bilbao, Hispanujo.
Domingues, D-ro C., Praça da República 54, I, Rio de Janeiro, Brazilo.
Dreher, L., Starowislna 37, Kraków, Polujo.
Dresen, F-ino Helmi, Postkast 6, Tallinn, Estonujo.
Drezen, Ernesto, Skatertni 3, kv. 5, Moskva 69, U.S.S.R.
Ellersiek, F., Wilmsstr. 5, Berlin, S.W.61, Germanujo.
Esselin, A., 161 Rue de Charonne, Paris XI., Francujo.
Fischer, Henriko, str. D. Istrate, 10, Bucuresti, Rumanujo.
Ghezso, D-ro A., Via Montecucco 6, Trieste, Italujo.
Grau Casas, Jaume, Aigüesbones, Hispanujo.
Grenkamp-Kornfeld, S., 117 Bd. Jourdan, Paris XIV., Francujo.
Harvey, W., 1 Craighill Gardens, Edinburgh, Skotlando.
Heilker, P., Hoofddorp, Nederlando.
Hodakowski, T., Legjonów 17, Nowy Sacz 2, Polujo.
Hohlov, N., Marjino 22, Moskva 75, U.S.S.R.
Hromada, Rudolf, Socharská 333, Praha VII., Ĉeĥo-Slovakujo.

Inglada, V., Prof., Escuela superior de Guerra, Chinchilla,
2, Madrid, Hispanujo.
Isbrücker, Ing. J. R. G., Oostduinlaan 32, Hago, Neder-
lando.
Jansson, Sam. Sjn, Skogen 23, Lidingö I., Svedujo.
Jung, Teo, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Neder-
lando.
Ĵirkov, L., Trubnikovski per. 26, Lĝ. 8, Moskva 69,
U.S.S.R.
Kalocsay, D-ro K., Mária u. 34, III, 4, Budapest VIII.,
Hungarujo.
Kamaryt, Prof. D-ro Stan., Zochova 3, Bratislava, Ĉeĥo-
Slovakujo.
Karolczyk, S., Marszalkowska 60/31, Warszawa, Polujo.
Kawasaki, Naokazu, 1617 Sumiyosityo, Sumiyosi-ku, Osaka,
Japanujo.
Kenn, Won, Prof. D-ro, P.O. Box 88, Canton, Ĉinujo.
Kengnott, Prof. A., University of Texas, Austin, Texas,
Usono.
Kostecki, J., Miedzylesie k/Otwocka, Dom J. Fluksa,
Polujo.
Krestanoff, Ivan, ul. 6 Septemvri 2, Sofia, Bulgarujo.
Kühl, E., Secretario de la Legación Checoslovaca, Santi-
ago de Chile, Ĉilo.
La Colla, Stefano, Corso Rinascimento 19, Roma, Italujo.
Laignier, M., 22 Rue Courmeaux, Reims, Marne, Franc-
ujo.
Lajarte, R. de, 4 Villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois,
Seine, Francujo.
Lejzerowicz, J., Kilinskiego 30, Łódź, Polujo.
Lippmann, D-ro W., Leibnizstrasse 13, II, Leipzig,
Germanujo.
Lundgren, John, Hedemora, Svedujo.
Miihalski, Eűg. ?
Minor, Charles, 62 Cranwich Road, Stamford Hill, London,
N.16, Anglujo.

Mučnik, I., Kfar Jehoĥuo, apud Haifa, Palestino.
Neergaard, Paul, Gothersgade 158, Köbenhavn, Danujo.
Nekrasov, N., ul. Gorjkogo 113, kv. 1, Moskva 47, U.S.S.R.
Nišimura, K. ?
Nylén, P., Gröna Villan, Huddinge, Stockholm, Svedujo.
Okamoto, Jošicugu, 29 Yushima, 6, chome Hongooku,
Tokio, Japanujo.
Pitlik, D-ro Augustin, Kremencova 17, Praha II., Ĉeĥo-
Slovakujo.
Porto Carreiro Neto, D-ro L. da Costa, Rua 24-de-Maio,
424, Rio de Janiero, Brazilo.
Privat, D-ro Edmond, Villa Bellavista, Locarno, Svisujo.
Rakuša, Prof. R., Ciril-Methodova 18, Maribor, Jugo-
slavujo.
Reed, S-ino Ivy Kellerman, 1707 Surrey Lane, Washing-
ton, D.C., Usono.
Rollet de l'Isle, M., 35 Rue du Sommerard, Paris V.,
Francujo.
Rotkviĉ, Ivo, Basariĉka st. 12, Zagreb, Jugoslavujo.
Rousseau, C., 2 Rue A. de Vigny, Bécon-les-Bruyères,
Seine, Francujo.
Rublov, S., Per. Nekrasova 7, Odessa, U.S.S.R.
Saldanha Carreira, J. A. de, Av. Duque de Loulé 50, III,
Lisboa, Portugalujo.
Scherer, Joseph R., 212, So. Grand Ave., Los Angeles,
Calif., Usono.
Schmid, Jakob, Müsliweg 2, Elfenau, Bern, Svisujo.
Schoor, Jan van. ?
Setälä, Vilho, Museokatu 40 A, Helsinko, Finnlando.
Sevak, G., poŝkesto, 78, Erivan, Armenujo, U.S.S.R.
Shafer, F-ino Ad., 45 Courthorpe Rd., Hampstead, London,
N.W.3, Anglujo.
Stamatiadis, D-ro Anakreón, Str. Rodou 21, Athenai,
Grekujo.
Stojan, Petro, Blausasc-Escarène, Alpes-Maritimes, Franc-
ujo.
Stroele, Georges, Maujobia 7, Neuchâtel, Svisujo.
Szilágyi, D-ro F., Box 698 (Eldona Societo-Esperanto),
Stockholm I, Svedujo.

Šupichová, F-ino J., Mala Štepanka 6, Praha II., Ĉeĥo-Slovakujo.
Tschernochvostoff, G., Idrottsgatan 22, A. 10, Helsinki, Finnlando.
Uitterdijk, D., "Domo Zamenhof," Hyacintenlaan 1, Hilversum, Nederlando.
Wadham, F. E., "Holmbury," Woodcote Hurst, Epsom, Surrey, Anglujo.
Waringhien, Prof. G., 47 Rue de Douai, Lille, Francujo.
Wenger, J., Crêt Taconnet 28, Neuchâtel, Svisujo.
Wiesenfeld, E., Solna 1, Warszawa, Polujo.
Zamenhof, F-ino Lidja, Krolewska 41, Warszawa, Polujo.
Zon, Frato Wigbertus van, "Huize Steenwijk," Vught, N. Br., Nederlando.

ANGLO-FRENCH & SPANISH COMMERCIAL UNION LTD.

80 Bishopsgate, LONDON, E.C.2.

Deziras rilatiĝi kun seriozaj Firmoj en la tuta Mondo por Reprezentado en Britujo, eksportado de Britaj Produktoj kaj gravaj aferoj ĝenerale.

Ĉefaj Specialaĵoj :

**METALOJ, MINERALOJ, KARBOJ,
ĈIUSPECAJ KRUDAJ MATERIALOJ,
MAKLERADO,
VENDO KAJ AĈETO DE ŜIPOJ.**

Korespondado en Esperanto ; ankaŭ angle,
hispane, france, k.t.p.

Telegrafadreso : "Anglotrad-London."
Telefono : NATIONAL 7588.

Akademio

Adreso : Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando.

Prezidanto:

Inĝ. J. R. G. Isbrücker, Hago.

Vic-Prezidantoj:

J. Baghy, J. Grau Casas.

Direktoroj:

Sekcio: Komuna Vortaro : W. Bailey.

Gramatiko : A. Cseh (provizore).

Tekn. Vortaroj : L. Helleboid, 10 Rue Carnot,
Viroflay (S.-et-O.), Francujo.

Kontrolo : M. Rollet de l'Isle.

Membroj:

L. Bastien, L. Belmont, Prof. V. Inglada, D-ro W. Lippmann, Ch. Minor, P. Nylén, J. Schmid, V. Setälä, D-ro A. Stamatiadis, Prof. G. Waringhien.

Korespondantoj:

F-ino L. Zamenhof (pola lingvo), E. Drezen (rusa lingvo),
Prof. D-ro E. Backheuser (portugala lingvo).

(Vidu la personajn adresojn en la laŭ-alfabeta listo de la L.K.-anoj)

NIAJ MORTINTOJ

Kun granda bedaŭro ni devas raporti la forpason de la jenaj samideanoj:

Ballinger, G., samideano el la frua periodo de Esperanto, kiu ĉiam fervore subtenis la movadon, mortis la 16.12.1938, post mallonga malsano, 75-jara, en Cheltenham, Anglujo.

Barnes, Charles, delegito de I.E.L. en Colchester, Anglujo, mortis la 15-an de februaro, 69-jara. Malgraŭ sia malsano dum la lastaj jaroj, tiu ĉi samideano daŭrigis ĉiam entuziasme labori por nia movado.

Bartholomew, F-ino E. M., forpasis la 18.3.1938 en Letchworth, Anglujo. Kun sia fratino Frances, kiu mortis antaŭ unu jaro, tiu ĉi samideano dum jaroj fervore subtenis nian movadon. Ŝi estis Dumviva Membro, kaj Patrono de I.E.L.

Boutwood, John Josiah, mortis en Hastings, Anglujo, post longa malsano, la 22.10.1938. Li estis 77-jara. S-ro Boutwood multe laboris por nia movado dum longa tempo. Li estis Patrono kaj Delegito de I.E.L., Vicprezidanto de la Brita Esperantista Asocio, kaj estis ĉiam unu el la plej fervoraj subtenantoj de la movado en Britujo. Li ĉeestis multajn internaciajn kongresojn kaj havis grandan aron da amikoj en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo.

Briggs, Tom Gordon, mortis la 13.6.1938 en Nottingham, Anglujo, 46-jara. Esperantisto de 1905, li multe laboris por la loka grupo, la federacio kaj la nacia kaj internacia movadoj. Li estis vicdelegito de I.E.L., kaj lia tuta familio estas entuziasmaj esperantistoj.

Carpenter, W. W., delegito de I.E.L. en Escondido (Cal.), Usono, mortis la 17.12.1937. Li estis maljunulo kaj pioniro de la Esperanto-movado en Usono.

Christie, David, I.E.L.-delegito en Aberdeen, Skotlando, mortis la 31.5.1938 en sia 71-a jaro. Dum multaj jaroj li estis fervora laboranto por la Esperanto-movado en Aberdeen.

Cvetlerová, S-ino M., membro de Esperantista Klubo "D-ro Schulhof" en Pardubice, Ĉeĥoslovakujo, forpasis.

Dambrauskas, Prof. Prelato A. (Dombrovski) en Kaunas (Litovujo) mortis la 19.2.1938, 77-jara. Esperantisto de 1887, li fariĝis pioniro de la mondlingva movado de Litovujo, eksprezidanto kaj honora prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, membro de la Lingva Komitato, kaj poeto. Ekzilite dum 1889-1895 de la rusa registaro, li verkis en Tilsit (Germanujo) 1890 la unuan Esperanto-lernolibron por litovoj.

Davies, William, mortis pro kormalsano la 29.7.1938 en Swansea, Kimrujo. Ĉiam bona kunlaboranto en Anglujo kaj Kimrujo, li ĉeestis multajn kongresojn kaj estis Membro-Subtenanto de I.E.L.

Dejean, Prof. Pierre, Grenoble, Francujo, mortis subite la 12.1.1938, pro kormalsano. Li naskiĝis la 11.6.1877 en Lussac-les-Chateaux apud Poitiers. Li estis konsiderata kiel unu el la eminentaj fizikistoj en Francujo.

En 1905 Esperanto allogis lin; en ĝi li ne vidis nuran porsciencan facilecon, sed precipe altan idealan celon. Li verkis sciencajn artikolojn en Esperanto, kaj artikolojn pri Esperanto por teknikaj gazetoj. Dum la 1937a konferenco "Esperanto en la moderna vivo" li faris sensancan paroladon (kun filmoj) pri "ultramikroskopo."

Ketelaere-Wouters, S-ino Maria de, edzino de s-ro Morris de Ketelaere, administranto de Belga Esperanto-Instituto en Antwerpen, Belgujo, mortis la 20.3.1938, postlasante kvar infanojn 2-9-jarajn.

Delhez, Iwan, Verviers (Belgujo), mortis la 25.9.1938. Li estis unu el ĝiaj sekretarioj, kiam la grupo en Verviers organizis la Belgan Esperanto-Kongreson en 1925, kaj li gvidis plurajn kursojn. En aĝo de 41 jaroj, li postlasas edzinon kaj tri geknabojn.

Ellersiek, S-ino, edzino de la konata esperantista eks-eldonisto Friedrich Ellersiek en Berlin (Germanujo), mortis la 25.7.1938, post longa malsano.

Fazel, Pastro John H., la veterana fervora esperantisto, ne plu estas inter ni. Li forpasis el nia rondo familia la 25.7.1938, 83-jarulo, en San Antonio (Texas, Usono).

Hamann, Fred A., fervora usona esperantisto, mortis subite la 2.5.1938, pro cerba sangalfluo, en Wauwatosa (Milwaukee), ŝtato Wisconsin. Li naskiĝis en 1878 en Breslau, Germanujo. Li estis faka estro por fremdaj lingvoj en "South Division High School" de Milwaukee. Ekster sia ofico li estis fervora fotografanto; li elpensis stenografian sistemon "Ispo." Esperanton li lernis en 1925, fondis la Esperanto-Klubon de Milwaukee kaj vizitis plurajn universalajn kongresojn.

Horaček, Alois, pensiita direktoro en Kutná Hora, forlasis nin por ĉiam.

Jack, Edward Collins, post mallonga malsano kaj operacio mortis la 2.5.1938 en Wellington (Nova Zelando). Li naskiĝis en Perth (Skotlando) antaŭ 59 jaroj. Li estis kasisto de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio post ties fondiĝo en 1929, prezidanto de Wellingtona Esperanto-Klubo (1930-31).

Jakimĉuk, Hnat, aktiva membro de Ukraina Esperanto-Societo en Lvovo, Polujo, forpasis la 1.6.1938. La mortinto estis fervora esperantisto, kiu ĉiam forte kredis je la venko de Esperanto.

Jakob, Gesinjoroj Friedrich, ambaŭ gepatroj de s-ro Hans Jakob, forpasis mallonge unu post la alia.

Jeresch, S-ano, tre konata al la vizitintoj de la esperantista somerrestadejo, forpasis en Lázně Bělohrad.

Karinthy, Frederiko, fama hungara verkisto kaj poeto, estinta prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo, mortis la 29.8.1938, en Budapeŝto (Hungarujo), 50-jara.

Läufer, Prof. Albert, en Mainz (Germanujo), katolika pastro, fervora samideano mortis la 30.3.1938. Ĝis la lastaj tagoj de sia vivo li vigle interesiĝis pri la Esperanto-movado.

Legerer, Heinrich, dum multaj jaroj fervora laboranto por la Esperanto-grupo en Krems, Aŭstrujo, mortis tie la 2.2.1938, je la aĝo de 65 jaroj.

Moncousin, S-ro Komandanto Fernand, Verviers (Belgujo), mortis la 21.8.1938, nur 46-jara. Altestimata oficiro, li estis ankaŭ klera lingvisto kaj posedis maloftan konon en historiaj kaj artaj kampoj. Esperantisto de pli ol 20 jaroj, li prezidis la LKK-on de la Belga Esperanto-Kongreso en Lieĝo en 1930.

Moss, S-ino George W., la 15.6.1938 forpasis en Annapolis (Maryland, Usono), 86-jara. Multajn jarojn ŝi estis fervora membro de E.A.N.A.

Nešić, Marko, malnova jugoslava pioniro de Esperanto, komponisto kaj gitarkantisto, konata sub la nomo "Ĉika-Marko" (onklo Marko), mortis en Novi Sad, Jugoslavujo.

O'Brien Harris, S-ino M., mortis la 22.4.1938 en sia 72-jaro. Fervora subtenanto de la Esperanto-movado en Britujo, s-ino Harris estis bone konata ankaŭ ekster esperantistaj rondoj kiel Labor-partia membro de la administra aŭtoritato de Londono.

Quirino De Oliveira, C., unu el la plej sindonemaj brazilaj veteranoj de nia movado, mortis la 19.5.1938 en Rio de Janeiro. Li estis kunfondinto de Brazila Ligo Esperantista. Li komponis multajn muzikaĵojn kun teksto en Esperanto, kiuj estis sukcese ludataj dum ĉiuj brazilaj kongresoj de Esperanto kaj ankaŭ en Washington, okaze de la 6-a Universala Kongreso, kiun li ĉeestis.

Rosenberg, Jakob, estona Esperanto-pioniro mortis en la dua kristnaska tago 1937 (26.12), 56-jara. Dum pli ol tridek jaroj li fervore propagandis nian aferon en Estonujo, fondis la unuan grupon en Reval (nun Tallinn) kaj kunfondis tiun en Dorpat (nun Tartu). Li gvidis multajn kursojn, verkis kaj eldonis legolibrojn, vortarojn, ludarojn ktp. Li mortis post operacio je apendicito.

Saxl, Margarete. Matene la 4an de Aŭgusto, 1938, dum la kongreso en Londono, Fino Margarete Saxl subite forlasis la vivon.

Ŝi estis 49-jara, kaj dum la lastaj jaroj tute oferis sian labor-forton por Esperanto. Ŝi gvidis multegajn kursojn en Nederlando, Danujo, kaj aliaj landoj, kaj plej laste en Londono, kie ŝia laboro grave kontribuis al la bona sukceso de la kongreso. Por siaj lernantoj ŝi estis multe pli ol instruistino, ŝi estis amiko. Ŝi mortis sur posteno—inter amikoj.

Nun ŝiaj restaĵoj ripozas en Londona tombejo, kie la Esperantistaro starigas memorŝtonon sur ŝia tombo, kaj ĉiuj ŝiaj amikoj konservas spiritan monumenton pri ŝi en siaj koroj.

Spielmann, D-ro Eduard, Bern (Svislando), subite mortis la 3.6.1938 pro korparalizo. Li estis naskita la 20.6.1870 en Obergösgen. D-ro Spielmann estis esperantisto de 1910 kaj unu el la plej fervoraj samideanoj svisaj; eksprezidanto de la Esperanto-societo Bern, kiel poŝtoficcisto precipe agema ankaŭ en fakaj rondoj (eksprezidanto kaj honora prezidanto de ILEPTO). Li faris multajn propagandoparoladojn, gvidis kursojn, publikigis artikolojn propagandajn kaj defendajn, kaj vizitis multajn universalajn kongresojn.

Stacy, F-ino Alice Maud, el Buckhurst Hill (Anglujo) mortis la 27.8.1938 en sia 53-a jaro. La sekvintan mardon granda amaso da geamikoj funebris ŝin en St. John's Churchyard, apude. F-ino Stacy esperantistiĝis jam en 1907, kiam ŝi aŭskultis la faman prelegon de D-ro Zamenhof en la Londona Guildhall. Du-tri fojojn ŝi kondukis la diservojn en St. Ethelburga's.

Staniŝiĉ, D-ro Paŭlo, advokato en Zemun (Jugoslavujo), mortis 60-jara la 12.9.1938. Malnova esperantisto, kunlaborinto de pluraj gazetoj, adepto de la Gesell'a movado "Liberekonomio," pri kiu li aperigis plurajn verkojn nacilingvaj kaj esperantaj.

Tellini, Prof. D-ro Akilo, en Udine (Italujo), konata samideano, kiu de 1901 dediĉis sin fervore al nia afero, subite mortis la 1.10.1938, sekve de kormalsano.

Ter'Akopov, Georgo, estis konata, amata kaj modesta armena samideano, kiu antaŭ nelonge, post grava operacio, mortis en Praha.

Toop, Peeter, fervora samideano en Rapla, Estonujo, mortis pro pulmmalsano la 27.1.1938, postlasante 24-jaran edzinon, kiu ankaŭ estas samideanino.

Waterman, W. L., mortis la 4.2.1938 en Sud-Aŭstralio je la aĝo de 68 jaroj. Dum multaj jaroj li estis fervora laboranto por nia movado en tiu mondparto.

Watson, Edwin John, sekretario de la Londona Taksista Esperanto-Grupo, subite mortis la 6.6.1938. Lerninte Esperanton dum la mondmilito, li dum multaj jaroj klopodis enkonduki nian lingvon en taksistajn rondojn fine kun bona sukceso.

Witosch, F-ino Zofio, mortis subite la 7.8.1938, en Novy-Bohumín/Oderberg (Ĉeĥoslovakujo). Ŝi esperantiĝis dum la mondmilito, partoprenis kelkajn mondkongresojn, kunlaboris en la movado, kiun ŝi subtenis ne nur morale sed precipe ankaŭ finance.

Zempleni, D-ro Vilmos Gyula, kuracisto en Debrecen, Hungarujo, malnova pioniro de nia movado, mortis 51-jara.

Zivanoviĉ, Stevan, sekretario de la Esperanto-Societo Beograd, Jugoslavujo, mortis la 20.1.1938. Esperantisto de 1919, kunlaborinto de "Esperanto Triumfonta"—"Heroldo de Esperanto" kaj de multaj aliaj gazetoj, premiito ĉe la Floraj Ludoj, verkinto de vortaro esperanta-jugoslava, gvidinto de multaj kursoj, li ĉiam aktive partoprenis la movadon.

La Universalaj Kongresoj

1. 1905. Boulogne-sur-Mer, Francujo. 688 anoj.
2. 1906. Genève, Svisujo. 1,200 anoj.
3. 1907. Cambridge, Anglujo. 1,317 anoj.
4. 1908. Dresden, Germanujo. 1,500 anoj.
5. 1909. Barcelona, Hispanujo. 1,300 anoj.
6. 1910. Washington, Usono. 357 anoj.
7. 1911. Antwerpen, Belgujo. 1,800 anoj.
8. 1912. Kraków, Polujo. 1,000 anoj.
9. 1913. Bern, Svisujo. 1,203 anoj.
10. 1914. Paris, Francujo. Ne okazis pro la milit-deklaro. Aliĝis 3,739 anoj.
11. 1915. San Francisco, Usono. 163 anoj.
12. 1920. Den Haag, Nederlando. 408 anoj.
13. 1921. Praha, Ĉeĥoslovakujo. 2,561 anoj.
14. 1922. Helsinki, Finnlando. 850 anoj.
15. 1923. Nürnberg, Germanujo. 4,963 anoj.
16. 1924. Wien, Aŭstrujo. 3,400 anoj.
17. 1925. Genève, Svisujo. 953 anoj.
18. 1926. Edinburgh, Skotlando. 960 anoj.
19. 1927. Danzig. 905 anoj.
20. 1928. Antwerpen, Belgujo. 1,494 anoj.
21. 1929. Budapest, Hungarujo. 1,200 anoj.
22. 1930. Oxford, Anglujo. 1,211 anoj.
23. 1931. Kraków, Polujo. 900 anoj.
24. 1932. Paris, Francujo. 1,650 anoj.
25. 1933. Köln, Germanujo. 950 anoj.
26. 1934. Stockholm, Svedujo. 2,042 anoj.
27. 1935. Roma, Italujo. 1,442 anoj.
28. 1936. Wien, Aŭstrujo. 854 anoj.
29. 1937. Warszawa, Polujo. 1,120 anoj.
30. 1938. London, Anglujo. 1,602 anoj.
31. 1939. Bern, Svisujo.

30a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, LONDONO 1938

BILANCO

Enspezoj	£	ŝ.	p.
Kongreskotizoj	1443	9	3
Donacoj	24	19	8
Poŝtkartoj kaj Glumarkoj ..	25	0	10
Loĝejoj	1034	6	8
Ekskursoj	947	14	0
Diversaĵoj	43	12	10
	3519	3	3

Elspezoj	£	ŝ.	p.
Licencpago	288	14	0
Kongresejoj	146	19	6
Poŝtkartoj kaj Glumarkoj ..	20	5	1
Loĝejoj	1035	14	5
Ekskursoj	941	13	6
Presaĵoj	69	7	3
Kongreslibroj	88	1	8
Insignoj	79	9	8
“ Brita Esperantisto ”	119	16	9
Teatraĵo	182	1	9
Balo, koncertoj	206	17	9
Reklamado kaj dekoracioj ..	45	8	4
Afranko kaj salajroj	133	18	11
Ĉe kursoj	90	3	5
Diversaĵoj	70	11	3
	3519	3	3

“ Mi kontrolis la supran bilancon de la Londona (1938) Kongreso, kaj mi havigis ĉiujn informojn kaj klarigojn, kiujn mi postulis. Mia opinio, la supra bilanco ĝuste montras la spezojn de la Kongreso.”

♣ La 10an de Decembro, 1938.

(Subskribita) H MILSON, F.C.I.S., A.T.I.I.

BERN

La mezepoka ĉefurbo de Svislando

estas ĉi-jare la celo de ni Esperantistoj. Inter la muroj de tiu urbo, kiu estas unu el la plej belaj en Eŭropo, okazos ja la 31a Universala Kongreso de Esperanto de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto. Tiu nia kongreso promesas fariĝi eksterordinara okazantaĵo; la berna kongresa komitato klopodas jam de post monatoj brile sukcesigi ĝin. Vi certe konas Svislandon: ĉiam ankoraŭ ĝi estas la rifuĝejo de la demokrataj liberecoj, de la altaj homarpensoj, lando de la paco, do kiel farita kunveno por ni Esperantistoj, kiuj plej sopiras vivi en paco kaj kiuj klopodas interamikigi ĉiujn popolojn kaj naciojn.

Bern ne nur estas la spirita kaj politika centro de la libera Svislando, sed ankaŭ urbo kun fiera historio, naskita el kuraĝo kaj oferemo de sia enloĝantaro kaj el amo al la riverĉirkaŭfluata patruja tero; amo, kiu dotis la urbon per aro da plej belaj konstru-monumentoj; amo kiu ankaŭ sukcesis gardi la mezepokajn trajtojn de la urbo en malofta pureco, dum pli ol 700-jara pasinteco.

Plie la kongresurbo ne nur estas ĉarma vidindaĵo, sed ankaŭ restadejo de distingita gajeco, ekskurscentro de malofta riĉeco rilate al diverseco, dank' al la mirinda monto-mondo de la berna Oberland, dank' al multaj lagoj, dank' al la Jurao kaj al la abundo de kamparaj belecoj.

Venu ĉiuj al Bern, karaj geamikoj. La 31a kongreso estos travivaĵo de malofta aparteco, ĝi restos neforgesebla al vi. Ni ne nur povas konkeri novan fundon por nia movado, sed ankaŭ travivian feston de la amikeco en belega kadro, en aero de libereco kaj frateco inter la homoj. La kongresa komitato kore bonvenigas vin.

★

Kongres-aligiloj haveblaj ĉe
**31a UNIVERSALA KONGRESO DE
 ESPERANTO, Bern, Svislando.**

aŭ
**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO,
 Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.**

ESPERANTO-KONGRESOJ

DUM 1939

30-a Universala Kongreso de Esperanto	Bern	.. 29 Julio — 5 Aŭg.
Belga Ligo Esperantista	Leuven (Louvain)	Pentekosto.
Brita Esperantista Asocio	Weston-super-Mare	Pentekosto.
Bulgara Esperantista Asocio	Pleven	.. 16 Julio (?)
Centra Dana Esperantista Ligo	.. Vejle	.. Pentekosto.
Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko	.. New York	.. (?)
Federacio de Laboristaj Esperantistoj	.. Arnhem	.. Pasko.
Flandra Ligo Esperantista	Antwerpen	.. Pentekosto.
Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista	.. Antwerpen	.. 5-11 Aŭgusto.
Itala Esp. Fed.	.. Torino	.. 9-11 Sept.
Japana Esperanto-Instituto	Osaka	.. 29-30 Aprilo.
Jugoslavia Esperanto-Ligo	Karlovac	.. Pentekosto.
Litova Esperanto-Asocio	.. Kaunas	.. 17-19 Junio
Nederlanda Esperanto-Asocio "L.E.E.N."	.. Rotterdam	.. Pasko.
Norvega Esperantista Ligo	Sauda	.. Pentekosto.
Sennacieca Asocio Tutmonda	.. København	.. 5-10 Aŭgusto.
Societo Franca por la Propagando de Esperanto	.. Châlons-sur-Marne	.. Pentekosto.
Sveda Esp. Fed.	.. Skövde	.. Pentekosto.

Esperantistaj Landaj Asocioj

1. Aliĝintaj al I.E.L.

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA, Lange
Leemstraat 127, Antwerpen.
Organo : Belga Esperantisto.

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, Praça da Repub-
lica 54, Rio de Janeiro.
Organo : O Brasil Esperantista.

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 142 High Holborn,
London, W.C.1.
Organo : The British Esperantist.

ESPERANTO-ASOCIO EN ĈEĤO-SLOVAKA RES-
PUBLIKO, Truhlářská 16, Praha II.
Organo : Ligilo.

CENTRA DANA ESPERANTISTA LIGO, Fannerup
pr. Kolind.
Organo : Dansk Esp.-Blad.

SOCIETO FRANCA POR LA PROPAGANDO DE
ESPERANTO, 34 Rue de Chabrol, Paris X.
Organo : Franca Esperantisto.

HELENA ESPERANTO-ASOCIO, Odos Rodou 21,
Athenai 8.
Organo : Helena Esperantisto.

HUNGARA ESPERANTO-FEDERACIO, Bejczy u. 1,
Sashalom.
Organo : Hungara Heroldo.

ITALA ESPERANTO-FEDERACIO, Galleria Vittorio
Emanuele 92, Milano.
Organo : L'Esperanto.

JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO, Hongoo-Moto-
mači, Tokio.
Organo : Revuo Orienta.

JUGOSLAVIA ESPERANTO-LIGO, Primorska ul. 2
priz lijevo dvor zgrada, Zagreb.
Organo : Suda Stelo.

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, Valen-
cia 245, Barcelona.
Organo : Kataluna Esp.

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO "LA
ESTONTO ESTAS NIA," Pythagorasstraat 122,
Amsterdam-O.

Organo : Nederlanda Esperantisto.

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO, Boks 942, Oslo.
Organo : Norvega Esperantisto.

NOVZELANDA ESPERANTO-ASOCIO, 12 Lonsdale
Crescent, Kilbirnie, Wellington E.3.

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO, Lubicz
34, Kraków.
Organo : Pola Esperantisto.

SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO, Tegelbacken,
Stockholm 1.
Organo : Sveda E.-Gazeto.

SVISA ESPERANTO-SOCIETO, S-ino L. Perrenoud,
Institut Menager, Neuchâtel-Monruz.
Organo : Svisa Espero.

ESPERANTO-ASOCIO DE NORD-AMERIKO
(E.A.N.A.), 1410 "H" St., N.W., Washington, D.C.
Organo : Amerika Esperantisto.

2. Ne-aliĝintaj al I.E.L.

ARGENTINA ESPERANTO-ASOCIO, Misiones 369,
Buenos-Aires.
Organo : Argentina Esperantisto.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, Str. Alabin
50, Sofia.
Organo : Bulgara Esperantisto.

ESPERANTO-ASOCIO DE ESTONIO, Postkast 6,
Tallinn.
Organo : Informoj de E.A.E.

ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO, S-ro Hugo
Salokannel, Uusikaupunki.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA, Magdalenastraat
29, Kortrijk.
Organo : Flandra Esperantisto.

HISPANA ESPERANTO-ASOCIO, Apartado de Cor-
reos 1089, Madrid.
Organo : Hispana Esp.-Gazeto.

IRLANDA ESPERANTO-ASOCIO, 39, Westmoreland Street, Dublin.

Organo: Irlando Esperantisto.

KANADA ESPERANTISTA ASOCIO, G.P.O. Box 272, Toronto.

Organo: Kanada Bulteno.

LATVA ESPERANTO-SOCIETO, P.K. 844, Riga.

LITOVA ESPERANTO-ASOCIO, Žemaičiu 15, Kaunas.

Organo: Litova Stelo.

RUMANA ESPERANTISTA SOCIETO, Calea Victoriei 31, Bucuresti 1.

SE VI VOLAS ESTI PLENE INFORMATA

pri la Esperanto-Movado,

legu ĉiusemajne

“HEROLDO DE ESPERANTO”

aŭ ĉiumonate

“ESPERANTO INTERNACIA”

La oficialaj organoj de I.E.L.

Specimenoj sendataj kontraŭ peto.

DIDAKTA

Ilustrita Lernolibro de Esperanto

por praktika komenca kurso, de

DELFI DALMAŬ, L.K.



La vortoj kaj la temoj de la ekzercaro estas elektitaj por tuja uzeblo. Oni lernas senkonscie la gramatikajn regulojn de Esperanto

Prezo:

UNU ŜILINGO ANGLA

aŭ 4 internaciaj respondkuponoj

Mendu ĉe

Internacia Esperanto-Ligo

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

LANDAJ RAPORTOJ

BELGUJO

La jaro 1938-a estis en Belgujo sufiĉe favora por nia movado.

Landa Societo: Reĝa Belga Ligo Esperantista (Societa sen profita celo, fondita dum 1905-a, Honora Prezidanto: Lia Reĝa Moŝto Leopoldo III-a) daŭrigis sian propagandan laboron tra la tuta lando, senpere kaj ankaŭ pere de siaj lokaj grupoj en ĉiuj gravaj urboj.

ADMINISTRANTOJ: (a) elektitaj de la ĝenerala kunveno 3/4/38: S-roj Faes, Jaumotte kaj Wauters (Antwerpen); F-ino Thooris, S-roj Decoster kaj Poupeye (Brugge); S-roj Kempeneers kaj Swinne (Bruxelles-Brussel); S-ro Vandevelde (Gent); S-ro Tassin (La Louvière); S-ro Cogen (Ninove) kaj Cafonette (Charleroi).

(b) kooptaj: F-ino Jennen kaj S-ro Robert (Bruxelles-Brussel); S-ro Van den Bossche (Antwerpen).

KOMISAROJ: S-roj Roost (Antwerpen), Mathieux (Uccle) kaj Alofs (Woluwe).

DIREKTANTA KOMITATO (Ligestraro) je la 11/12/38:

Prezidanto: D-ro Paul Kempeneers, 19, av. Montjoie, Uccle. (Tel. 44.53.00.)

Vicprezidantino: F-ino Yvonne Thooris, 4, Wijzakstr. Brugge. (Tel. 320.86.)

Vicprezidanto: S-ro Maurice Jaumotte, 44, av. De Bruyn, Wilrijk-Antwerpen. (Tel. 777.58.)

Sekretario: S-ro Charles Poupeye, 42, Elf Juli-str., Brugge.

Kasisto: S-ro André Tassin, 1, rue St. Joseph, La Louvière.

KOTIZOJ: al P.Ĉ.K. 1337.67 de B.L.E., La Louvière: grupmembro ordinara: 20 fr. (kun abono al "Belga Esperantisto"); grupmembro familia: 7 fr.50 (sen abono); membro izola (ne grupita): 35 fr. (kun abono).

El la liga laboro ni citu speciale:

(a) la organizon de rondvojaĝoj: I-e dum februaro 1938-a, de S-ro Baghy, kiu faris plej ŝatatajn prelegojn en Arendonk, Brugge, Gent, Bruxelles-Brussel kaj

Antwerpen; 2-e komence de aŭgusto kaj de septembro 1938-a, de S-ro Ivan Krestanoff, kiu priparoladis en Antwerpen, Bruxelles (Brussel), Brugge, kaj en diversaj aliaj lokoj.

(b) la starigon de novaj regularoj pri la naciaj kongresoj, pri la ekzamenoj kaj pri ties programo (tri gradoj: Lernado, Supera Lernado, Profesora Kapableco).

(c) la regulan eldonon, sub direktado de S-ro M. Jaumotte, de ĝia monata revuo "Belga Esperantisto" kun interesa enhavo. Je la fino de 1938-a tiu revuo eniris sian 25-an jaron de ekzisto.

(d) la organizon de la nacia kongreso (vidu ĉi sube).

XXVII-a Belga Kongreso de Esperanto, estas organizita, en kunlaboro kun la loka sekcio de R.B.L.E., en Charleroi, la 4-an, 5-an kaj 6-an de junio 1938-a (Pentekostaj tagoj). Ĝin ĉeestis 210 gesamideanoj, inter kiuj pli ol dudek eksterlandanoj: Nederlandanoj, Francoj and Britoj. Dum tiu kongreso ankaŭ okazis ĝenerala kunsido de la delegitoj kaj vicdelegitoj de *Internacia Esperanto-Ligo* el la tuta lando. La lasttaga ekskurso kondukis la kongresanaron al Chimay kaj al ĝia pentrida ĉirkaŭaĵo.

Radiofonio:—Laŭ iniciato de S-ro Advokato Robert, administranto de R.B.L.E., klopodoj estis farataj por organizi esperantajn elsendojn ĉe la naciaj radiostacioj I.N.R.—N.I.R. Efektivigo estas jam certigita en al fako de la porlernejoj dissendo.

Dank' al la helpo de "Brusela Esperanta Kanthoro," okazis la 15-an de decembro (Zamenhofan Tagon) interesa radio-elsendo el N.I.R. kun belega deklamado kaj ĥorkantado en Esperanto.

Ĉe la regiona stacio "Radio-Wallonia," S-ro Tassin, kasisto de R.B.L.E., daŭrigis senlace siajn dusemajnajn elsendojn kun kurso kaj propagandaj alvokoj.

Gazetara Servo estis reorganizata. Multaj gravaj tagjurnaloj enpresas ofte gravajn artikolojn pri Esperanto, kelkaj havas regulan Esp.-kronikon. *La Patrie* el Brugge (Bruges) enpresis ĉiusemajne lecionojn de plena kurso kaj regulan Esp.-kronikon, ambaŭ prizorgitajn de F-ino Y. Thooris, Vicprezidantino de R.B.L.E.

Lernejoj: S-ro Alofs, komisaro de R.B.L.E. kaj profesoro en la Industria Lernejo de Bruselo, laŭ oficiala permeso uzas Esperanton en sia kurso pri Flandra lingvo, precipe rilate al gramatikaj komparoj.

Belga Esperanto-Instituto (Lange Leemstr. 127, Antwerpen), montris bonan ĉiuf flankan aktivecon. Interalie ĝi eldonis du *Kursojn per Korespondado*, unu en Flandra kaj unu en Franca lingvo. Tiuj eldonaĵoj montriĝas tre gravaj precipe por varbado de izoluloj. Kosto: 10 fr. aŭ kun persona korektado 25 Fr.; specimena ekzemplero de la 1-a leciono: 2 Fr. Pagoj al ĝia P.C.K. No. 1689.58.

C.P.

BRAZILIO

Kvin ĉefaj faktoj montras, ke la jaro 1938 estis vere fruktodona por la brazila esperantistaro. Nome: la rezolucio de la Brazila Konsilistaro de Edukado por la aliĝo de Brazilo al la Lerneja Interŝtata Esperanto-akordo; la rezolucio de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko alpreni Esperanton kiel helplingvon por siaj korespondadoj kaj eldonaĵoj, kiuj bezonas havi larĝan diskonigadon eksterlanden; la eldonado de diversaj lern- kaj legolibroj, kiun faris s-ro Ismael Gomes Braga pere de la grava Brazila Spiritista Asocio, kiu aliĝis al la esperanto-movado, kaj ilia disvendado tra Brazilo; la reapero de la oficiala organo de Brazila Ligo Esperantista, sub la nomo "O Brasil Esperantista," kaj pligrandigo de la nombroj da grupoj esperantistaj kaj delegitoj de I.E.L. en Brazilo; kaj fine la granda sukceso de la Stando de Esperanto ĉe la Internacia Filatelio Ekspozicio (Brapex).

Lerneja Interŝtata Esperanto-Akordo.—Plenumante la ĉefan rezolucio de la Jubilea Kongreso, Brazila Ligo Esperantista, pere de D-ro Marques dos Reis, prezidanto de Brazila Banko kaj eksministro por Trafiko kaj Publikaj Laboroj, faris peton al D-ro Gustavo Capanema, Ministro por Edukado, por ke la Brazila Registaro subskribu la Lernejan Interŝtatan Esperanto-akordon por la samtempa deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn de pluraj ŝtatoj.

D-ro Capanema ricevinte tiun peton tuj sendis ĝin al la Departamento de Edukado, kies direktoro, D-ro Mario Brito, prezentis al la ministro tre favoran raporton. Tamen tiu ĉi deziris aŭdi la opinion de la Nacia Konsilistaro de Edukado, kiu konsistas el 15 kompetentuloj. Prof. D-ro Jonathas Serrano, elektita de la prezidanto kiel raportonto, dum ĝenerala kunsido legis sian tre favoran raporton, kiun li per konvinkaj vortoj brilege defendis. La rezulto de la voĉdonado superis la plej optimistan probablecon. Dek du

konsilistoj voĉdonis por la konkludo de la raportinto kaj nur unu voĉdonis kontraŭ. La raporto aprobita de la Konsilistaro finiĝis opiniante, ke la Brazila Registaro donu sian aliĝon al la Lerneja Interŝtata Esperanto-akordo. Informante pri la praktikebleco de la rezolucio Prof. Lourenço Filho, direktoro de la Nacia Instituto de Pedagogiaj Studoj, favore opiniis.

Brazila Ligo Esperantista esperas, ke la Registaro sankcios la rezolucio de la Konsilistaro.

Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.—La Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, kiu celas la unuigon de la brazilaj statistikoj, antaŭ nelonge kreita de Lia Moŝto D-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Respubliko, de kiu ĝi senpere dependas, kaj kies prezidanto estas Ambasadoro D-ro J. C. de Macedo Soares, eksministro por Eksterlandaj Aferoj, kunveninta en ĝenerala kunsido unuanime aprobis deziresprimon, prezentitan de ĝia ĝenerala sekretario, D-ro Mario Teixeira de Freitas, per kiu ĝi rekomendas, ke la brazilaj statistikaj departementoj alprenu Esperanton por la korespondado eksterlanden.

La Instituto eldonis libreton titolitan "Statistika Resumeto" kun teksto nur en Esperanto, kiun ĝi dissendadis al la ĉefaj esperantistaj organizaĵoj kaj delegitoj de I.E.L. Sekve de la rezolucio de la Instituto alpreni Esperanton kiel helplingvon kaj la eldonado de la Resumeto, ĝi ricevas multajn leterojn kaj poŝtkartojn, kiujn ĝia ĝenerala sekretario respondas en Esperanto. Tial malfermiĝis por la oficistaro de la Instituto, kurso de la inter-nacia lingvo, kiu funkcias dum la laborhoraro.

Eldonado kaj Disvendado de Esperantaj Libroj.—S-ro Ismael Gomes Braga daŭrigante en 1938 sian viglan laboron por la eldonado kaj disvendado de esperantaj libroj, kiun li komencis en la antaŭa jaro, eldonis pere de la Librejo de la Brazila Spiritista Federacio la jenajn lern- kaj legolibrojn: "Manual Completo de Esperanto," "Primeiro Manual de Esperanto," "Metodo de Esperanto," "Esperanto-Modelo" kaj "Livros e Discos." La Federacio, kies oficiala aliĝo al nia movado estas tre valora, eldonis ankaŭ du lernolibrojn en hispana lingvo kompilitajn de D-ro Jaime Scolnik, loĝanta en Argentino, kiuj certe multe helpas la propagandon de Esperanto en la hispandevenaj amerikaj landoj. Ĉar la Federacio havas vastan librejretan, tiuj libroj estas vendataj en la ĉefaj librejoj en Brazilo. S-ro Braga faras grandan propagandon de tiuj libroj per radio, per aŭdiokassetoj kaj omnibusoj kaj tramveturiloj, kaj per la brazila gazetaro. Al la nacia kaj regionaj esperantistaj

asocioj kaj al la ĉefaj brazilaj esperantistoj li disdonis grandan kvanton de siaj verkaĵoj.

30a Universala Kongreso de Esperanto.—D-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Respubliko, nomis Konsiliston d-ron Caio de Mello Franco, kiel reprezentanton de Brazilo ĉe la 30a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Londono. D-ro Mello Franco salutis la Kongreson en la nomo de la Brazila Registaro kaj deklaris, ke tiu ĉi nepre daŭrigos doni sian apogon al la esperantista movado.

Kursoj de Esperanto.—Ni devas citi unue kurson funkciinta ĉe la “Komerca Supera Lernejo,” kies inaŭguron ĉeestis la Direktoro de la Edukada Departemento kaj aliaj edukadaj aŭtoritatoj, kaj tiun funkciantan ĉe la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko dum la laborhoraro. Aliaj kursoj funkciis en Rio-de-Janeiro kaj en 14 aliaj urboj. Funkciis ankaŭ kursoj per korespondado sub la direkto de B.L.E.

Radio kaj Esperanto.—Disradiis paroladetojn, deklamadojn, informojn pri Esperanto aŭ koncertojn kun kantoj en tiu ĉi lingvo la jenaj radistacioj: Rádio Clube do Brasil (PRA-3), Rádio Sociedade Mayrink Veiga (PRA-9), Rádio Sociedade de Baía (PRA-4), Sociedade Rádio Mineira (PRC-7), Rádio Sociedade Gaúcha (PRC-2) kaj Rádio Clube de Pernambuco (PRA-8). Tiu ĉi ankaŭ disradiis kurson de Esperanto.

Dum la “Horo de Brazilo” oni uzas nun nur la portugalan lingvon.

Resumoj en Esperanto.—La Societo de Geografio de Rio-de-Janeiro, kiel okazis en antaŭaj jaroj, aperigis sian Bultenon kun resumoj en Esperanto de ĝiaj artikoloj.

Nekrologo.—Mortis Querino de Oliveira, kunfondinto de B.L.E.

Mortis ankaŭ Grafo Afonso Celso, akademiano, emerita profesoro kaj fama verkisto, kiu estis granda amiko de Esperanto.

Brazila Gazetaro.—La Brazila Gazetaro de la komenco de la propagando de Esperanto en Brazilo estis tre simpatia al nia afero. Estis do neeble en resumo eĉ citi la nomojn de la gazetoj, kiuj parolis pri Esperanto dum la jaro 1938.

Aliaj faktoj.—Laŭ la programo de la Dua Brazila Kongreso de la Beletristikaj Akademioj, okazonta en Rio-de-Janeiro dum la monato junio 1939a, estas akceptataj tezoj pri la “Problemo de Esperanto.”

B.L.E. eldonis sur luksa papero du belajn bildojn titolitajn “Brazila Poŝto kaj Esperanto” kaj “Internacia

Filatelia Ekspozicio—BRAPEX.” La unua estis ankaŭ disdonita de D-ro B. Camozato kune kun broŝuro en-havanta la du paroladojn de li disradiitajn en Porto Alegre.

Sumiĝis al pli ol 10.200 la nombro de la Brazilaj poŝtmarkoj kun teksto en Esperanto senditaj ĝis la fino de 1938 rekte de B.L.E. kaj pere de S-ro Ismael Braga, komerca delegito de I.E.L.

B.L.E.

BRITUJO

Al la brita samideanaro ĉefa afero en 1938 estis, kompreneble, la Universala Kongreso en Londono. Tro ofte post nia ĉiujara manifestacio oni konstatas en la koncerna grandurbo malakceliĝon en la propaganda agado kaj grupa vivo. Rilate Londonon, tio felice ne okazis, kaj kvankam estus sensece troigi la amplekson kaj signifon de la nuntempa movado en la ĉerfurbo, tamen oni povas nur ĝoji ke nepre troviĝas pli da optimismo kaj vigleco ĉe la diversaj grupoj.

Unu rezulto de la Kongreso estas aparte rimarkinda: ke la bonega akcepto fare de la brita ĵurnalaro trafis efikas ĉe la publiko, kaj sekve oni pli kaj pli malofte trovas homojn kiuj aŭ ne scias kio estas Esperanto, aŭ ne agnoskas ĝian urĝan necescon.

Dum la jaro, Montagu Butler, propaganda sekretario de B.E.A., vizitis pli ol 150 lernejojn tra la lando, kaj parolis pri nia lingvo al 20,000 geknaboj kaj 700 geinstruistoj. (Dum la lastaj kvar jaroj tiuj ciferoj sumas 510 lernejojn, 62,000 geknabojn kaj 2,645 geinstruistojn!). Estas neeble tro alte taksii la tiurilatan laboron de s-ro Butler—la entuziasmo kiun li senlace montras, jetante sin al ĉiu parto de la lando en la Asocia aŭtomobilo, servas kiel imitinda ekzemplo al ĉiu laboranto por nia movado. Rezulte el liaj sukcesoj, oni rajtas esti certa, ke publika opinio pli kaj pli favoras la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

La Jubilea Kaso de B.E.A. (mono kolektata por aĉeti propran domon) atingis £1,572, kaj jam antaŭ iom da tempo oni komencis serĉi taŭgan domon en Londono—ege malfacila tasko pro la alteco de domprezoj en la plej konvenaj partoj de la metropolo. Daŭras, do, la serĉado!

Je la fino de la jaro la membraro de la Asocio sumis 1949 (minimuma kotizo por plenaĝuloj estas 5 ŝilingoj); librovendoj atingis dum la jaro £1,656, kaj aliĝoj al la unuŝilinga kvinleciona koresponda kurso sumis 500. Finance, tamen, la stato de la Asocio ne pliboniĝis. Estas bedaŭrinde ke ankoraŭ nur malgranda proporcio de la

brita samideanaro estas membroj de B.E.A., kaj ĝis tiu proporcio konsiderinde plialtiĝos la situacio de la Asocio restos malfacila, ĉar la deficitaj forglutas la kapitalon.

Tra la tuta lando okazis granda nombro da kursoj—en Londono mem proksimume 20 regule okazas samtempe, kaj tie kun aparta sukceso laboras Cseh-instruisto Sigismundo Pragano, malgraŭ malfacilaĵoj kiujn kaŭzis Londona ĉefadministracio *London County Council*, rifuzante permesi en siaj vesperlernejoj instruadon fare de alilanda instruisto, ĉar Esperanto “ne estas fremda lingvo!” Granda bato estis la forpaso de f-ino Saxl, kaj oni plejparte tiel perdis efikan kontakton kun multaj el la kursanoj kiujn ŝi instruis speciale por la Kongreso.

La oficejo de B.E.A. gvidis diversspecan propagandan laboron en pluraj sferoj—ekzemple: kontakto kun multaj progresemaj organizaĵoj (ne tre sukcese—en tiu medio multo restas farota) kaj regula dissendo de informoj pri nia movado al la brita ĵurnalaro (kun kontentiga sukceso).

Lastan jaron, finante tiun ĉi raporteton ni asertis ke en Britujo la lingvo vivas kaj progresas. Tiun ĉi jaron ni ripetis tion, kaj aldonas, do, resume, ke nuntempe en la lando la publiko estas nepre pli favora (pli ĝuste ni diru *interesata*, ĉar neniam ĝi montris aktivan malfavoron), kaj pro tio kaj aliaj cirkonstancoj Esperanto certe antaŭeniros.

Ni ne troigu nian naturan optimismon—tio povas konduki al seniluziigo, ĉar ankoraŭ vera sukceso restas malproksima—sed ĉiam, malrapide kaj des pli firme, ĝi alproksimiĝas.

E.W.A.

BULGARUJO

Dum la jaro 1938 estis klare rimarkebla konsiderinda plivigliĝo de la esperanto-movado en nia lando. Kvankam neniam objektivaj eksteraj cirkonstancoj favoris tiun ĉi plivigliĝon, ĝi tamen aperis, daŭras ankoraŭ nun kaj promesas daŭri ankau en la estonteco. La nombro de la membroj de B.E.A. kreskis de 335 en 1937 al 482 en 1938. La nombro de la aliĝintaj societoj—de 15 al 19. La nombro de la pagintaj abonantoj de la asocia organo B.E. kreskis de 650 en 1937 al 1,200 en 1938. La gazeto aperas regule kaj kun pligrandigita amplekso.

La 25-a jubilea kongreso de B.E.A. okazis en la urbo Sevlievo dum Julio 1938, kaj en ĝi partoprenis 450 kongresanoj.

Ankaŭ la ĝenerala intereso por nia movado kreskis. La grava ĵurnalo *Zarja* publikigas regule ĉiun semajnon specialan esperanto-paĝon. Esperanto-paĝon publikigadis ankaŭ la ĵurnalo *Nova Kambana*, sed ĝi ĉesis aperi. Apartaj artikoloj, favoraj por nia movado kiel ankaŭ informoj pri la esperanto-vivo, aperis kaj aperas en multaj ĵurnaloj kaj gazetoj, dum malfavoraj artikoloj preskaŭ ne aperis. La radior-stacio de Sofio, antenpotenco 100 kilovatoj, enprogramegis regulajn ĉiunonatajn esperanto-disaŭdigojn, kaj promesis plimultigi ilian nombron.

La amasa aĉetado de esperanto-lernolibroj estas la plej elokventa pruvo pri la ĝenerala intereso al nia lingvo. En la daŭro de la jaro 1938 aperis en Bulgarujo 4 novaj lernolibroj de esperanto, unu el kiuj atingis duan eldonon en du monatoj. Aperis ankaŭ aliaj lernolibretoj, vortaretoj ktp. Inter la aperintaj tradukoj el la bulgara literaturo en la daŭro de la jaro ni devas menci: *Elektitaj rakontoj* de Jordan Jovkon, *la Fantaskopo* de Sv. Minkov, *la Fajro-Lango* de N. Rajnov, kaj aliaj. La eldonejo *Frateco* en Sevlievo eldonis kelkajn librojn, ĉefe el la verkoj de Petro Danov. Ĝi eldonas ankaŭ la monatan gazeton *Frateco*. En la tuta lando ekzistas kelkaj vendejoj de esperanto-literaturo. La nombro de la aĉetitaj verkoj de Zamenhof, precipe fundamentaj, dum la jaro estas tre bona signo por la estonta bona progresado en lingva rilato. Inter la bulgaraj esperantistoj ekzistas granda deziro por korespondado kun eksterlandanoj. Por subteni tiun ĉi deziron, la B.E.A. decidis publikigi senpage la adreson de ĉiu eksterlanda samideano, kiu deziras korespondi kun Bulgarujo.

Sed, dum la sama jaro ni renkontis ankaŭ malfacilaĵojn sur nia vojo. Unu inter ili estis la nova leĝo pri la rekonfirmigo de ĉiuj ekzistantaj societoj kaj asocioj en la lando. La dua estis la nova leĝo pri la takso de 2,000 levoj, kiu devas pagi ĉiu persono, kiu deziras instrui publike lingvon aŭ iun alian objekton. Ĉar la ĝisnunaj kursoj en nia lando estis ĉefe senpagaj, estas malfacile trovi lektorojn, kiuj pagos la altan imposton. La asocio devis ankaŭ batali kontraŭ la senbaza opinio de iuj oficialaj rondoj, ke la esperantismo estas ne pure lingva movado, sed ke ĝi estas nepre ligita kun ia politika koncepto. B.E.A. ĉiam klare kaj insiste deklaris kaj deklaras sian plenan neŭtralecon rilate al problemoj politikaj kaj religiaj kaj esperas, ke la malveraj opinioj iom post iom malaperos.

Je la fino de la jaro 1938 ni havis grandan sukceson per la interkonsento, farita inter la B.E.A. kaj la J.E.L.

por pli intima kunlaborado, interŝanĝo de gazetoj, artikoloj, adresoj, prelegoj, event. vizitoj k.t.p. Tiu interkonsento kaŭzis grandan intereson en la bulgaraj esperantistaj rondo.

La organiza strukturo de la B.E.A. estas simpla: en ĉiuj pli grandaj urboj aŭ vilaĝoj ekzistas esperanto-societaj, kiuj estas ligitaj per la B.E.A. La aferojn de la asocio gvidas centra Komitato, konsistanta el 7 membroj. La sidejo de la asocio estas en la Esperanto-domo en Sofio, str. Alabin, 50.

B.E.A.

ĈEĤO-SLOVAKUJO

La movado iris laŭ kutimaj vojoj tre progresige. Malfermo de la librovendejo kaj de oficejo (3 ĉambroj) de Esperanto-Asocio en Ĉ.S.R. signifis gravan apogon de la movado kaj oni povis esperi brilan periodon de la movado en la tuta lando. Sed la politika krizo en meza Eŭropo post anekso de Aŭstrujo, kaj en oktobro sekvinta fortranĉo de triono el la ŝtata teritorio, kaŭzis halton de ĉiuj similaj movadoj en nia lando, ĉar ni ĉiuj devis koncentrigi nin al la plej urĝaj taskoj de la nacia vivo. Tial la rezultoj de nia laborado ne povas esti tiom grandaj laŭ la ciferoj kiel jaron pasintan. Tamen ni revivigis nian agadon kaj nun estas funkcio de la Asocio jam normala. Pri plua evoluo ni ne kuraĝas antaŭdiri ion ajn.

En propagando ĝenerala la Cseh-metodaj instruistoj ges-roj Seppik finis sian laboron en nia lando kaj forvojaĝis hejmen en marto. Sigismundo Pragano havis rapidkurson en banloko Trenčianské Teplice en julio. Por aŭtunovintro 1938-39 ni preparis agadon de norvego Nicolaisen; li venis jam en nian landon kaj komencis en septembro kursojn en tri urboj, sed devis foriri pro la oktobra krizo. Publikaj kursoj por komencantoj okazis en 27 lokoj por 678 personoj. Ni fabrikigis kaj vendas po 1 Kĉ kraĵojn kun nia titolo kaj stelo.

De nia revuo *Ligilo* aperis 10 numeroj, sume 78 paĝoj. La membroj ricevas ĝin po 10 Kĉ anstataŭ 20 Kĉ. *Bulteno* aperis 7 foje, sume 30 p. Ĝin ricevas membroj senpage. Krome ni eldonis: libron K. J. Erben-T. Pompr, *Bukedo*; *Katalogon* de nia librovendejo (32 paĝoj, tre kompleta kaj instiga listo de nun riceveblaj libroj); poŝtkarton kun surrealisma desegno de Toyen kaj 6 aliajn flugfoliojn. Moraviaj E-Pioniroj eldonis libron K. Capek-Kilián: *Blanka Malsano*.

Propagando per gazetoj funkciis regule; aperis ĉirkaŭ 1,000 artikoletoj pri E. en ĉeĥaj, slovakaj, ukrainaj, germanaj kaj hungaraj gazetoj.

Radio-disaŭdigoj estis 54. El Radio Brno estis disaŭdigataj la konataj "horetaj" ĉiumonate; el Moravská Ostrava ĉiusemajne prelego. Brno komencis en aŭgusto disaŭdigi "Kronikon," en kiu ĝi informas pri publikaj okazintaĵoj en nia lando. La stacio en Moravská Ostrava estis en oktobro prenita de Polujo; la nove konstruata stacio ne elsendas ankoraŭ en Esperanto.

La Ĉeĥo-Slovaka poŝta administro eldonis en julio pluajn 4 oficialajn poŝtkartojn ilustritajn kun tekstoj en lingvoj ĉeĥa kaj Esperanto kun Esperanto-motivoj. Post la militmobilizo, kiam estis ordonita cenzuro de leteroj adresataj fremdlandon, laŭ nia iniciato permesis poŝta ministerio per dekreto el 2.XI.1938 n-ro 88.135-IV/2-1938, ke ankaŭ Esperanto estu permesata por tiuj leteroj. Tio estas tre grava oficiala rekono de Esperanto.

E.A.Ĉ.S.R. kunigas ĉiujn aktivajn neŭtralajn Esperantistojn en la lando. Dum la jaro 1938 ĝi havis 39 lokajn grupojn, kun sume 1,200 membroj. Kun Esperanto libro-eldonantoj Moraviaj Esperanto-Pioniroj la Asocio daŭre kunlaboras. Germana Esperanto-Ligo en Reichenberg vidigadis dum la jaro minimuman aktivecon. Kiam la urbo de ĝia sidejo eniris en oktobro Germanujon, ĝi ĉesis funkcii. Krome funkcias en la lando Laborista Ligo en Plzeň kaj Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Praha. La monata gazeto *Espero Katolika* estas presata en nia lando. B.E.S. en Potštejn aperigis dum la jaro 13-an volumeton de sia *Adresaro*.

E.A.Ĉ.S.R.

DANUJO

Neniām en la historio de la dana movado estas farita tiom da laboro, kiom en la pasinta jaro. Oni aranĝis 50 kursojn en proksimume 40 urboj kun 2,000 partoprenantoj. La nombro de la kluboj baldaŭ atingos 100.

Sed ne nur la nombro de la komencantoj kaj progresantoj estas sufiĉe kontentiga; pli kontentige estas, ke neniam antaŭe estis tiom da intereso por Esperanto kiel nuntempe. Tio ankaŭ kaŭzis, ke la administroj kaj la senatanoj interesiĝis, kaj unu el ili sukcesis laŭleĝe enkonduki Esperanton en la vesperajn lernejojn kun la samaj rajtoj kiel aliaj lingvoj; tio estas bonega progreso.

En la komenco de la jaro la ekonomia stato de la Centra Dana Esperantista Ligo estis iom malbona, sed dank' al energia laboro de la prezidanto kaj la estraro ĝi jam pliboniĝis tiom, ke ni rajtas esperi, ke ĝi baldaŭ tute enordigos.

La 30a Jarkunveno okazis en Naestved, kaj ĝi estis sukcesa de komenco ĝis fino; la gazetoj aperigis belajn artikolojn pri la movado kaj la kongreso. La prezidanto, Dr. Justesen, estas reelektita.

Dum la jaro ni, dank' al la helpo de la dana gazetaro, sukcesis konatiĝi kun la plej granda parto de la popolo. Kaj ni nun rajtas diri, ke ĉiuj, kiuj legas gazeton, scias iom pri Esperanto.

La radion ni jam dumlonge prilaboris; bedaŭrinde ĝis nun nia laboro estis vana, sed ni esperas, ke ni baldaŭ venkos, ĉar ni nun subite ricevis helpon neatenditan.

Pri la individua membraro de I.E.L. la raporto estas mallonga sed tamen bona, la nombro dum la jaro 1938 pli ol duobliĝis, same la delegitaro.

Aliaj organizaĵoj: En la lando ekzistas laborista organizaĵo "Dansk Arbejder Esperantoforbund"; la rilatoj inter C.D.E.L. kaj la laborista organizaĵo estas sufiĉe bonaj, kaj ni ofte kunlaboris.

La internaciaj kursoj okazis en Helsingør. Partoprenis entute 140 kursanoj el 10 landoj.

Ankaŭ en Ry estis internaciaj kursoj, kaj partoprenis tie 150 el 12 landoj. Ĉiuj tiuj kursaranoj estis sukcesplenaj kaj esperigaj. Ekzamenoj: la jaro estis ekzamenjaro, proksimume 100 samideanoj prenis ekzamenon.

C.H.

"La Kritika Observanto"

Gravaj artikoloj pri internaciaj aferoj—Raportoj el multaj landoj—Diskutadoj pri socialaj problemoj. Alvenas trimonate. Jarabonprezo: 1 ŝil. 6 pencoj aŭ 4 respondkuponoj, aŭ ĉiulandaj nestampitaj poŝtmarkoj. Petu senpagan provnumeron!

(Indiku adresojn de viaj konatoj).

INTERNATIONAL PUBLISHING COMPANY,
12 Great Castle Street, London, W.1., ANGLUJO

Nia movado en Finnlando estas en t.n. neŭtralaj rondoj silenta, ĉar ekzistas nur malmulte da vere aktivaj esperantistoj kaj la gazetaro nur tre malofte enigas novaĵetojn pri nia movado. Ekzistas tamen kelkaj laboremaj samideanoj kaj kelkaj aktivaj societoj, kiel ekz. en urboj Helsinki, Turku, Pori kaj Uusikaupunki. La lastenomita eldonis plurajn flugfoliojn kaj starigis specialan Leterinstituton por instruado de nia lingvo la 11an de decembro 1938. La direktoro estas s-ro Lauri Toivonen. La societo aranĝis ankaŭ "leterbombardadon" kontraŭ finna ĉefradio kaj la Olimpia komitato, kaj 124 personoj el la provinco Varsinais-Suomi (sudokcidente) sendis petskribon por nia lingvo al la sama Olimpia komitato.

Flugfolioj kaj novaĵoj pri Esperanto estis iam kaj tiam dissendataj al la plej gravaj gazetoj, aŭtoritatuloj, lernejoj k.t.p.

La fervojista societo de esperantistoj ricevis la rajton surpendigi sur la murojn de la plej gravaj stacidomoj deklaracion kaj adresaron de I.E.L. k.t.p. senpage kaj la distribuadon aranĝis la reklamoŭficejo de la Fervoja Administracio, same tute senpage.

Se la neŭtraluloj dormetas, des pli vigle interesiĝas pri Esperanto la laboristaro kaj ties gazetaro. Kiel gvidanta persono inter ili funkcias s-ro N. Kavenius. Dum la jaro 1938 oni starigis jam 15 lokajn societojn kaj studocirklojn kaj novaj estas planataj. La socialdemokrata gazetaro enhavas ofte multajn kolonojn da novaĵoj kaj ilustritajn artikolojn pri nia movado, ĉar la laboristaro volas nepre lerni Esperanton ĝis la Olimpiado laborista en Helsinki 1943.

Ĉar la mondkongreso de la bontemplanoj en Helsinki je la fino de aŭguste 1940 uzos ankaŭ nian lingvon, almenaŭ parte, informojn pri la kongreso donos refendaria konsilisto J. H. Konttinen (adr. Töölönkatu 10, Helsinki). En la organo de finnaj bontemplanoj "Raittiuserho" (I.O.G.T.) aperis kaj aperos regule esperanta fako por instruado de nia lingvo. Informojn pri la religiaj kaj kontraŭalkoholisma movadoj en Finnlando donas staciestro H. Salokannel, Uusikaupunki.

Informojn pri la Olimpiado 1940 en Helsinki donas la Uficejo de Finna Turismo (Adr. Esperanto-Instituto de Finnlando, Kluuvikatu 5, Helsinki). Ĉiam aldonu respondkuponon!

Finnan lingvon elementan por la vizitontoj de la Olimpiado instruos la Leterinstituto de Finnlando (Suomen Kirjeopisto, Uusikaupunki), se sufiĉa nombro da partoprenontoj aperos. Anoncu vin tuj!

H.S.

FRANCUJO

S.F.P.E. (Société Française pour la Propagation de l'Espéranto) konsistas el 16 federacioj regionaj, kun grupoj, kaj 5 fakaj asocioj. La nombro de la membroj fine de 1938 estas 2,942 (1 P., 8 M.S., 15 M.A.H., 125 M.A., 279 M.J., 2,625 M.) kontraŭ 3,046 en 1937.

La financa situacio de S.F.P.E. estas jena: Bonhavo je la 1.1.1938=62,673.56 fr. Enspezo 1938=47515.86 fr.; Elspezo 1938=46075.45 fr. Profito = 1440.41 fr.; Bonhavo je la 1.1.1939=64113.97 fr.

La financa situacio de la "Franca Esperanto-Instituto" estas jena: Bonhavo je la 1.1.1938=2,370 fr. Enspezoj 1938=6366.50 fr.; Elspezoj 1938=3139.30 fr.; Profito 1938=3227.20 fr. kiujn F.E.I. transdonis al S.F.P.E. pro likvido de la funkciado de F.E.I., laŭ nura S.F.P.E.—dependo je la 31.12.1938. Ekde la 1.1.1939, F.E.I. kiu restos jure sub dependo de S.F.P.E., estos fakte komuna ekzamena oficejo de ĉiuj esperantaj asocioj de Francujo kunigitaj en la interesocia Franca Esperanta Komitato.

La financa situacio de la oficiala gazeto de S.F.P.E., "Franca Esperantisto" estas la jena: Enspezoj:17733.85; Elspezoj: 16288.55; Profito: 1445.30.

Jen kelkaj el la plej valoraj laboroj kaj sukcesoj de S.F.P.E. dum la jaro.

Dank' al la oferemo de S-ro Bachelier, nia "Espéranto Franca Centro," 34, rue de Chabrol, Paris X, funkciis dum la tuta jaro ankaŭ matene, kaj ricevis la viziton de multaj esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo.

Ni efektivigis kiel eble plej multe la deziresprimojn de la Internacia Konferenco "Espéranto en Moderna Vivo."

Per oficiala cirkulero de la 11.10.1938, Esperanto estas oficiale enkondukita libervole aŭ dum la tiel nomita "Kontrolita distriĝo" en la duagradaj kaj teknikaj lernejoj de Francujo.

Kursoj okazis tra la tuta lando kaj en la francaj kolonioj, ĉefe Alĝerio, Tunizio, Maroko. Kursoj estas malfermitaj por la soldatoj, eĉ en la Supera Milita Lernejo en Paris.

Dum la jaro, Franca Esperanto-Instituto disdonis 3 pedagogiajn atestojn (1937=3); 21 atestojn pri kapableco (1937=38), 77 superajn atestojn pri lernado (1937=46), 724 atestojn pri lernado (1937=533).

Per speciala cirkulero, la ĝenerala direktoro de la francaj doganoj: (1) permesis al la esperantistaj doganistoj porti la "verdan stelon" dum la deĵorhoroj; (2) decidis ke la doganinformoj en la doganejoj estos ankaŭ redaktataj en esperanto. La efektivigo de tiu dua parto de la cirkulero okazos dum 1939.

Per speciala cirkulero, la Ministro pri Poŝtoj, Telegrafoj kaj Telefonoj permesis al la esperantistaj poŝtistoj porti la verdan stelon dum la deĵorhoroj kaj permesis la pendigon de plato indikanta la eblecon de uzo de esperanto, ĉe la ĝiĉetoj kie estas oficistoj kiuj bone scipovas esperanton.

Radio-kursoj aŭ radio-paroladoj okazis en ĉiuj ŝtataj kaj en kelkaj privataj stacioj. La unuagrada kurso de Paris P.T.T. estas relajzata de 5 aliaj stacioj. Ĉiuj kursoj estas nun konsiderataj tute egalaj kun la kursoj de vivantaj lingvoj.

Dum la tuta jaro, teatraj radio-dissendoj okazis plej sukcese, kun profesiaj artistoj esperantistaj, sub gvidado de S-ro Marc Darnault, ĉe la stacioj de Paris P.T.T. kaj Radio-Paris.

S.F.P.E. organizis someran kurson en Malo les Bains. Du perkorespondaj kursoj funkcias.

La fervoja societo permesis la afiŝon de esperanto-plato en la stacidomoj de Dunkerque kaj Jeumont. S.F.P.E. organizis 3 karavanojn al la Londona Kongreso.

Ni ricevis la kutimajn sukcesojn kaj apogojn de la franca gazetaro kaj de la komercaj instancoj (foiroj, komercaj ĉambroj).

La propaganda "kvinopo" de S.F.P.E. vizitis dum la jaro 25 urboj (5,000 kilometroj), parolis antaŭ pli ol 4,000 personoj.

La filmo "Antaŭen" estis prezentita tra la tuta lando. Kopioj estas venditaj en Nederlando kaj Svedujo.

F.E.I. kaj S.F.P.E. eldonis dum la jaro: *La Bela Historio de Josef de Zamenhof*, kun desegnoj de Thézard.

La kunlaborado kun la aliaj francaj esperanto-asocioj bone daŭrigis.

P.P.

VIVO DE ZAMENHOF

Edmond PRIVAT

2a eldono. — 134 paĝoj kaj 12 ilustraĵoj.
Broŝ. 2ŝ. 6p., bind. 3ŝ. 6p., afranko 4p.

★

“Granda nombro da bildoj sur kreta papero. Fama verko de fama aŭtoro. Stilo ne atingita ĝis nun de alia verkisto: lego de iu ajn paĝo alportas plej altan ĝuon al ĉiu lingvoscianto. Resume: Fiero de nia literaturo. La libron bele ekipitan devus havi ĉiu Esperantisto, kion ebligas la relative tre malalta prezo.”

Ligilo (Ĉeĥoslovakujo).

Eldonita de

**The Esperanto Publishing
Company Limited**
ANGLUJO

★

Mendu ĉe
INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo,
aŭ *via kutima esperantista librovendisto*

HINDOĈINUJO

Dum la jaro 1938, la Hindaĉina Esperanto-Asocio bone kreskis.

Financoj.—De Julio 1937 (dato de la fondiĝo) ĝis fino de 1938, ĝiaj enspezoj sumiĝis 2,745 fr. fr. kaj ĝiaj elspezoj 2,205 fr. fr.

Membroj.—Ĝis la 31.12.1938, ĝi havis 70 aktivajn membrojn (esperantistoj) kaj 110 aliĝajn membrojn (amikoj de Esperanto). El la 70 aktivaj membroj, 52 jam aliĝis al I.E.L. en 1938; la aliaj aliĝas en 1939.

Kursoj.—Unuagradaj. 2 kursoj, malfermitaj en Novembro 1936 kun 70 lernintoj, finiĝis en Marto 1938 kun 20 sukcesintoj je la elementa diplomo (Atesto pri lernado). Kurso malfermita en Aprilo 1938 kun 30 lernintoj finiĝis en Septembro kun 9 sukcesintoj. Kurso malfermita en Oktobro 1938 kun 20 lernantoj finiĝis en Feb. 1939.

Duagradaj.—Kurso malfermita en Aprilo 1938 finiĝis en Septembro 1938 kun 5 sukcesintoj je la diplomo “Supera Atesto pri lernado.” Kurso malfermita en Oktobro 1938 kun 10 lernantoj finiĝis en Feb. 1939.

Triagrada.—Kurso malfermita en Oktobro 1938 kun 5 lernantoj finiĝis en Feb. 1939.

Esperanto en la Hindaĉinaj Lernejoj.—Ni klopodas apliki en Hindaĉinujo la cirkuleron de la Franca Ministro pri Edukado. Jan ni preparas malfermon de kurso nedeviga en la privata liceo “THANG-LONG,” kies komitatano estas vic-prezidanto de nia Asocio. La kurso estos malfermata en Feb. 1939. Ni antaŭvidas kursojn en aliaj lernejoj privataj aŭ publikaj.

Esperanto en la Hindaĉinaj Gazetoj. *Hanoi Soir* (Hanoi-Vespero), granda taggazeto franclingva, de Julio 1938, ĉiusemajne enhavas ampleksan Esperanto-rubrikon (ĝis 2-3 kolonoj). Aliaj gazetoj volonte enpresas informetojn pri malfermo de kurso, k.t.p.

Estraro.—Nia Honora Prezidanto estas S-ro Duteil, Hindaĉina Poŝt-Direktoro, esperantisto de 1908. La estraro de la Asocio por 1939 konsistas el:

Prezidanto: S-ro Lejus.

Vic-Prezidantoj: S-roj Cassagne, Guerinéau, Tô, Binh.

Generala sekretario: S-ro N. V. Nhàn, I.E.L. delegito en Hanoi (37, Rue Laveran).

Help-sekretario: S-ro P. T. Thanh.

Kasisto : S-ro T. Q. Dich.

Help-kasisto : S-ro N. X. My, I.E.L. Vic-delegito en Hanoi (68 Rue du Coton).
N.V.N.

HUNGARUJO

Pri Hungarujo, S-ro Mihalik sendis al ni la jenan raporton, kiun ni presas tia, kia ni ĝin ricevis, ne enmiksiĝante en la pripolitikaj klarigoj, kiujn li donas, kaj pri kiuj ni ne estas respondecaj.

En Hungarujo post la 1929 jara Universala Kongreso en Budapeŝto, la movado estis dum kelkaj jaroj sufiĉe vigla, sed poste ĉiam pli malfortiĝis. Pro la ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj, malgraŭ ĉiuj klopodoj de la gvidantoj, la movado nur vivetadis. Tiam post dujara malfacila prepara laboro profesoro Jozefo Mihalik de Hernádszurdok fondis kun la gvidantoj de la esperantaj societoj kaj grupoj la Hungaran Esperanto-Federacion. Tio savis la movadon en Hungarujo. Se oni ne donas al la hungara movado en tiu tempo kristanan kaj nacian bazon, se la gvidado ne estas en kristanaj manoj, tiam ankaŭ en Hungarujo la movado estus estinta ĉesigita kiel kontraŭstata organizo—laŭ certaj vidpunktoj. La unua jaro de la Federacio estis pro la nekompreneco kaj kelkaj kontraŭaĵoj tre malfacila. Sed fine la plimulto konsciigis pri tio, ke la signita vojo “unue por la patrujo kaj nur poste por la homaro,” ŝajnas ĝusta kaj ĉiam pli multaj aliĝis ankaŭ individue sub la nova standardo. Bedaŭrinde ankoraŭ ĉiam estas suspektemaj dubantoj, flankenstarantoj kaj ekleziemuloj, sed la federacio staras jam firme kaj la merito kaj graveco de ĝiaj kreaĵoj ne estas dubinda. Tiuj estas: ĝi savis la revuon *Hungara Heroldo* de la pereco: en ĉiu jaro ĝi sukcese organizigis la Landan Kongreson (Debrecen, Budapeŝto, Ujpest, Pécs); ĝi organizis konstantan kurson en la popolo-duka komisiono de Budapeŝto; ĝi unuigis la fortojn de ĉiuj esperanto-societoj kaj grupoj; ĝi organizis du post-kongresojn; ĝi kunhelpis la organizon de la unua eŭkaristia mondkunveno; ĝi eldonis gvidlibretojn pri Budapeŝto kaj Pécs; ĝi ekeldonis esperantajn popoledukajn kalendarojn por helpi la reciprokajn konon kaj estimon de la nacioj, el kiuj ĝis nun tri kalendaroj aperis; ĝi akiris la moralan kaj materialan apogon ĉe kelkaj ministerioj, ĉe la komerca ĉambro, ĉe la registaro, la Internacia Foiro; per siaj konsuloj ĝi vivigas la provincan movadon; ĝi apogas la politikajn eksterlandajn celadojn de la registaro; ĝi atingis sukceson ĉe la hungara radio. Pro la laboro de la federacio aperis

en 1938 nova esperanta lernolibro (de Prof. Mihalik) kaj Frazaro (de Prof. Mihalik—St. de Zöldy). Belaj hungaraj sukcesoj estis ĉe la hungara reĝa poŝto la konstanta eldono de poŝtkartserio kun esperantaj tekstoj kaj la endonduko de la esperantlingva telefonklariga servo. Oni faris kursojn ĉe la skoltroj—kies Asocio en siaj cirkuleroj ofte publikigis informojn pri la esperanto-laboro—ĉe la poŝto, fervojo, en kelkaj lernejoj kaj precipe okaze de la Eŭkaristia mondkongreso en katolikaj randoj, kie kelkloke esperanto fariĝis tre populara. La okazo de la unua Eŭkaristia Esperanta Mondkunveno estas eterna fiereco de la hungaraj esperantistoj. Al tiu la Papo sendis apostolan benon. Ties organizo estas merito ĉefe de univ. prof. dro. Francisko Erdey. La sidejo de la konstanta komitato de tiu ĉi mondkunveno fariĝis Budapeŝto kaj oni jam fondis subkomitatojn en diversaj partoj de la mondo. En 1937 la Pedagogia Esperanto-Societo sub direkto de prof. A. Pechan aranĝis tre sukcesan esperanto-fakon en pedagogia ekspozicio. En la parlamento estis stenografia ekspozicio, kie la esperantan fakon aranĝis prof. L. Kökény.

Inter la societoj kaj grupoj plej vigle laboras la Esperanta Rondo Amika de H.E.S., la Katolika Esperanto-Societo kaj la Pécsa grupo de la Nacia Ligo. La Federacio harmonie kunlaboras kun la nova Esperanto Kulturpropaganda Instituto, kiun fondis polickapitano dro. Vince Toth.

H.E.F.

IRLANDO

Propagando.—Serio de lecionoj publikigis S-ro James M. Rac, en la *Irish Catholic*—semajna ĵurnalo. Diversaj artikolojn aliloke verkis S-ro S. O hÉideáin kaj aliaj samideanoj. Oni sendis Esperantaĵojn al malnovaj esperantistoj kaj propagand-cirkulerojn al aliaj. En Decembro okazis klopodoj pri vigla propagando en 1939, tiucele la Irlanda Esperanto-Asocio restariĝos. Ĝi fondiĝis 1925. Espereble la Katolika Asocio, Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj, funkcios denove. S-ro L. O hUiginn paroladis propagande en Trinity College, Dublin; ĉe Internacia Amikeca Ligo; kaj aliloke.

Radio.—Ĉiumonate (esceptinte Januaron) oni parolis per tri Irlandaj stacioj (Dublin, Athlone kaj Cork), je la unua dimanĉo. Decembro okazis la unua parolo je la tria mardo. Entute dek du dissendoj. La radion oni uzas sole por disvastigi informojn pri la lando, ekz. Irlandaj literaturo, lingvo, arto, historio, herooj, ke.

L.O.H.U.

ITALUJO

Nenio aparte grava okazis, dum 1938, en la itala movado : multaj kaŭzoj influis je tio, ne lastaj la ĝenerala situacio kaj malfacilaĵoj en la internaciaj rilatoj.

Sed oni ne povas ne substreki gravan novajon : t.e. la publikigo, fare de E.I.A.R. (Ente Italiano Audizioni Radiofoniche), de monata esperantlingva broŝuro, enhavanta la programojn de la dissendoj de radio-stacioj Romo, 2 RO kaj aliaj. Tiu broŝuro estas sendata *senpage* al ĉiu mendinto, kiu povos ĝin ricevi skribante al jena adreso : Radio Stacio, "Esperanta Voĉo," via Montello 5, Roma (Italia).

Ĉiam en la radio-kampo, ni deziras altiri la atenton de la gesamideanaro al la fakto, ke E.N.I.T. (Ente Nazionale Industrie Turistiche), kiu estas branĉo de la Ministerio pri Popola Kulturo, aranĝis, jam dum la jaro 1938, la 5-an radio-konkurson de la "Italaj Turismaj Kronikoj" por la komenco de la jaro 1939, kaj ke la regularo de tiu konkurso estis oficiale eldonita ankaŭ en Esperanto. La esperantistaj geaŭskultantoj de Radio Romo kaj 2 RO jam sufiĉe bone konas tiujn konkursojn de "Italaj Turismaj Kronikoj," kaj certe notis la tre interesan novaĵon en la lasta konkurso. Ĝi fakte konsistas en la disradiigo de kvin "radiofoniaj sintezoj" pritraktantaj kvin malsamajn italajn turismajn centrojn, kies nomoj ne estos anoncataj. La konkursanoj devas identigi la urbon aŭ turisman regionon priskribitan ; la taskon al la konkursanoj oni faciligos, ilustrante la temojn per tipaj regionaj muzikaĵoj kaj per mencioj pri apudaj lokoj, famaj monumentoj, historiaj faktoj, k.t.p., rilatantaj la identigotan lokon. La premioj estas : duklasaj fer-vojbiletaj por ir-reiro de la itala landlimo ĝis Roma, kaj 10 hotelkuponoj, kategorio B, por completa pensio.

Ĉiujn informojn pri tiuj konkursoj kaj pri turismo en Italujo, kaj ĉiujn petojn pri senpagaj *esperantlingvaj* turismaj broŝuroj, la tutmonda esperantistaro bonvolu adresi rekte al : *Ministero della Cultura Popolare, Direzione Generale Turismo, via Vittorio Veneto 62, Roma*. La aligintoj al la XXXI.a Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĝin kongos sian adreson al tiu Ministerio ricevos *senpage* belajn ilustritajn esperantlingvajn publikajaĵojn.

Itala Esperanto-Federacio daŭrigis dum 1938 sian propagandagadon, precipe per dissendo de pluraj miloj da ekzempleroj de la gazeto *L'Esperanto* kaj de flugfolioj. La propagando per neesperantistaj gekunlaborantoj, pri kiu ni parolis en lastjara raporto, montrigis ne efika : do,

I.E.F. decidis plivigligi la agadon pere de la membroj de la Federacio mem, starigante riĉan liston de premioj—en libroj, eĉ valoraj—por la membroj kiuj verbos novajn membrojn, aŭ perados la disvendon de speciala "propagandpakajo" (enhavanta gramatikon, legolibron, konversacian libreton kaj ekzemplerojn de esperantistaj gazetoj) aŭ de perkorespondaj kursoj de Esperanto. Nur post almenaŭ unu jaro, oni povos vidi, ĉu tiu sistemo alportis kelkajn fruktojn.

Bedaŭrinde, mankas al I.E.F. monaj rimedoj por daŭrigi sian agadon je la nuna skalo, kaj se tia situacio ne pliboniĝos, estos necese severe limigi la elspezojn. Tiun temon, inter aliaj, pritraktis la XX.a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta en Vicenza, la 3.an kaj 4.an de septembro 1938, kaj tiucele estis alprenitaj decidoj, kiuj ekfunkcios aŭtomate, rilate al la efektiva konsisto de la venontjaraj enspezoj.

En tiu kongreso, oni pritraktis detale la tre interesan kaj aktualan temon "Esperanto kaj Turismo" : la kompleta raporto, verkita de la Prezidanto de I.E.F., Prof. D-ro G. Canuto, aperis, en itala lingvo, en la gazeto *L'Esperanto*, kaj estis dissendita al centoj kaj centoj da turismaj kaj aliaj instancoj en la tuta lando.


Gravan kaj interesan decidon prenis I.E.F. rilate al la disvastigado de la Esperanto-libro. Konsiderinte la nunajn malfacilaĵojn pri internaciaj pagoj, kaj la koston de la libroj, kaj ankaŭ la malpliigon de la aĉetpovo flanke de la esperantista legataro, ĝi faris eksperimenton, kun kelkaj esperantistaj eldonejoj, proponante la starigon de normala interŝanĝado de libroj ; nun, post unujara sperto, I.E.F. deziras plivastigi tian sistemon, kaj tial ĝi tre volonte kaj danke ricevos proponojn de ĉiu eldonejo aŭ deponejo de esperantistaj libroj tiurilate, kaj akurate respondos tiujn proponojn, kaj klarigos la tre simplan sistemon, laŭ kiu la afero povos kontentige marŝadi. La farita sperto, eĉ se ne grandskala, pruvis per faktoj, ke tiu vojo estas sekvinda, ĉar per ĝi oni efektive plivigligas la "merkaton" de la libro ; kaj I.E.F. avokas la atenton de ĉiuj eldonejoj kaj deponejoj al tiu sistemo, kaj varme petas kunlaboradon, kiu estos vere fruktodona kaj praktika por ĉiuj : por la eldonejoj, kaj por la libro-aĉetantoj.

Se oni volas konkrete solvi la t.n. "krizon de la libro," oni devas uzi taŭgajn rimedojn. Ni povas aserti, ke tia rimedo ekzistas : do, oni apliku ĝin, senprokraste ! Tion farante, oni vere alproksimigos la libron al la libroaĉetanto, kaj la libroaĉetanto al la libro, malgraŭ kaj super ĉiuj malfacilaĵoj kaj malhelpaĵoj nunaj.

Por la XXI.a Itala Kongreso de Esperanto (1939) oni elektis sidejon en Torino, kaj la daton de la 9.a ĝis la 11.a de septembro.

La oficejo de Itala Esperanto-Federacio (*Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano*) estas malfermata ĉiutage—escepte dum festotagoj—de la 14,30 h. ĝis la 18,30 h. Al ĉiuj gesamideanoj, kiuj skribas al la oficejo aŭ al la Delegitoj de I.E.F., ni rememoras, ke rajtas plendi pro ne-respondo nur tiuj, kiuj aldonis poŝtan respondkuponon al sia servopeto.

La gazeto de I.E.F., *L'Esperanto* (sama adreso), en itala lingvo kaj en Esperanto, estas interesa ankaŭ por eksterlandanoj. Provnumero senpaga; jarabono it. lir. 15 (aŭ 12 poŝtaj respondkuponoj). I.E.F.



PÉCS estas la plej bela urbo en sudokcidenta Hungarujo; eĉ oni nomas ĝin “Perlo de Pannonio.” Ĝi situas sur la pentrinda deklivo de la eterne verdiganta montaro “Mecsek.”

Mondfama estas ĝia belega kvartura katedralo. La ĉi tiea universitato estas fondita en 1367. La rigardindaj restintajoj devenas el la roma kaj islama okupadepokoj.

Jam ĉie konataj estas la ĉi tieaj subĉielaj festludoj antaŭ-katedralaj.

Alta kulturejo de fruktoj kaj vinoj. La ĉirkaŭaĵo estas riĉa en koloraj popolkostumoj kaj trezoroj popolartaj.

La verdmetalluma eozeno estas originala specialaĵo de la loka Keramifabriko *Zsolnay*.

Volonte ni alsendas senpage je peto niajn Esperantlingvajn prospekton kaj gvidlibron. Nia adreso estas

**FREMDULTRAFIKA OFICEJO,
Urbdomo 11/74, Pécs, Hungarujo.**

JAPANUJO

Ĝenerala aspekto.—En la dua jaro de la Ĉina afero, la Esperanto-movado de tiu ĉi lando, ĝenerale dirite, sin puŝis antaŭen, aŭ almenaŭ ĝi promesas rimarkindan disvolviĝon en la sekvonta jaro. En la komenco de la jaro, la movado aspektis iom malakorda, sed iom post iom fordegelis la kontraŭemo kaj la tutlanda organizo nun staras sur tia plej firma solidareco, kian oni apenaŭ vidis iam antaŭe.

Unuaj Esperanto-Gvidiloj de Gravaj Urboj: Osaka, la dua granda urbo de Japanujo, Nagoya, la tria, laŭvice eldonis en 1938 Esperantotekstan gvidilon de sia urbo, dank' al fervoraj klopodoj de la lokaj samideanoj. La gvidilo de Nagoya estis eldonita por la memoro de la 26-a Japana Esperanto-Kongreso, okazigita en tiu ĉi industria centro. Ili estas la unuaj gvidiloj de japana urbo eldonitaj en Esperanto.

Unua Esperanto-Disaŭdigo Eksterlanden; La Tokio Stacio disaŭdigis 3. aŭgusto prelegon de Prof. Fujisava esperantlingve “Kelkaj fundamentaj aspektoj de la japana spirito.”

Fervoja Ministerio eldonis konversacian libron kun la tekstoĵ angla, franca, germana, itala, hispana, Esperanta kaj japana.

Fondon de Ossaka-Premio: Por memori la grandan meriton de S-ro Ossaka, kiu rezignis la direktorecon de J.E.I. pro sia forlaso de la centro, la 26-a Japana Esperanto-Kongreso, decidis fondi Ossaka-Premion kolektante monoferon de la tutlandaj samideanoj. La premio estos donacata ĉiujare al persono, kiu faras la plej grandan servon al la movado dum la lasta jaro. En la fino de la jaro oni jam kalkulas la sumon de la monofero 1.100 jenoj (proks. 320 usonaj dolaroj).

La gazetaro.—Dum la jaro 1938 la plej gravaj tag-jurnalaj tre ofte skribis sensaciajn artikolojn koncerne de la esperanta afero. Ankaŭ gravaj gazetoj interesiĝis en esperanto. Interalie la *Semajna Grafiko* eldonita de la Informa Oficejo de la Kabineto aperigis 7. sept. foto-grafajon de la XXX. Universala Esperanto-Kongreso.

Fondo de Japana Turisma Servo: En la 26-a Japana Esperanto-Kongreso fondiĝis Japana Turisma Servo Esperanta.

Nova Estraro de J.E.I. por 1939-40.

Prezidanto de la direktoraro : D-ro W. Oishi, la Direktoro de la Aerologia Observatorio.

Direktoroj : T. Ueno ; Z. Toki, redaktoro de la *jurnalo Tokio Asahi* ; D-ro S. Nisi, Prof. de Tokio Imperia Universitato ; Prof. Ĉ. Fujisava ; D-ro Ŝ. Moĉizuki, Prof. de Keio Universitato ; M. Den, la Direktoro de la Turisma Departamento de la Fervoja Ministerio ; T. Sasaki ; D-ro H. Asada, Prof. de Tokio Medicina Kolegio ; D-ro M. Suzuki, Prof. de Tiba Medicina Fakultato.

Konstantaj Direktoroj : M. Inoue, Sekciestro en Turisma Departamento de la Fervoja Ministerio ; M. Oi ; T. Minoda ; Prof. J. Kaŭahara, Tyŭo Universitato ; I. Micuiŝi (kasisto). Ĝenerala sekretario : Mijake-Ŝ. J.E.I.

JUGOSLAVUJO

Membronombro.—En la jaro 1938 apartenis al J.E.L. 20 lokaj grupoj kun entute 832 membroj. Ekster J.E.L. ekzistis 9 societoj kun entute 396 membroj. Entute do estis organizitaj 1,228 esperantistoj. Izolaj esperantistoj troviĝas en ĉiu pli granda urbo kaj en multaj vilaĝoj. Kompare kun la jaro 1937, la landa movado montris 133 % an progreson rilate al la nombro de organizitaj esperantistoj.

La 11a landa kongreso okazis dum Pentekosto en Novisad. Ĉeestis ĉ. 300 personoj inter kiuj ankaŭ kelkaj eksterlandaj gastoj. Pri la kongreso detale raportis la plej grandaj enlandaj gazetoj.

La nova estraro.—Prezidanto : D-ro Ivo Lapenna ; vicprezidanto : J. Kozlevĉar kaj B. Rajŝiĉ ; sekr. : Franjo Slogar ; kasistino : Regina Papo ; redaktoro : D-ro Leo Kun ; arĥivisto : Anton Mussi ; komitatano : Alfred Kraus ; kontrolkomitato : D-ro Vuk Jovanoviĉ, D-ro Ŝalamon kaj Ladislav Friczky.

Radio.—Same kiel la pasintan jaron, ankaŭ en la jaro 1938 la radio-stacioj en Ljubljana kaj Zagreb disaŭdigis kelkajn nacilingvajn propagandajn prelegojn. La stacio en Ljubljana okazigis ankaŭ kelkajn esperantlingvajn aranĝojn.

Gazetpropagando.—Apartan atenton oni dediĉis en la pasinta jaro al bona kaj serioza gazetpropagando. Aperis amaso da artikoloj kaj propagandaj sciigoj en multaj gazetoj kaj revuoj, inter kiuj troviĝas la plej granda kaj unu el la plej seriozaj literaturaj revuoj *Književnik* (La literaturisto).

“Esperanto-semajno.”—De la 25.9—2.10.1938 okazis en la tuta lando “Esperanto-semajno,” kiun organizis la Ligo. Dum tiuj tagoj oni disdonis 20,000 flugfoliojn, kiujn eldonis la Ligo, kaj 2,800 kiujn eldonis la opaj societoj. Radio-Zagreb disaŭdigis du propagandajn radio-prelegojn. En pluraj lokoj okazis 10 publikaj prelegoj, kiujn ĉeestis entute 550 personoj. La Ligo eldonis ankaŭ apartan propagandan n-ron de *La Suda Stelo* en la naciaj lingvoj. 2,000 ekzempleroj de tiu ĉi n-ro disvendigis dum kelkaj tagoj. Ĝi estis dekses-paĝa kun multaj artikoloj de niaj plej eminentaj esperantistoj. En 22 diversaj gazetoj kaj revuoj aperis entute 97 artikoloj pri Esperanto kaj ĉ. 150 malgrandaj propagandaj sciigoj kaj artikoletoj. La eldonnombro de ĉiuj ĉi gazetoj estas ĉ. 260,000 ekzempleroj. En kelkaj urboj estis organizitaj tre trafikaj ekspozicioj de esperantistoj. Krome oni disdonis entute 550 grandajn afiŝojn. Rezulte de tiu ĉi propaganda aranĝo al la novaj kursoj aliĝis entute 934 personoj, sed laŭ la nombro de la disvenditaj lernolibroj oni povas kalkuli ke fine de la jaro 1938 lernis Esperanto en nia lando minimume 2,000 personoj!

Oficiala organo de J.E.L. estas *La Suda Stelo* (red. Dro-Leo Kun, 8-paĝa,—ek de 1.1.1939 12-paĝa, esperantlingva, abonprezo 24 Din. jare, aŭ 9 internaciaj respondkuponoj). La gazeto estas tre multe legata eksterlande.

Lernejoj.—En la jaro 1938 Esperanto estis instruata kiel nedeviga temo en la Komercekonomia atlernejo en Zagreb. En kelkaj mezlernejoj estis gvidataj nedevigaj kursoj por mezlernantoj.

Aliaj organizaĵoj.—Krom la neŭtralaj societoj en la lando tre viglas ankaŭ la laborista esperanto-movado kun deko da tre bonaj societoj. Kiel centro de la laborista esperanto-movado funkcias nun la Laborista esperantista societo en Zagreb, Ŝubiĉeva ul. Radniĉki dom. La rilatoj inter J.E.L. kaj la laboristaj societoj estas bonegaj. Estas aparte menciinde, ke en *La Suda Stelo* la laboristaj esperantistoj havas sian laboristan paĝon kaj ke la landaj kongresoj estas komunaj por ĉiuj esperantistoj.

Jugoslavia Katolika Esperantista Ligo havas sian sidejon en Ljubljana. En la jaro 1938 ĝi organizis la Internacian Katolikan Esperanto-Kongreson en Bled.

Kongreso.—La 12a landa kongreso okazos de la 27—29 de majo en Karlovac. Adreso : Esperanto-Kongreso, Karlovac, Jugo-slavujo.

Ĝenerale la movado en la pasinta jaro multe progresis. Ni esperas, ke tiu ĉi jaro estos ĉiurilate ankoraŭ pli bona.

D-ro I.L.

KATALUNUJO

Dum milito malmulte oni povas fari por Esperanto. La plimulto de la junuloj estas sur la batalfronto, tial la esperanto-kampo restas ege malpliigita kaj, kompreneble, ankaŭ la ekonomiaj eblecoj.

Tamen, escepte de iu Esperanto-Grupo malaperinta, la aliaj daŭrigis sian travivadon, kaj eĉ en la lasta kvaronjaro la movado plivigliĝis en kelkaj sektoroj de la lando, speciale en ĉefurbo Barcelono kaj urbetoj Castellterçol kaj Moia. En Barcelono estiĝis grava Fak-Delegitaro de I.E.L. kaj kreskis la nombro de membroabonantoj. En Castellterçol floris nova Esperanto-Grupo kun sukcesinta trupo. En Moia la movado naskis entuziasmajn kunbatalantojn, kiuj efike kunlaboras en la disvastigado de la helplingvo. En ambaŭ urbetoj novaj membro-abonantoj estiĝis.

La I.E.L.-Delegitaro kreskis. La asociaj membroj plialtiĝis je 62.50%.

Ĉio ŝajnas antaŭdiri, ke por la nova jaro ni povas esperi, ke la rezultatoj estos pli bonaj ankoraŭ.

En la oficiala kampo Esperanto estis tre uzata. La Komitato de Propagando de la Generalitato daŭrigis la uzadon de la helplingvo en sia propagando kaj informado por eksterlando. La Prezidanto de la Generalitato, S-ro Lluís Companys, tre simpatianta al nia movado, sendis altvaloran saluton al la XXXa Universala Kongreso, per kiu lia moŝto diris :

“ Al S-ro Sekretario de la XXX. Universala Kongreso de Esperanto, Londono.

“ Leipzig en la 17-a jarcento, en laborado por lingvo tuthomara, aludis la eminentan katalunon Lull (Lulio), kiu jam en la 13-a jarcento klopodis havigi universalan komprenilon al la homaro. Kaj ankaŭ laste, en la 19-a jarcento, grandaj katalunoj Sinibaldo de Mas kaj Bonaventura Aribau prilaboris universalan lingvon. Sed komence de la nuna jarcento, alia granda kataluno, Pi i Margall, publike kaj laŭde priskribis Esperanton mem, kiel solvon de la granda problemo.

“ Katalunujo ĉiam ŝatis homaran pacon kaj liberon, juston kaj amon, kaj tial ĝi en la nuna universala milito batalas por libero kaj justeco. Kaj komprenante ke Esperanto kaj Esperantismo estas afero por justeco interlingva kaj movado por paco internacia, la Registaro de la Generalitat de Catalunya plej simpatie atentis tiun aferon, tiun movadon

kaj profunde deziras grandan sukceson al la XXX. Universala Kongreso de Esperanto, kaj feliĉon al Granda Britujo, kiu okazigis ĝin, dum aliaj landoj publike kontraŭstaras kaj atencas pacon kaj liberon. Altestime salutas.

LLUIS COMPANYS, Prezidanto de la
Generalitat de Catalunya.

K.E.F.

LATVUJO

La Esperanta movado en Latvujo pasintjare ne montras grandan sukceson, ĉar pro la ordinara noveldonita leĝo ĉiuj societoj ankaŭ Esperantistaj, devis peti novan re-registron de la interna ministerio kaj atendi novan agopermeson. Jam pasis preskaŭ jaro, sed agopermeso ankoraŭ ne venis. Dum tiu atendado laboro por nia lingvo kaj ĝia sukceso ne povis esti vigla. Nun tamen estas espero baldaŭ denove ricevi ĉiujn agorajtojn kaj konscion, ke laboro de niaj verduloj en nia lando ne estas vana, sed venonte estos pli prosperoplena.

E.E.

Esperanto ĉe Latvaj P.T.T.-istoj.—La Esperanto-movado en Latvujo neniam atingis la nivelon de najbarlandoj—Estonujo kaj Litovujo, kie Esperanto jam depost pli ol jardeko estas oficiale rekonita kaj regule uzata, precipe en radio-disaŭdigo kaj turisma propagando, dum en Latvujo okazis nur maloftaj kaj tut-hazardaj radiodisaŭdigoj en Esperanto. Depost 5 jaroj Latvaj Esperantistoj ne plu havas sian landan Esperantan gazeton.

Pro tia malvigliĝo de ĝenerala Esperanto-movado despli meritas mencion la rilato de P.T.T.-fakasocio kaj ĝia organo *P.t. Dzīve* (P.t. Vivo) al Esperanto.

La unua artikolo pri Esperanto en nomita revuo aperis en junio 1933. Julia numero de la revuo enhavis jam 4 tradukojn el “ La Interligilo de l’P.T.T. ” kaj 4 informojn pri pratika uzado de Esperanto en trafika kaj turisma servoj. En septembra numero de la sama 1933-a jaro la revuo komencis enpreson de Esperanto-kurso, kiu daŭris ĝis julio 1934-a. Daŭris ankaŭ apartaj informoj pri Esperanto-movado, por kiuj en februaro 1934-a estis enkondukita regula Esperanto-rubriko, aperanta ĝis nun. Dum 1936-a jaro la Esperanto-rubriko enhavis 35 diversajn informojn, dum 1937-a 47, dum 1938-a 29. Same daŭras la eluzo de tradukoj el *Interligilo* kaj cetera per-esperante ricevata fakmaterialo en eksterlanda kroniko de la revuo.

Prizorganto de Esperanto-laboro ĉe la revuo por rekom-penci siajn alilandajn korespondantojn depost 1937-a jaro provizas ilin per fakinformoj el Latvujo. La represoj de tiuj novaĵoj en alilanda nacilingva faggazetaro estas menciataj en Esperanto-rubriko de *P.t. Dzive*. Ankaŭ tiu laboro sukcesas—dum 1937-a jaro en 5 Eŭropaj kaj 1 ekster-eŭropa landoj aperis 54 artikoloj, pli malpli ampleksaj, el ili 4 ilustritaj. Dum 1938-a jaro peresperante liveritajn faknovaĵojn krom la nomitaj, eluzis ankoraŭ 2 pliaj Eŭropaj landoj, aperigintaj 60 artikolojn, el tiuj 1 ilustritan.

Fine, la fakasocia estraro subvenciis la eldonon de speciala Interligilo-numero por baltaj landoj kaj liveris ampleksan artikolon pri sia laboro kaj la kliŝojn por la ilustraĵoj. La tradukoj el latva parto de tiu numero aperis en nacilingvaj fakrevuoj de 5 landoj.

Per sia rilato al Esperanta la fakasocio de Latvaj P.T.T.-istoj provas, ke praktika uzado de la lingvo valoras pli, ol flamaj rezolucioj, restantaj plej ofte sen ia plenumo. La alilandaj kolegoj esperantistaj plenumu sian devon—per abunda kunlaboro pruvu, ke la favoro de fakasocio al Esperanto ne estas vana, sed vekas amikan reĉhon kaj interesigon pri Latvujo kaj ties P.T.T.-istaro. Ĉiujn informojn pri latva P.T.T. volonte liveras nia F.D. en Valmiera.

Ed. D.

LITOVUJO

Jen mallonga raporto pri Esperanto-movado en Litovujo dum 1938.

Morto.—La 19an de Februaro 1938 mortis nia Esperanto-pioniro Prof. Prel. A. Dombrovski, Lingva-Komitatano, Honora Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, verkisto, poeto, scienculo. En lia persono litova esperantistaro perdis ne nur plej efikan protektanton de Esperanto, sed ankaŭ Esperanto-poeton kaj verkiston. Ripozu li en paco.

Partopreno en Konferencoj.—Litova Esperanto-Asocio partoprenis 30an Universalan Kongreson de Esperanto en Londono, kie dank' al klopodo de S-ano L. Alseika, estis reprezentita Agrikultura Ministro de Litovujo.

La 16—19 de junio 1938 en Riga (Latvujo) okazis tiel nomata Balta Semajno, ĉiujare aranĝata de societoj por estona-latva-litova unuiĝo. Inter naŭ ĝiaj sekcioj nunjare

estis ankaŭ esperantista sekcio, kiu dank' al foresto de lingvaj malhelplatoj estis tre sukcesa kaj efika por neesperantistaj sekcioj. Estis faritaj gravaj decidoj.

Internacia tendaro por Instruistoj okazis en litova banurbso Palanga same kiel dum pasintaj jaroj. Pri venontsometra tendaro informas Palaco de Korpa Kulturo (Adr. Kuno Kulturos Rumai, Kaunas, Litovujo).

Esperanto Gazeto daŭre aperas. Bedaŭrinde ĝi tuŝas politikajn aferojn kaj per tio deflankiĝas de la ĝenerala deziro esti neŭtrala. Aperis jenaj specialaj numeroj: (1) 20-jara jubileo de Litovujo, (2) Prof. Prel. A. Dombrovski, (3) Kaunas, (4) 20-jara jubileo de Latvujo.

Novaj Libroj.—Dum 1938-jaro en Litovujo aperis jenaj Esperanto-libroj: (1) P. Lapiene, *El Litova Poezio*—tradukoj de litovaj popolkantoj kaj liriko (196 pĝ.), (2) B. Giedra, *Violetoj*—elektitaj versoj (64 pĝ.), (3) J. Audronis, *Tarptautine Esperanto Kalba*—Esperanto lernolibro (92 pĝ.). Jam estas preparataj jenaj libroj: (4) Pr. Enskaitis, *Historia skizo de Esperanto-movado en Litovujo*. (5) *Litovujo dum 1918-1938*. (6) B. Giedra k.a. *Litova Esperanto vortaro*.

Radio.—Tutan jaron regule funkciis en Radio-Kaunas (ondo 1935) Nia Anguleto, gvidata de S-ano A. Poška. Disaŭdigoj okazas ĉiumarde je la 21.25—21.40 h. (M.E.T.). La 16 de Februaro, dum litova nacia festo estis organizita internacia relajo de la jubilea koncerto. Oficialaj informoj estis donitaj en litova kaj Esperanto. La 15 de marto okazis vespero de litova popola kanto kaj muziko esperantlingve.

Esperanto-Muzeo daŭre funkcias, ricevante el la tuta mondo diversajn valorajn esperantaĵojn. (Adr. Ĉ. Liutikas, Šiauliai, Litovujo.)

B.G.

ST. NIKLAAS (Waes.) BELGUJO

Apoteko DE POORTERE, Groote Markt, Pudroj de la "Roza Kruco" kontraŭ ĉia doloro. Rapida kaj certa agado. Sendanĝera. Provo ĝin pruvos.

Hôtel du Miroir, Grand' Place. Unuaranga hotelo, 40 ĉambroj, centra hejtado, fluanto akvo, lifto. Bonfama kuirado. Tel. 122 and 729.

NEDERLANDO

Oni ne povas diri, ke la pasinta jaro estis favora al la movado en nia lando. La minacinta mondmilito, ĝuste en la monatoj Septembro kaj Oktobro, forte influis la propagandan laboron kaj kaŭzis la ekziĝojn de multaj membroj. El tio sekvas, ke la nombro da organizitaj esperantistoj en la plej gravaj asocioj restis proksimume egala al la antaŭa jaro. Krom tio ni devas konsideri la faktan en nia lando, ke la multjara propagando jam tiel disvastigis la valoron de Esperanto ĉe la publiko, ke ni iom post iom konstatas, ke tiuj personoj, kiuj vere interesiĝas pri nia idealo, jam konatiĝis kun nia movado. La ceterajn homojn ni akiros nur, se la registaro kaj la oficialaj instancoj enkondukos la instruadon en la diversaj lernejoj. Jam dum kelkaj jaroj oni prikonsideris tiun staton kaj decidis al la starigo de oficejo "Esperanto ĉe la Instruado," en kiu kunlaboras la gravaj asocioj. Komprenoble la laboro estas malfacila en la nuna tempo; tamen la unua granda alvoko al la publiko, manifestacii por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, estis granda sukceso. Post nur mallonga tempo de diskonigo amasiĝis en Hago je la 5a de novembro preskaŭ 1,500 personoj, kiuj ĉiuj aplaude dankis la parolintajn aŭtoritatulojn, kiuj pledis por la oficiala akcepto de nia lingvo. Ni nun esperas, ke aliaj landoj sekvos tiun ekzemplon, ĉar nur tiel ni povos rapidigi la aferon. Cetere estas notinda fakto, ke unu el la sufiĉe gravaj politikaj partioj en sia jarkunveno oficiale akceptis la proponon insisti ĉe la registaro pri enkonduko de Esperanto kiel fakultativa fakto en la plej altaj klasoj de la unuagradaj lernejoj post la 6a kursjaro.

Ankaŭ la infanoj en diversaj lokoj sekvas Esperanto-kursojn; ĉiujare ni ja notas pli da tiaj kursoj. La malfacilaĵo estas, ke tiuj junaj esperantistoj malfacile povas interrilati kun eksterlandaj amiketoj, ĉar nur malmultaj landoj starigas infankursojn. Tiu flanko de nia movado tamen estas tre grava, ĉar la junuloj formas ja la estontan generacion esperantistan, kiu devos daŭrigi la laboron de la nunaj batalantoj. Ni do nepre instigas la eksterlandajn asociojn labori en la sama direkto.

P.M.

NORVEGUJO

Ankaŭ dum 1938 la Esperanto-movado progresis en Norvegujo, kion montras i. a. la fakto ke N.E.L., kvankam gajninte la internacian konkurson de I.E.L. 1937, en 1938 konkeris la 8an lokon en la vico de landoj, per 133,8%.

Ĉe la jarfino N.E.L. havas 36 klubojn kontraŭ 30 en 1937, kaj 35 izolajn membrojn, entute proksimume 650 membrojn. Krom tio ekzistas kelkaj ne aliĝintaj kluboj, kun proksimume 75 membroj. En la Okcidenta kaj Norda partoj de la lando la lokaj kluboj fondis distriktajn organizaĵojn de N.E.L., por igi la laboradon por Esperanto pli efika en la koncernaj regionoj.

La organo de N.E.L., *Esperantobladet*, redaktata de F-ino Līv Sandberg, regule aperadas. Pro zorga administrado ĝia ekonomia stato estas tre bona.

Kiel in 1937, tiel ankaŭ en 1938 N.E.L. aranĝis konkurson inter siaj aliĝintaj kluboj, kun regularo simila al tiu de la internacia konkurso de I.E.L. Ni kredas ke ĝi ankaŭ ĉi-jare estis stimulo por la laborado de la kluboj. La konkurson gajnis "Ålesund Esperantoklubb" per 258,3% de la stato en 1937. La dua en la vico estis Esperantoklubo "La Eko," Holmestrand: 244,4%. Por 1939 ni denove planis similan konkurson.

Dum Novembro kaj Decembro vizitis nian landon la negro Kola Ajayi, kiu faris lumbildparoladojn en pluraj lokoj, kaj estis intervjuata en la ŝtata radio. Li faris konsiderindan propagandon. La prelegvojaĝon planis kaj aranĝis S-ro C. Stop-Bowitz, la ĝenerala sekretario de N.E.L. Oni ankaŭ komencis prepari prelegvojaĝon de S-ro H. Seppik el Estonujo por la printempo 1939.

La **Korespondan kurson** gvidas F-ino Rosa Bye.

Librokomerco kaj eldonado.—La Librofako de N.E.L., kiun estras S-ro Gustav Johannessen, kiel kutime prizorgis la plej grandan parton de la Esperanta librovendado en Norvegujo, ĉu per lokaj reprezentantoj en la kluboj, ĉu per la librovendistoj. Kiel en la tuta mondo, la librovendado dum la lasta duonjaro pro la internaciaj krizoj politikaj grave malgrandiĝis. N.E.L. eldonis duan eldonon de la elementa lernolibro de Seppik kaj Malmgren, kaj tradukon de la amromano de Knut Hamsun *Victoria*, faritan de S-ro Olav Rygg.

Biblioteko.—La Esperanto-biblioteko de Norvega Esperantista Ligo estas la sola neprivata en la nordaj landoj, kaj tial ĝi estos ne malgrava. Bedaŭrinde ĝiaj kolektoj por la tempo 1914-1935 ne estas kompletaj, kaj ĝi volonte akceptos donacojn de libroj kaj de gazetkolektoj. Bibliotekisto estas S-ro S. Knutsen, Skappelsgt. 1, Hamar.

La **Ekzamena Komisiono** sub prezido de S-ro R. Bugge Paulsen, kaj lokaj subkomisionoj en diversaj partoj de la lando, aranĝas elementan kaj superan ekzamenojn.

Oni klopodas igi la membrojn en pli granda nombro fari ekzamenojn.

Propagando kaj Studlaboro

Ĝeneralaj spertoj kaj atenta studo pri la evoluo de la movado en Norvegujo montras, ke, por sukcese kaj honeste propagandi, necesas ne nur la teknika aparato kaj la materiaj rimedoj, sed ankaŭ, —kaj eble eĉ pli— necesas solida kaj vasta kvalita bazo ĉe la esperantistoj mem. Post prelego pri tiu temo de la propagandestro, S-ro Arnfinn Jensson, la jarkunveno decidis ke oni atentu pli multe la kvaliton, kaj ke elementaj kursoj en Esperanto okazu nur, se oni povas certigi postan daŭrigan instruadon. Oni nome povas statistike montri, ke tro granda procentaĵo de la novaj ĝesperantistoj neniel daŭrigas la studadon. Studoj montras ke la kaŭzo grandparte estas malatento pri la serioza lingva bazo de esperantisteco.

Kursoj.—Dum 1938 okazis 30 elementaj kursoj kun proksimume 600 lernantoj, kontraŭ 1,000 antaŭan jaron. Sama nombro kiel en 1937 partoprenis daŭrigajn kursojn, nome 100, kaj do estas proporcia pliboniĝo.

Studlaboro.—En Septembro oni dissendis studgvidilon al la kluboj, kaj fondiĝis ne malmultaj studrondoj. Tiel pli granda parto ol antaŭe de la membraro de N.E.L. partoprenas seriozan studadon. Nombroj kaj aliaj rezultoj estos havigeblaj nur post fino de la studsezono. Ĝenerale oni havas la impreson, ke tiu iniciato bone efikas. La studgvidilon verkis S-ro Alf Hasle, Sandefjord.

Gazetaro.—La sinteno de tiu ĉi estas kiel kutime favora. Atakoj kontraŭ Esperanto ne aperis. La Gazetara Komitato—prezidanto: S-ro Arnfinn Jensson—registris pli ol 2,400 aperigojn en 200 taggazetoj kaj revuoj, kontraŭ iom pli ol 2,000 lastan jaron. Pro la multaj internaciaj politikaj krizoj la nombro estas malpli granda ol ĝi estus sub pli normalaj cirkonstancoj. Pli ol alia propagando, la per-gazetara propagando popularigas nian lingvon en ĉiuj medioj, ĉar fakte ni nun atingas preskaŭ ĉiun hejmon en Norvegujo per niaj sciigoj. Tiel la grundo estas preparita por aliaj propagandmetodoj poste.

La Ŝtata Radio okazigis 6 dissendojn en kaj pri Esperanto, kontraŭ 7 lastjare. Kiel kutime la radiogazetoj montras bonan intereson por nia lingvo. Radio-komisiulo estas S-ro R. Bugge Paulsen.

Skoltismo.—S-ro John Berggreen, norvega ĉefagento de S.E.L. kaj komisiulo de N.E.L. por skoltismo, sukcese laboras.

Turismo.—Esperanta Turista Komisiono aranĝis norvegan karavanon al la 30a U.K. en Londono. Krome ĝi kune kun la komisiulo de N.E.L. por turismo, F-ino Liv Sandberg, faris propagandon por Esperanto ĉe la turismaj organizoj. Ĝi farigis lumbildserion sur normalformata filmrubando pri Oslo. La serio kun teksto bone taŭgas por klubprelegoj, kaj estas sendata senpage de la Filia Oficejo de I.E.L. (en Stockholm) aŭ de E.T.K., boks 353, Stabekk. —F-ino Sandberg krome disponigis kvanton de ĉiuj aperintaj turistbroŝuroj en Esperanto al la vojaĝoficejoj en Oslo.

La jarkunveno de N.E.L. okazos dum Pentekosto 1939 en Sauda. Ĝis tiu kunveno la estraro estas: Prezidanto: S-ro R. Bugge Paulsen; vicprez.: S-ro Arnfinn Jensson; ĝen. sek.: S-ro C. Stop-Bowitz; sek.: S-ro Olav Rygg; kas.: F-ino E. Wahl; estraranoj: S-roj G. Johannessen, Hamar; R. Rian, Trondhjem; Alfred Eriksen, Narvik.

Resumante la suprajn informojn, ni povas diri ke ankaŭ dum 1938 la progreso estis ĝenerala.

N.E.L.

Informiĝu pri la luktanta ĉina popolo per :

VOĈOJ EL ORIENTO

monata gazeto en Esperanto
kun 8 paĝoj kaj granda formato de 39 x 26 cm.

ABONO por 10 n-roj: 0.66 usona dolaro,
2 ŝil. 8 p., 24 fr. fr. aŭ 8 respondkuponoj.

★

Legu ankaŭ la aŭtentikan dokumenton pri
ekspansiaj planoj de Japanio, la broŝuron :

TANAKA MEMORANDO

ricevebla kontraŭ unu respondkupono ĉe :
**VOĈOJ EL ORIENTO, P.O. Box n-ro 1732,
Hongkong, Azio.**

aŭ

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

NOV-ZELANDO

Dum la jaro 1938 la Esperanto-movado en Nov-Zelando antaŭenmarŝis tiom forte, solide, kiom en la antaŭa jaro. Nov-Zelandaj samideanoj havas sian celon kaj laboradas por efektiviĝi tion: la enkondukon de Esperanto en ŝtatlernejojn. Dum la realiĝo de tiu celo, la Esperantistaro disvastigas laŭpove la lingvon, edukas la ĝeneralan publikon pri internacia lingvo kaj ties utilego, kaj ĝin uzas praktike. La rezulto estas ke Esperanto floras bone kaj libere en ĉi tiu lando, kiu, en la internacia konkurso pasintjara, okupis la kvinan lokon.

La jaron 1938, la deka de N.Z.E.A. agado, vidiĝis la enkonduko de Esperanto en alian lernejon (la Distrikta Altlernejo ĉe Granity) kaj la daŭrigo de lecionoj en lernejoj kaj kolegioj ĉe Palmerston North, Wellington, kaj Shag Point. Aldone, stariĝis klaso (46 studentoj) en la Kolegio por Ŝtat-instruistoj, ĉe Wellington. Alia tre forta klubo (40 geanoj) fondiĝis en la ĉefurbo, Wellington, (en kies ĉirkaŭaĵoj jam funkciadas du aliaj tre viglaj kluboj) kaj nova klaso komencis ĉe Auckland sub aŭspicioj de Laboristara Eduka Asocio (W.E.A.).

Okazis ĉe Christchurch la 8a Nov-Zelanda Kongreso kun brila sukceso, laŭ nombro da partoprenantoj, laboro kaj financo. Gravaj decidoj kongresaj rilatis al filiigo kun I.E.L. kaj la prezento de certaj resolucioj al ŝtatministroj. La 9a Kongreso okazos ĉe Wellington dum Nov-jaro, 1939.

La N.Z.E.A., la sola landa asocio, fortiĝis laŭ membraro: 153 pagintaj geanoj aliĝis, plus 16 honoraj (sukcesintoj ĉe N.Z.E.A. Traduka Provo, 1937), kompare 131 kaj 20 respektive, antaŭjaron. La asocio perdis per morto veran turon—S-ro E. C. Jack, N.Z.E.A. honora kasisto de post 1929, kaj tre diligenta laboranto. Finance, la N.Z.E.A. estas forta, la agkomitato ne havante ian klopodon aŭ koncernon tiurilate.

Multaj artikoloj—kredeble kelkcentoj—pri Esperanto aperis en tagjurnaloj en diversaj partoj de la lando. Kontentige estas legi por la unua fojo dum kelkaj jaroj mallongan raporton pri la 30a Universala Kongreso en Londono.

Sur la internacia kampo, N.Z.E.A. kunlaboris kiel eble plej multe: raportoj kaj informo al B.E.A., I.E.L., U.E.A., kaj *Heroldo*, kaj multaj petoj kaj demandoj de individuoj kaj organizadoj transmaraj estis priatentitaj. I.E.L. aferojn speciale prilaboras ĉefdelegito, ses D, unu VD, kaj sep FD.

La tut-Esperanta gazeto *La Interna Ideo* tenadas forte sian lokon inter la Nov-Zelanda verdstelanaro, post trijara eldono.

Resume, do, oni povas kontentiĝi pri tio, ke nia lingvo en Nov-Zelando vivas kaj progresas kaj ke nia lando formas unu el la ĉeneroj en la granda internacia ĉeno. Esperoj por la progreso de Esperanto dum venontaj tri jaroj estas brilaj, ĉar re-elektiĝis la 15an de Oktobro Laboristara Registaro, kiu jam montris sin favora al nia kara lingvo.

W.H.K.

PAPUO

La Esperanta movado en Papuo estas reprezentata de la delegito de I.E.L. kiu estas vere la sola Esperantisto vivante tie konstante.

La Eŭropa loĝantaro de Papuo estas tre malgranda, proksimume nur 1,500, kaj ĝi estas ankaŭ tre disvastigita. La klimato estas tropika, kaj la varmeco kaj la izoleco de la Teritorio ne nutras la studadon.

Tamen, la delegito faras multe da alilanda propagando. Li donas Esperantan literaturon al personoj en preskaŭ ĉiuj landoj, kaj li daŭrigas grandan korespondadon tra la mondo.

F.J.W.

POLUJO

La Esperanto-movado en ĝia naskolando stagnas. Tamen en kelkaj lokoj sentiĝis ioma plivigliĝo; aliloke malaktivaj aŭ nur surpapere ekzistantaj rondetoj aŭ grupoj malfondiĝis. Tiamaniere kreskas nombro de neorganizitaj esperantistoj, kiuj emas al kunvivo kaj fariĝas do iom post iom individuaj membroj de I.E.L. Landa Esperanto-Kongreso okazis pentekoste en Krakow kaj kunvenigis kvindekda plej fervoraj esperantistoj el diversaj urboj. Tamen malgraŭ la granda interesiĝo kaj vicleco en debatoj, la kongreson ne sekvis realigo de deciditaj resolucioj. Disdivido de ekzistantaj Esperanto-grupoj sur nacia grundo restas kaj eĉ iom kreskis influite de ekstere.

Pola Esperanto-Delegitaro—ĉeforganizo esperanta—prezidata de konata Prof. Odo Bujwid, kiu bedaŭrinde pro sanstato ne partoprenis Universalan Kongreson en Londono—penas kunlabori kun societoj kaj izoluloj, sed ŝajne kun malgranda rezulto. Ĝiaj financoj plue lamas, kiel tiuj de preskaŭ ĉiuj Esperanto-societoj.

Plej grandaj fokusoj de Esperanto-Movado restas Kraków, Warszawa, Lublin, Wilno, Białystok, Lwów kaj Bydgoszcz ; en kelkaj el ili movado tamen iom malvigligiĝis ; kontraŭe en aliaj plivigligiĝis.

En Biala Podlaska bone ekĝermis la movado per Esperanto Ekspozicio aranĝita de delegito de I.E.L., S-ro Stalewski.

Rimarkinde estas, ke ĝenerale en lokoj, kie ekzistas Esperanto-grupoj—malgraŭ ĝrandanda ilia aktiveco—estas relative malgranda inklino al internacia organiziĝo, kontraŭe izoluloj pli kaj pli aliĝas al I.E.L., sentante, ke en ĝiaj kadroj ili trovas fortan bazon.

La Universalan Kongreson de Esperanto en London povis ĉesti bedaŭrinde nur malmultaj poĵoj, inter ili reprezentanto de la Jubilea Kongreso.

M.Ch.

PORTUGALUJO

En la ĵurnaloj *O Diabo* kaj *Vida Social* aperis kelkaj artikoloj pri Esperanto, fakto kiu montras ke la cenzuro estas pli cedema kaj la registaro malpli acidhumora. Tamen la grupoj malaperis, la kursoj disiĝis kaj la perradiaj paroladoj silentis. Oni povas nur mencii la laboron de la Delegitaro de I.E.L.

Malgraŭ tio kaj ĉio, la ideo vivas latentata en la portugala Esperantujo en atendo de pli favoraj tagoj. La telefono de la Ĉef-Delegitejo de I.E.L. ofte sonoras pri klarigoj kaj demandoj, kiuj montras ankaŭ ke la ĝenerala intereso al Esperanto ne malaperis ; kontraŭe oni rimarkas eble pli grandan simpatian al la afero ol en la lasta ĵaro, precipe inter la intelektuloj.

Oni komencas en Portugalujo kompreni ke ĉiuj esperantistoj devas labori private, iom post iom pliampleksiĝi la paceman falangon, por kiam la ekstera forto de la movado devigos la portugalan registaron akcepti, nepre akcepti kiel fakton, la adopton de la helpa internacia lingvo.

S.C.

SIAMO

La movado en Siam estas tre malforta, ĉar la propagando ne tre sukcesas allogi la homojn. La movado havas du flankojn : unu rilatas al la indiĝenaj Siamanoj kaj alia al la Ĉinaj enmigrintoj. La lingvoscio de la studentoj ne estas tre granda, kvankam ili lernas de iu, kiu studis en Eŭropo, sed oni klopodas pliboniĝi.

Je la 1a de Januaro 1938 okazis unuafoje Esperanto-ekspozicio en Bankoko, kio ricevis favoran kritikon, kvankam la materialo estis malmulta. En la ĉefurbo Bankoko oni fondis asocion de Ĉinaj enmigrintoj, sed ĝi ne havas fiksan adreson. Tie kelkdekoj da lernantoj studis nian lingvon, sed ilia scio estas malprofunda kaj ili ne korespondas kun eksterlandaj samideanoj. La asocio havas eldonajn, nomita "Esperanto," presita Ĉinlingve, kio enhavas artikolojn, tradukaĵojn, novaĵojn pri la tutmonda Esperanto-movado, kaj adresojn de eksterlandaj samidean(in)oj, kiuj volas korespondi.

Resume la movado en ĉi tiu lando estas malprogresata, kaj la asocio estas malriĉa, ĉar ĝi estas subtenata de nur kelkaj malriĉaj instruistoj.

C.C.W.

SUD-AFRIKO

Pro la vasta uzo de la angla lingvo en preskaŭ ĉiu el la sud-kontinentaj landoj, ankaŭ en Sud-Afriko oni ne favoras universalan artefaritan lingvon. Sed plejparte oni ankaŭ nenion scias pri Esperanto. La gazetaro plej ofte rifuzas publikigi novaĵojn pri nia movado.

Tamen 1938 vidis iom da propagandlaboro. Minimume okfoje aperis longaj artikoloj (dufoje ilustritaj) en diversaj afriklingvaj kaj anglalingvaj gazetoj, tagaj kaj semajnaj. Krome mi rimarkis malmultajn mallongajn raportoĵojn. La plej bona sukceso estis, ke oni por la unua fojo disaŭdigis per la radio paroladojn pri Esperanto. La nombro estis ses en 1938, kaj la serio estas finota ĉijare per pliaj tri prelegoj. Ne ankoraŭ estas tempo por fondi landan asocion, sed estas tre necesega, ke la gesamideanoj havu ian "tribunan," ian kontakton per propra gazeto aŭ nura monata bulteno.

J.S.

SVEDUJO

Membronombro.—La membronombro de S.E.F. estas 2,000. Al la Federacio apartenas 90 kluboj.

Esperanto-Semajno. — Inter la 25.IX — 1.X estis organizita "Esperanto semajno" en la tuta Svedujo. Al ĉiuj kluboj estis dissenditaj specialaj cirkuleroj. Esperanto-ekspozicioj estis aranĝitaj, artikoloj pri Esperanto enpresigitaj en lokaj gazetoj, amuzaj vesperoj publikaj aranĝitaj, reklamfolioj al bibliotekoj, kafejoj k.t.p., distribuitaj. Reklamo por Esperantokursoj estis farita kaj Esperanto-libroj venditaj.

Korespondaj kursoj.—950 komencantoj studis dum la jaro la komencan korespondan kurson, kaj 89 estis studentaj la novan daŭrigan kurson.

Eksterlandaj instruistoj.—En la jaro S-ino Erika Seppik, Estonujo, kaj S-roj Fr. Szilagyí, Hungarujo, kaj T. Morariu, Rumanujo, faris kursojn kaj prelegis en nia lando.

Prelegvojaĝoj estis aranĝitaj por S-ro Seppik, Estonujo, kaj S-roj Morariu kaj Szilagyí.

Enlanda gazetaro.—Pli ol 100 svedaj gazetoj ricevas regule informojn pri Esperanton. 100 gazetoj enpresigis Esperantan kurson komencan kaj ĉ.25 daŭrigan kurson. La skolta gazeto ankaŭ enhavis kurson.

Ekspozicio.—“La fluganta ekspozicio” de S.E.F. ankaŭ dum 1938 migris inter la svedaj kluboj.

Teatraĵoj.—S-ro Malmgren, la estro de la filia oficejo de I.E.L., eldonis kelkajn teatraĵojn.

Esperanto gazeto.—La Sveda Esperanto-gazeto aperas ĉiunonate kun ĉ. 3,000 ekz.

Librovendado.—Eldona Societo-Esperanto vendas librojn por ĉ. 20,000 sved. kr. Kelkaj novaj tre valoraj libroj aperis dum la jaro, i.a. nova traduko de verko de Selma Lagerlöf.

Ekzamenoj.—La Sveda Esperanto-Instituto ekzamenis 15 personojn por la Supera kaj 96 por la Elementa ekzamenoj.

Turistvojaĝoj.—Esperanta Turista Komisiono havas reprezentantojn en 55 lokoj en la lando. Jenaj grupvojaĝoj estis aranĝitaj: 1. Al Anglujo, kaŭze de la Esperanto-kongreso, ses ekskursoj: Tri laŭ Gotenburgo-Londono, du laŭ Malmo-Kopenhago-Londono, kaj unu laŭ Trelleborg-Hoek-Londono, sume 111 partoprenantoj. 2. Al Estonujo (Tallinn kaj Pärnu) plurajn turistvojaĝojn. Entute partoprenis 173 personoj. Estona E.T.K. siavice aranĝis 5 ekskursojn por estonoj, kaj la sveda E.T.K. prizorgis la gvidadon. 3. Al Finnlando (Turku kaj Helsinko) kun 13 personoj.

Estraro de S.E.F.—Prezidanto: Red. Paul Nylén; Vicprez.: Rektoro Sam Jansson; Sekr.: Instruisto Ernfrid Malmgren; Vicekr.: Instruisto Verner Hägglund; Kasisto: Oficisto Sven Bolin; kaj la ĉefdelegito de Svedujo, Ing. K. Wästfelt. Anstataŭantoj: Red. Henning Halldor kaj la Oficisto Ernst Juneby.

V.H.

KOMERCA VORTARO EN ESPERANTO
de
Robert Kreuz, L.K., kaj Alessandro Mazzolini, L.K.
100 paĝoj—bind.: 1\$. 6p.—broŝ.: 1\$.—afranko 1p.

★

BONAĴ LIBROJ POR KURSLEGADO

ALEGORIOJ EL LA NATURO
de
Margaret Gatty

el la angla lingvo tradukis George Gordon.
65 paĝoj—broŝ.: 3p.—afranko 1p.

★

OK NOVELOJ

de
Arnold Bennett
(fama angla verkisto)
tradukis Alfred E. Wackrill.

120 paĝoj—broŝ.: 6p.—afranko 1p.

★

HISTORIA DOKUMENTO!

ORA NUMERO

de
“THE BRITISH ESPERANTIST.”

Brila resumo, plejparte en Esperanto, de la progreso de Esperanto dum la unuaj 50 jaroj.

48 paĝoj—Ora Kovrilo—prezo: 3p.—afranko 1p.

Mendu ĉe

BRITISH ESPERANTO
ASSOCIATION INC.

142 High Holborn, London, W.C.1

(1 respondkupono valoras 2½p.)

KUNLABORANTAJ FAKAJ ASOCIOJ

La devizo de I.E.L. estas "Unueco estas Forto." Pretigante la statuton de la Ligo, la komitato faris eblecojn por la kunagado de ĉiuj sekcioj de la movado, ĉar ĝi bone scias ke tia rezulto, se atingebla, multe helpos al la fina venko.

I.E.L. nun havas kontraktojn pri kunlaboro kun la jenaj fakaj asocioj:

1. Neŭtralaj.
 - Denaska Esperantistaro (D.E.).
 - Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj (I.S.E.J.).
 - Skolta Esperantista Ligo (S.E.L.).
 - Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (T.A.G.E.).
 - Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (T.E.K.A.).

Tiuj interkonsentoj estas faritaj laŭ par. 13 de la Statuto, kaj niaj Ĉefdelegitoj kaj Perantoj akceptos kotizojn por tiuj asocioj, se ili ne havas oficejon aŭ agenton en la koncerna lando.

2. Neneŭtrala.
 - Kvakera Esperantista Societo (K.E.S.).
- Tiu interkonsento estas farita laŭ par. 14 de la Statuto.

Ĉar ni opinias, ke forta faka movado povas multe helpi al la progreso de Esperanto, ni rekomendas al nia membraro aliĝi al tiuj asocioj pri kiuj ili interesiĝas. Ni volonte faros similajn interkonsentojn kun aliaj fakaj asocioj, kiuj estas petataj interrilati kun nia Centra Oficejo tiucele.

DENASKA ESPERANTISTARO

Ĝia Koncepto Kaj Funkciado

Bonaj Esperantistaj gepatroj kompreneble volas ke la novnaskito iĝu Esperantisto — iam. Ili kvazaŭ dediĉas ĝin al la idealo. Sed alvenas en la vivon aliaj aferoj: dommastrumado, taglaboro, aliaj geidoj. La Esperantema

edukado devas plimalpli flankenmetiĝi. La infano laŭnature ensorbis la nacian lingvon; la nia estas lasata "ĝis bona okazo"; eble por nia ŝafaro la infano estos perdita.

La celo de "D.E." estas instigi gepatrojn, kiel eble plej baldaŭ post la naskiĝo, (le) dediĉi la infanon al nia Movado: (2c) eduki ĝin tiel ke ĝi estigu *dulingvano* de la komenco de ĝia lingvokapableco, kiel "Laŭnaturo Esperantisto."

Por subteni kaj helpi la gepatrojn, "D.E." nomos (aŭ la gepatroj mem nomos, kaj "D.E." akceptos) bonvolan Esperantistan infanamantinon kiel "Onklinon." Per de-tempo-al-tempo "gardaĝela" vizito ŝi influos (kvazaŭ Baptopatrine) la Esperantistojn de la infano, kaj la daŭrigon de la fideleco de la gepatroj. Pere de ŝi la infano konstatos ke inter la cirkaŭuloj nacilingvaj estas ankaŭ Esperantistoj, kaj ĝi intuicie uzos nian lingvon "por plaĉi al la Onklino."

Enirante lernejan vivon, la infano "semos la ĝermon" inter siaj kunuloj kaj instruistoj. Ĝi tiel edukigiu antaŭe, ke ĝi modeste fieru pri lingvo, kiu estas parolata de noblanimaj kaj kleraj homoj tra la tuta mondo.

"D.E." celos interkonatigi infanojn kaj junulojn internacie, kaj ĝi estas preta kunlabori kun aliaj institucioj samcelaj. Ankaŭ, laŭ siaj rimedoj, ĝi esperas helpi publikigii libretojn taŭgajn por infanoj, kaj helpi al ilia edukado per interŝanĝo de spertoj kaj helpaj sugestoj.

La plena celo de "D.E." estas kreigi novajn generaciojn de "Laŭnaturaj Esperantistoj" de naskiĝo, kiuj eniros la mondon kiel "Promenantaj Propagandiloj."

Kotizoj: Por infanoj ĝis lernejaraj-0.50 sv.fr. Por pli aĝaj kaj helpmembroj—laŭvole.

Onklinej estas bezonataj ĉie en la mondo. Skribu poŝtkarte por plena informo.

Brita Korespondanto: S-ino J. W. Neal, 48 Elvendon Road, London, N.22.

Korespondas alilande: S-ro Robert Robertson, F.B.E.A., 228 Alexandra Park Road, London, N.22, Anglujo.

I.S.E.J.

Dum la dua Universala Kongreso de Esperanto en Genève oni fondis "Internacian Societon de l'Esperantistoj Juristoj (I.S.E.J.). Kiel prezidanto estis elektata S-ano Michaux, advokato en Boulogne, kaj kiel ĝen.-sek. S-ano Sergeant, advokato samloke. La nomaro de la jaro 1908 enhavis ĉ. 120 adresojn, inter kiuj ankaŭ tiun de S-ano Paul Degon, kiu fariĝis poste ĝen. sekretario. Li

raportis en 1910 al la ĝenerala kunveno, ke la societo kreskis per 39 novaj anoj, kaj ke la organo de la societo fariĝis *La Revuo*, tre gastame akceptante priurajn artikolojn. Oni laboris tiam en tri fakoj: S-ano Laigner, advokato en Reims, prezidis la vortaran fakon; S-ano de Laparte estis la redakcia sekretario kaj prizorgis la presajojn; fine S-ano Degon plenumis la administradon kaj propagandon.

Bedaŭrinde la milito ĉesigis la agadon de la societo. Post la milito oni devis rekomenci, rekollekti la anojn. Kiel unua klopodis revigligi la societon S-ano J. Litauer, advokato en Varsovio. Samtempe D-ro Liebeck, advokato en Berlino, publikigis alvokon en *Esperanto Triumfonta* (nuna *Heroldo de Esperanto*). Kolektiĝis la interesatoj. Iliaj nomoj estis publikigataj en *Heroldo* kune kun invito al partopreno en faka kunsido en Ĝeneva Kongreso 1925. Tie la malnova I.S.E.J. estis restarigata, kun S-ano Michaux reelektata kiel prezidanto. Kiel gen. sekretarioj estis elektataj S-anoj Litauer kaj Liebeck. Kunsidoj okazis poste en Edinburgh, Danzig, Kraków, fine en 1937 en Varsovio, kie oni elektis kiel prezidanton S-ron J. Cousteaux (Parizo), kiu poste rezignis proponante anstataŭ si S-ron Adv. Dronchat, ankaŭ el Parizo. Kiel sekretario-kasisto estis elektata D-ro Leopold Dreher, advokato en Krakow, kiu surprenis verki juristan terminaron esperanto-esperantan.

En tiu tempo la agado de I.S.E.J. estis respegulata en sufiĉe vigla maniero sur la paĝoj de *Nia Gazeto*, kiu, dank' al la bonvolemo de ĝia redaktoro S-ro Avril, enhavis konstantan "Juran Fakon," redaktatan de la sekretario de I.S.E.J.

Nun por la jaroj 1939-40 la celo de I.S.E.J. estos, krom kutimaj laboroj (pretigado de adresaro de juristoj esperantistaj por praktikaj celoj, por ebligi aferajn rilatojn inter la anoj k.a.) pridiskuti definitivajn formojn de juristaj esprimoj en Esperanto, kies manko estas grava malhelpo en la antaŭenirado de Esperanto en la faka medio. La diskutado okazos pere de la oficialaj organoj de I.S.E.J., kiaj fariĝis, dank' al interkonsento kun I.E.L., ties gazetoj *Heroldo de Esperanto* kaj *Esperanto Internacia*.

La adreso de la sek.-kasisto estas: Advokato D-ro L. Dreher, Kraków, Polujo, Zwierzyniecka str. 9. La kotizon (1.0 sv. fr. jare) akceptas ankaŭ la Ĉefdelegitoj kaj Perantoj de I.E.L.

Ĉiuj juristoj-esperantistoj estas petataj kunlabori. En kio konsistas la kunlaboro? Unue, kompreneble, estas la devo de ĉiu jur.-esperantisto aliĝi. La kotizo estas ja

preskaŭ neniuma! Due, ĉiu povas helpi, verkante artikolojn priurajn: sendante ilin al la sekretario de I.S.E.J., kiu zorgos pri unuecigo de la jura lingvo en Esperanto, antaŭ publikigo en la organoj. En la daŭro de la du jaroj 1939-40 la asocio devas esti nepre restarigata por atingi almenaŭ la staton antaŭmilitan. Trie, bonvolu atente legadi la oficialajn gazetojn, kie aperos jurista terminaro esp.-esperanta: viaj kritikoj kaj rimarkigoj servos por eldoni en 1941 kompletan vortaron de juraj esprimoj en Esperanto.

SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(Fondita en 1918)

CELOJ

- 1.—Disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto.
- 2.—Disvastigi Esperanton inter ĉiulandaj skoltoj.
- 3.—Krei *skoltan* literaturon en Esperanto.
- 4.—Eldoni internacian skoltan gazeton aŭ revuon.
- 5.—Solidarigi la senton de frateco, komunan ĉe la du movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

Prezidanto: S-ro Norman Booth, komisaro.

Hon. Ĝenerala Sekretario: S-ro F. N. Blythe, eks-trupestro, 103 Leopold Road, Ipswich, Anglujo.

Hon. Kasisto: S-ro D. H. Davis, eks-trupestro, 23 East Dulwich Grove, Londono, S.E.22, Anglujo.

Londona Sekretario: S-ro H. Yarwood, rovero, 106 Glengall Road, Londono, S.E.15, Anglujo.

Kuratoroj de la Kapitalo: S-roj P. Blaise, G. D. Buchanan kaj D. H. Davis.

Oficiala organo: *Skolta Bulteno*, dumonata, tute en Esperanto, redaktata de S-ro F. Douglas Murphy, 65 Tuddenham Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo. (Telefono: 3413.)

Kotizoj: geskoltoj pli ol 18jaraj 2ŝil.
 „ malpli ol 18jaraj 1ŝil. 6p.
 aliaj 3ŝil.

Naciaj Agentoj:

Anglujo: S-ro L. S. Symes, Glenmore, Sutton Courtenay, Nr. Abingdon, Berks.

Aŭstralio: S-ro H. Tisdall, Cohuna, Victoria.

Beljujo: S-ro J. Van Gulck, Zuster Nathaliestraat 7, Ekeren, Antverpeno.

Brazilo: S-ro A. Coutes Fernandes, Rua Alice 33a, Rio de Janeiro.

Ĉeĥoslovakujo: *S-ro S. Lešinger, Vodickova 6-III., Praha II.

Ĉinujo: S-ro Chang Ching-Chin, Ta-Shin Street 27, Yunnanfu.

Danujo: S-ro Axel Gormsen, Mollevej 16, Assens.

Egiptujo: S-ro Abdu Ibrahim El Suaki, Strato Mokattam, P.O.B. 26, Port Said.

Estonujo: S-ro Karl Joost, Kungla 32, Tartu.

Francujo: S-ro Y. Tarabout, 3 Avenue du Parc, Sceaux (Seine).

Grekujo: D-rino Heleni Ikonomopulu, Odos Vosila 23, Athene.

Hispanujo: S-ro A. Pedro Marqueta, Santa Ines 4, Zaragoza.

Hungarujo: S-ro Paul Balkanyi, Budapest 507.

Irlando: S-ro F. R. A. McCormick, 5 Mount Eden Road, Donnybrook, Dublin.

Japanujo: S-ro Kikusaburo Ishii, Osaka-Nishi P.O. Box 20, Osaka.

Jugoslavujo: S-ro Bacsa Lajos, Baĉka-Topola, Poŝta-fako 61.

Kanado: S-ro J. Scrivener, 1855, West 43rd Avenue, Vancouver, B.C.

Latvujo: S-ro V. Krauja, Brivibas, 136-3, Riga.

Litovujo: *S-ro Vyt. Maknickas, Alytus, gimnazija.

Maroko: S-ro Menahem Dodo, Benoliel 16, Tanger.

Nederlando: S-ro J. L. H. Moll, Wasstr. 2, Leiden.

Nederlanda Hindujo: S-ro J. F. Lumaye Schuld, Batu, apud Malang, Insulo Javo.

Norvegujo: S-ro John Berggreen, Prinsensgt 57, Sandefjord.

Polujo: S-ro Jozef Toczyski, Lwów, ul. Rutowskiego I. 21.

Portugalujo: S-ro A. J. de Caires, Rua do Castelo 13, Funchal, Madeira.

Rumanujo (loka agento): S-ro Santha Andrei, elev. cl. VII., Timisoaro, Cetate Lic, Piarist.

Svedujo: S-ro Borje Soderlund, Gillegatan 28, Malardhojen, Stockholm.

Svisujo: F-ino G. Merz, Falkenweg 9, Bern.

Usono: S-ro S. Martin, 1025 Neosho St., Emporia, Kansas.

SKOLTINA FAKO

Ĉefagentino: F-ino Mary C. Groen, 20 Hampton Road, Ilford, Essex, Anglujo. (Telefona: Ilford 1538).

Naciaj Agentoj:

Anglujo: F-ino Nellie Wilford, 1 Birkland Avenue, Peel Street, Nottingham.

Danujo: F-ino Agnes Gronborg, Rosenvej 8, Risskov, Aarhus.

Francujo: F-ino Mireille Tarabout, ĉe S-ro Vey, 4 Rue Pasteur, Saint Cloud (S. et O.)

Grekujo: D-rino Heleni Ikonomopulu, Odos Vosila 23, Athene.

Hungarujo: F-ino Ildiko Pap de Ders-Márefalva, 1 Var, Uri u. 4, Budapest.

Latvujo: F-ino Nina Vike, Zubisu iela Nr. 3, dz. 5, Riga.

Nederlando: S-ino M. de Boer-Brouwer, Nieuwe Brug, Ommen (Ov.).

Norvegujo: F-ino Solveig From, Louisegt. 15dII., Oslo.

Polujo: F-ino I. Chwialkowska, Lodz, Przejazd 86m 14.

Svedujo: F-ino Maja L. Eriksson, Tomtebogatan 8, IV., Stockholm.

Usono: F-ino Clarice Zerkle, 2424 Maryland Ave., H.P., Topeka, Kansas.

(S.E.L. havas ankaŭ **lokajn agentojn** en multaj urboj kaj distriktoj, kaj **sub-agentojn** en gravaj lokoj.)

* Agas provizore.

TUTMONDA ASOCIO de GEINSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ

Fondita 1924

Celo : T.A.G.E. laboras por disvastigi inter la tutmonda geinstruistaro la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu ne intrudante sin en la internan vivon de la popoloj, donos al la kolegoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝi inter si, kaj kiu povus esti enkondukata kiel paciga lingvo en la lernejojn tutmondajn.

Karaktero : La karaktero de la Asocio estas universala : nuntempe la instruista parto en la ĝenerala movado ankoraŭ ne estas tiel forta ke ĝi povos dividi sin en apartaj grupoj laŭ politiko aŭ religio. Ĉiuj tendencaj kolegoj, kiuj havas komprenon pri la vera signifo de edukado por paco kaj reciproka estimo, povos aniĝi.

Laboro :

1. T.A.G.E. eldonas pedagogian fakan revuon *Internacia Pedagogia Revuo*, kun rubrikaj pri internacia scienca pedagogio, kongresoj kaj laboroj de instruistaj organizoj, lernejoj kaj instruistaro en diversaj landoj.

2. aranĝas fakkunvenojn.

3. peradas korespondadon inter gekolegoj kaj inter gelernantoj.

4. kunlaboras kun aliaj organizoj por energie batali por enkonduko de Esperanto en la lernejojn tutmondajn.

Estraro :

Prezidanto : W. Russell Hamilton, The Grammar School, Hemsworth, nr. Pontefract (Yorks.), Anglujo.

Vic-prezidanto : P. Korte. Adreso : T.A.G.E.-oficejo, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando.

Sekretario : K. H. Sportel, Nieuw-Scheemda (Gr.), Nederlando.

Kasisto : A. van Hage, Zuidwending, Veendam, Nederlando. Poŝtekkonto N-ro 9715.

Redaktoro : D. Lehnen. Adreso : T.A.G.E.-oficejo.

Administranto : adreso : T.A.G.E.-oficejo.

Korespond-oficejo : Senpaga presado de la adresoj de kolegoj kaj lernantoj. Aldonu en la anonco : aĝo, sekso, ofico aŭ speco de lernejo, deziro. Adreso : sekretario de T.A.G.E.

Bildkartservo : Interŝanĝo de bildkartoj por instruaj celoj. Adreso : J. Hogenkamp, 2-e Exloermond-West (Dr.), Nederlando.

T.A.G.E.-biblioteko : Eldono de fak-literaturo. Adreso ĉe la redaktoro : P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando. (Kunlaborantoj serĉataj.)

Kotizo : Por aneco de T.A.G.E. kaj abono de *Internacia Pedagogia Revuo* kune po 2.50 guldenoj nederlandaj por jaro. Por individuaj membroj de I.E.L. po 2 guld. por jaro.

TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO

Fondita 1908

Celo : Disvastigi Esperanton inter kuracistoj, apotekistoj, kaj diversaj kunlaborantoj de kuracistoj. Enkonduki Esperanton en medicinajn gazetojn kaj internaciajn kongresojn.

Membraro : Kuracistoj, apotekistoj, dentkuracistoj, kiuj pagas la kotizon. Aliaj personoj, kiuj pagas la kotizon, fariĝas aprobantaj membroj. Tiuj, kiuj pagas trioblan kotizon, estas subtenantaj membroj. La Asocio ankaŭ havas dumvivajn membrojn.

Estraro :

Prezidanto : D-ro W. Robin, 5 ul Skorupki, Warszawa, Polujo.

Vic-prezidantoj : Prof. Nishi (Tokio) kaj D-ro Briquet (Lille).

Ĉefsekretario : D-ro M. Zamenhof, Str. Senatorska 36, Warszawa, Polujo.

Ĉefkasisto : Prof. Canuto (Torino).

Membroj : D-roj Fels (Lwow), Ulman (Mukaĉ), Van Becelaere (San Diego).

Gazeto : Internacia Medicina Revuo. Ĉefredaktoro : Prof. Vanverts (Lille). Redaktoro : D-ro P. Kempeneers, 19, Avenue Montjoie, Uccle 3, Belgujo. (Pro nunaj ekonomiaj cirkonstancoj, la Asocio eldonas *Bultenon* de T.E.K.A., aperantan ĉiun duan monaton.)

Kotizo : Simpla kotizo, kun abono al la gazeto : 4 anglaj ŝilingoj.

Eldonaĵoj de T.E.K.A. : Esperanta Teknika Medicina Vortaro, de D-ro Briquet. (360 paĝoj, enhavas 3675 radikojn kun derivaĵoj kaj diverslingvaj tradukoj.)

KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

Fondita, 1921

Celo: Interesigi Kvakerojn pri Esperanto, kaj antaŭenigi Mondpacon per la Lingvo Internacia.

Membraro: Anoj de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj), kaj Kunadorantoj.

Oficistoj:

Prezidanto: Charles Roden Buxton.

Vic-Prezidantoj: M. C. Butler, R. H. Crowley, C. I. Evans, M. C. Gillett, F. W. Hipsley, J. H. Lloyd, S. M. Megahy; Marie Butts (Genève); Pierre Ceresole (Gland, Vaud); Edmond Privat (Locarno); Kurt H. Schmidt (Berlin); Henry Van Etten (Paris); Fred J. Williams (Papua).

Kasisto: Ralph H. Crowley, Sewell's Orchard, Tewin, Welwyn, Herts.

Sekretario: James T. Harrod, Green Maze, Godalming, Surrey, Anglujo.

Kataluna Antologio

kompilita de

JAUME GRAU CASAS

L.K.

Verko aprobita de la Esperantista Akademio. Bonega elekto el la kataluna literaturo.

416 grandformataj pagoj

Prezo broŝ. 6ŝ.9p.

afranko 6p.



Mendu ĉe

Internacia Esperanto-Ligo

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

FAKAJ ASOCIOJ

(Tiuj presitaj per nigraj literoj havas

INTERNACIAJ

kontraktojn pri kunlaboro kun I.E.L.)

Nomo	Adreso
Budhana Ligo Esperantista	16 Grange Drive, Heswall, Cheshire, Anglujo
Denaska Esperantistaro	228 Alexandra Park Road, London, N.22, Anglujo
Internacia Esperantista Labor- komunumo por Senalkohola Kulturo	S-ro J. Poláček, Břeclav 2031, Ĉeĥio-Slovakujo
Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista	S-ro Aleš Berka, Nové Sady 49, Brno, Ĉeĥio-Slovakujo
Internacia Ligo de Kooperati- vianoj-Esperantistoj	S-ro Helge Eckerberg, Aneby, Svedujo
Internacia Scienca Asocio Esperantista	56 Rue de la Rochefoucauld, Paris 9, Francujo
Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj	D-ro L. Dreher, Zwier- zynieckastr. 9, Kraków, Polujo
Kristana Esperantista Ligo Internacia	S-ro I. E. Karlsson, Box 286, Insjön, Svedujo
Kvakera Esperantista Societo	S-ro J. T. Harrod, Green Maze, Godalming, Surrey, Anglujo
Sennacieca Asocio Tutmonda	67 Avenue Gambetta, Paris 20, Francujo
Skolta Esperantista Ligo	103 Leopold Road, Ipswich, Anglujo
Tutmonda Asocio de Gein- struistoj Esperantistaj	Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando
Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio	D-ro Robin, str. Skorupki 5, Warszawa, Polujo
Tutmonda Junular-Organizo	Lingestr. 11, Leerdam, Nederlando
Universala Asocio de Blindul- Organizaĵoj	S-ro H. Thilander, Stock- sund, Svedujo

Fon- dita	Jarkotizo	Organo (* = presita)	Nombro da anoj
Jan., 1931	Libervola	—	?
Aŭg., 1938	Infanetoj .50 sv. fr. Pliiĝuloj laŭvole. Vidu paĝon XX.	Okaza bulteno	?
1928	1 angla ŝilingo	—	?
1910	2 respondkuponoj	<i>*Espero Katolika</i> (Pahudstraat 134, Den Haag, Nederlando)	3840
Aŭg., 1938	1 angla ŝilingo	—	?
1906	laŭ la lando (en Usono 1 dolaro)	<i>*Bulteno de ISAE</i>	600
?	1 svisa franko Vidu paĝon XX.	<i>*Heroldo kaj *Esperanto Internacia</i>	?
1911	6 respondkuponoj	<i>*Dia Regno</i>	500
1922	1 angla ŝilingo Vidu paĝon XX.	Kvaronjaro Bulteno	160
1921	40 francaj fr. (kun Sennaciulo)	<i>*Sennaciulo</i>	1800
1918	Vidu paĝon XX.	<i>*Skolta Bulteno</i>	350
1924	2.50 ned. guld. (kun IPR.) Vidu paĝon XX.	<i>*Internacia Pedagogia Revuo</i>	400
1908	4 anglaj ŝilingoj (kun gazeto)	<i>*Internacia Medicina Revuo</i> (19 Ave. Montjoie, Uccle 3, Belgujo)	?
Aŭg., 1938	1 ned. guld. (kun gazeto)	<i>*La Juna Vivo</i> (West Grafdijk, NH., Nederlando)	500
1931	2 us. cendoj por ĉiu ano de fili- igita organizaĵo	<i>Esperanta Ligilo</i> (brajla) & <i>*UABO</i> (por vidantoj)	10,000 fliigitaj anoj

FAKAJ ASOCIOJ

Nomo	Adreso
Amerika Asocio por Internacia Scienco	400 N. Clinton St., Iowa City, Iowa, Usono
Brita Laborista Esperanto-Asocio	36 Womersley Road, London, N.8, Anglujo
Brita Ligo de Katolikaj Esperantistoj	S-ro H. P. Saunders, 45 Newtown Street, London, S.W.11, Anglujo
Esperanto-Societo de Finnaj Fervojistoj	S-ro U. Aaltonen, Keskitalo 16, Turku 9, Finnlando
Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj	S-ro Lic. L. Calloens, Erembodegemstr. 29, Aalst, Belgujo
Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj	S-ro E. W. Ruddell, 39 Westmoreland St., Dublin, Irlando
Nederlando Katolika Ligo Esperantista	S-ro F. J. v. d. Burgt, Auvergnestraat 41, Bergen op Zoom, Nederlando
Nederlando Polica Esperanto-Unuiĝo	S-ro J. Th. de Goeij, Luzacstraat 21a, Rotterdam
Pacifista Esperanto-Ligo	S-ro W. J. Brigden, 232 Sellincourt Road, London, S.W.17, Anglujo
Protestanta Esperantista Franca Asocio	S-ro René Janson, 1 Rue des Trésoriers, Chalon-sur-Marne, Francujo
Radio-Club Esperantiste de France	S-ro H. Favrel, 26 avenue Dode de la Brunerie, Paris 16, Francujo
Socialdemokrata Esperantista Ligo Nederlanda	S-ro H. W. Koppens, Jan Kobellstraat 41a, Rotterdam, W., Nederlando
Societo de Ĉeĥo-Slovakaj Nevidantaj Esperantistoj	Smichov 106, Praha, Ĉeĥo-Slovakujo
Society of British Esperantist Teachers	F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Anglujo
Sveda Instruista Esperanto-Federacio	S-ro F. Ahnfeldt, Torskors, Svedujo

NACIAJ

Fondita	Jarkotizo	Organo (* = presita)	Nombro da anoj
1937	Usonaj dolaroj 3.00, 2.50, 2.00	* <i>Sciencia Gazeto</i> (1111 Brooke Road, Rockford, Ill., Usono)	14
?	4 anglaj ŝilingoj (kun gazeto)	<i>Ruĝa Esperantisto</i> (108 Welldon Crescent, Harrow, Mdx., Anglujo)	250
?	2 ŝil. 6p.	<i>Brita Katoliko</i>	?
1922	10 Fmk.	—	32
1934	20 frankoj kun gazeto	* <i>Flandra Katoliko</i> (Abatejo, Grimbergen, Brabant, Belgujo)	400
1928	2 ŝil. 6p.	—	120
Aŭg., 1909	3 ned. guld.	* <i>Nederlanda Katoliko</i> (Pahudstraat 134, Den Haag, Nederlando)	1876
Jan., 1937	1.20 ned. guld. (kun organo)	<i>Monata Polica Bulteno</i>	125
Marto, 1937	1 ŝil. angla	—	25
1937	20 fr. fr.	<i>Nia Bulteno</i>	?
Dec., 1926	15 fr. fr.	* <i>Radio-Esperanto kaj Internacia S.O.S. Bulteno</i>	400
Sept., 1935	10 aŭ 15 ned. cendoj semajne	<i>Libereco</i> (Olijmpialein, Amsterdam-Z)	294
1922	10 Kč aŭ 4 respond-kuponoj	<i>Aŭroro</i> (brajla) (Praha-Nusle II., 738)	80
Jan., 1939	1 ŝil. angla (por T.A.G.E.-anoj 6 pencoj)	Bulteno	70
1918	3 svedaj kr.	* <i>Internacia Pedagogia Revuo</i> (Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando)	119

FAK-TERMINAROJ

Estas grava manko de fak-terminaroj en Esperanto. Ni esperas helpi al la forigo de tiu manko, prezentante al nia membraro unu tian terminaron en ĉiu jarlibro. Sube troviĝas la unua. Proponoj pri estontaj terminaroj estos danke akceptataj ĉe la Centra Oficejo de I.E.L.

FERVOJA TERMINARO

(Konstrufako)

de

Edward M. Rosher.

ANTAŬPAROLO

Sendube ne ĉiuj el la terminoj plaĉos al ĉiuj. Tio ne estas ebla, sed la kompilanto nur volas diri, ke ili estas la rezulto de multe da cerbumado dum tre longa periodo kaj interkonsiliĝo kun inĝenieroj de diversaj landoj. Neologismoj estas uzitaj nur kiam ili ŝajnas bezonataj por la fakuzo kaj estas markitaj per (*) steleto.

Neniu vorto povas longe vivi se ĝi ne taŭgas, do, iu netaŭga vorto en tiu ĉi terminaro kunportas la morton por si mem. La afero grava estas eldoni la fakterminarojn tiel kiel ili estas, kaj lasi al la juĝo de la fakuloj la akcepton aŭ malakcepton.

Tiuj ĉi fervojaj terminoj estas tradukoj, plejparte, de la difinoj en la "Manual of the American Railway Engineering Association," (Amerika Fervoja Inĝeniera Asocio), asocio kiu reprezentas fervojajn kompaniojn ekspluatantajn pli ol 400,000 kilometrojn da linioj.

Ofte en la tekniko oni bezonas vorton por indiki precizan staton aŭ ajon, kio tute ne estas necesa en vulgara parolado. Krome, la teknikaj vortoj devas havi tre precizan signifon kaj, ĉar ofte okazas kombinaĵoj formoj, estas dezirinde ke ĉi tiuj formoj ne estu tro longaj.

Kelkajn vortojn, kiel "Fervojo" kaj "Relvojo," oni uzas vulgare preskaŭ sinonime sed *nun* kiam ili estas proponataj por fakuzo, estas necese doni al ili precizajn difinojn, jene:

- 1. Fervojo** La tuta organizo, koncesioj, bienoj, kaj *konkretaj* (t.e. teraĵoj, trakoj, pontoj, tuneloj, ŝarĝmaŝinaro, akva kaj signala servoj; domoj kaj aliaj konstruaĵoj, materialo rulanta, k.t.p.), ankaŭ la *abstraktaĵoj*, (t.e. ekspluatado, administrado kaj ĉiuj agadoj rilate fervojon).
- 2. Fervojlinio** Nur la konkretaĵoj (vidu supre) sed nenia aŭ **Ferlinio** abstraktaĵo.

3. Relvojo

Nur la *interstaciaj konkretaĵoj*, (t.e. trako, tuneloj, teraĵoj, pontoj, signaloj, sed ne materialo rulanta, staciaj kaj aliaj domoj, nek stacigrundoj, trakarejoj, lokomotivejoj, akvoservoj, bienoj, k.t.p., kiuj tamen apartenas al la rilata ferlinio.)

4. Trako

Nur la du reloj, ŝpaloj (subrelaj traboj), kaj akcesorioj, sed nek balasto, tuneloj, pontoj, nek teraĵoj, k.t.p.

angle: permanent way; *usone*: track; *france*: la voie; *germane*: Gleise; *hispane*: la via; *itale*: binario.

Tiuj-ĉi frazoj klarigos la diferencojn:

Fervojo kompanio posedas plurajn *ferliniojn*, kelkaj el ili estas *dutrakaj*. La kompanio baldaŭ *dutrakigos* la *unutrakajn relvojojn*.

Ni reŝpaligis* la *trakon*.

La terminoj estas klasifikitaj alfabete laŭ temoj, kiuj siavice estas aranĝitaj alfabete kun la escepto de la titolo "Ĝeneralaj."

La kompilanto deziras atesti la helpon ricevitan de liaj kolegoj,

Inĝenieroj,	Sro. Victor O. de Allende,	Hispano
	Sro. V. de Ŝmurlo,	Ruso
	Sro. Rinaldo Orenco,	Italo
	Sro. Inspektoro G. Habellok,	Germano

Kvankam ĉi tiuj sinjoroj ne estas respondaj pri ĉi tiu verko, ili kunlaboris je la traduko esperanten de la kvina volumo (fervoja fako) de la Ses-lingva Ilustrita Teknika Vortaro de E. Schlomann, kaj tiu traduko multe helpis ĉe la kompilado de la nuna terminaro.

Edward M. Rosher,

1938.

Haslemere, Anglujo.

ĜENERALAĴOJ

Akvoeroziaĵo . . La forportado de teraĵoj, k.t.p. per la kunfrapado kaj eroziado de fluego (torento).

Fervojo aŭ

Relvojo, (laŭsence; vidu difinojn)

Administrirajto por

Ĉefa (*a*: main line; *us*: trunk line; *fr*: ligne principale; *ger*: Hauptlinie).

Duagrada

Ekspluatado de

Instalo de

Konservado de

Konstruo de

Konstruajto por

Milita

Privata

Strategia

Ŝtata

Glitajo	.. Parto de la tero movata kaŭze de perforto.
Kalkulo	.. Etato de laboro farita aŭ materialo provizita, laŭ kiu pago devas esti farota.
Klasifikado	.. Grupigo de materialoj laŭ karakterizoj.
Kvantoj	.. La kvantoj de la materialoj por esti traktataj, esprimitaj per unuoj kutimaj.
Poprezo*	.. Mallonga titolo indikanta la prezon por ĉiu unuo aŭ prezunuo (<i>a:</i> unit price), konvena por etatoj.
Specifiko	.. Tiu parto de kontrakto kiu priskribas detale la konstrumetodojn kaj kvalitajn de materialoj uzotaj.
Taksi	.. Ago fari takson.
Takso	.. Etato montranta la verŝajnan koston de la proponata laboro.
Trajno*	.. (por la tekniko "vagonaro" ne estas sufiĉe preciza) (1) Aro da vagonoj sekvantaj unu la alian, kunligitaj kaj tirataj de lokomotivo. (2) Lokomotivo sola aŭ aliaspeca surrela veturilo <i>iranta laŭ horaro de iu trajno</i> . Ĉiu vagonaro laŭ la vulgara senco de tiu vorto estas trajno sed teknike estas eble havi vagonaron (t.e. kolekto da vagonoj) kiu ne estas trajno. <i>a:</i> train ; <i>fr:</i> train ; <i>ger:</i> Zug ; <i>hisp:</i> tren ; <i>itale:</i> treno.
Tren(ad)o	.. La forto produktata de la vaporo en la cilindroj de vapor-lokomotivo por movigi horizontale la lokomotivon kaj kunligitajn vagonojn ; aŭ simila forto en ia motoro elektra aŭ de interna brulado.

BALASTO

Balasto	.. Elektita materialo metita (sternita) sur la platformon* por teni la trakon laŭ linio kaj supraĵo.
1. Cindroj	.. Restajoj de ŝtonkarbo uzita en lokomotivoj aŭ aliaj fornegoj.
2. Ĉatoj	.. Restajoj el muelejoj kie zinkaj kaj plumbaj mineraloj estas disigitaj de la rokoj en kiuj ili estas trovitaj.
3. Gruzo	.. Malgrandaj forfrotitaj pecetoj da roko, kiuj estas trovitaj en naturaj demetejoj kaj kiuj trapasas tra ringo de 6 cm da diametro sed reteniga sur kribrilo Numero 50.

4. Sablo .. La malmola grajna dispecetigita roko kiu trapasas kribrilo No. 10 kaj reteniga sur kribrilo No. 50.
5. Ŝtonbalasto .. Ŝtonoj artefarite rompigitaj je malgrandaj pecetoj de specifikitaj grandecoj.

BIENO (*a:* right of way)

Bieno	.. La terenaj (t.e. kamparoj) aŭ akvorajtoj necesaj por la fervojlinio.
Grundo stacia	.. Bieno uzata por staciaj uzoj inclusive de la trakarejo.
Vojo	.. Tiu parto de la bieno preparita ricevi la platformon* kaj trakon.

DRENADO

Akvofluejo	.. Fluejo aŭ natura aŭ artefarita por forkonduki la akvon.
Drenado	.. La interkapto aŭ forigo de akvo, de, sur aŭ sub la platformo.
Drenilo	.. Artefarita fluejo por forkonduki akvon for de la platformo.

- a:* Drenileto
Fluejeto
Fosaĵo
- b:* Interkapta
Drenilo
- c:* Kovro-
drenilo
- d:* Subdrenilo
- Malkovrita artefarita fluejo por dreni.
- Artefarita malkovrita fluejo por eviti ke la suprajakvoj superfluu la talusojn de tranĉeo aŭ kontraŭ la talusmalsupro de terpleno.
- Arkigita, tuboforma aŭ skatolforma drenilo el ligno, fero, betono, briko aŭ masonaĵo lokita sub la platformo pasigi akvon.
- Kovrita drenilo sub la platformo aŭ grund-supraĵo kiu ricevas la akvon laŭlonge per sorbado aŭ tra la juntoj* (kunigaĵoj).

Fluejo	.. Konkavaĵo aŭ tranĉitejo en kiu fluo estas limigita.
Marĉo	.. Mola, sponga grundo, ordinare malseka kiu konsistas el pli aŭ malpli vegeta materio.
Ŝanelo	.. vidu "Fluejo."

PLATFORMO kaj PLATFORMIGO

(la kompletigita supraĵo de la vojo kaj ĝia konstruo.)

Bermo	.. (<i>a</i>) La spaco lasita inter la supro aŭ malsupro de talusoj kaj elfositejoj faritaj kiel interkaptaj dreniloj, aŭ terpruntejoj. (<i>b</i>) Proksimume horizontala spaco farita en taluso.
--------------	--

Digo	.. Plenajo el tero, roko aŭ aliaj materialoj tiel farita, ke ĝi formas <i>netraflueblan barilon</i> kontraŭ akvo aŭ alia fluaĵo. <i>kp. Plen(aj)on.</i>
Elfosajo	.. La materialo elprenita el tranĉeoj, terpruntejoj aŭ fundamentoj.
Forjetaĵo	.. Materialo (tero, k.c.) troa, kiu ne estas bezonata por kompletigi la plen(aj)ojn.
Fundamentejo	.. La elfositejo en kiu oni metas la fundamenton de ia konstruaĵo.
Kompaktigita	.. Densigita per malforta pistado.
Kromtransporto	.. La kromdistanco ekster la fikslimo en kiu materialo estas transportata por konstrui platformon kaj por kiu oni devas pagi krompagon.
Malobstrukcigo	.. Netigo aŭ forpreno de naturaj aŭ artefaritaj obstrukcioj de la bieno.
Malŝveligo	.. La kuntiriĝo de la tero.
Meztransporto	.. La meza distanco tra kiu materialo estas transportata.
Platformigi	.. Prepari la grundon por la lokigo de la balasto kaj trako.
Plen(aj)o	.. Altigo de la surfaco per tero, roko, k.c. por formi la platformon—terplen(aj)o, rok-plen(aj)o. Notu: plenajo ne estas necese <i>netrafluebla</i> kiel estas "digo." Vidu "Digon."
Senstumpigo	.. Forigo de (arb)stumpoj kaj radikoj.
Subkreskajo	.. Arbetoj, arbustoj kaj arbobranĉoj kiuj estas forhakitaj sur la bieno aŭ alie.
Ŝtupigita	.. Formita laŭ serio da ŝtupoj.
Taluso	.. La flanka deklivo de plenajo aŭ tranĉeo.
Talusa malsupro	
Talusa supro	
Talusaj stangetoj vidu "Termezurado."	
Terprunti	.. Preni teron, aŭ rokon de alia loko por konstrui plenajon.
Terpruntejo	.. Elfosejo difinita por havigo de tero, k.c. bezonata.
Tranĉeo	.. La spaco formita per tio, ke la materialo estas forfosita.
Transporto aŭ senpaga transporto	.. La distanco ĝis fikslimo interne de kiu materialo, ĉefe tero, estas transportata por konstrui platformon, senpage kun escepto de la poprezo de la kontrakto. La poprezo jam enhavas la koston de ĉi tiu transportado.
Tutatransporto	.. La maksimuma distanco en kiu materialo estas transportata.

TERMEZURADO

Sur la kampo kaj en la oficejo

Akslinio	.. Linio indikanta la centron de tranĉeo, plenajo aŭ trako.
Aksostangetoj	.. Stangetoj, kutime lignaj, lokitaj por indiki akslinion.
Alteco	.. Distanco vertikala de unu punkto super aŭ sub establita ebena aŭ antaŭdecidita nivelo.
Azimuto	.. La horizontala angulo for de la Nordpunkto aŭ de antaŭdecidita bazlinio. Ĉi tiu estas mezurata angule per la horizontala cirklaĵo de teodolito aŭ samspeca instrumento.
Bazlinio	.. 1. Imaga linio sur karto aŭ grundo al kiu kaj de kiu ĉiuj mezuroj kaj distancoj estas rilatataj. 2. La distanco inter du fiksitaj punktoj kiu formas la sciatan lateron de la unua triangulo. 3. Sur profilo la linio al kiu estas rilatata la altecoj (fikspunktilinio).
Cirkelo	.. Ilo por desegni cirklojn.
Definitivaj Stangetoj	.. Stangetoj kiuj finfine markas la amplekson, liniojn aŭ aksojn de laboro farota.
Deklivo	.. Deklivo proporcio de la platforma linio kun la horizontalo. <i>a</i> : gradient; <i>fr</i> : déclivité; <i>pente</i> ; <i>ger</i> : Neigung; <i>hispane</i> : pendiente; <i>itale</i> : pendenza.
Desegna Papero	1. Preparita papero kaj tolo de diversaj kvalitoj, pezaj kaj ampleksoj. 2. Paŭspapero kaj paŭstoloj travebla por trakopii desegnaĵon. 3. Profila papero: liniita laŭ diversaj skaloj. La horizontala skalo estas eble unu dekonono de la vertikala skalo, kiu estas intence trograndigita por ke la diferenco je alteco super la bazlinio montriĝu pli klare. 4. Traprofila aŭ kverprofilo* papero aŭ tolo kiu estas dividita kvadrata laŭ la dezirata skalo, aŭ laŭ centimetroj kaj milimetroj, aŭ laŭ coloj kaj dekononoj. Uzata por transversaj sekcioj.
Egalalteco	.. Linio desegnita sur karto por montri kie la grundo estas je la sama nivelo aŭ alteco super iu ajn baznivelo aŭ fikspunkto. La linio de interkruciĝo de horizontala ebena kaj surfaco.
Kurbo	

F.N.P. (fonopo) . . . Mallongigo por Fiksa Nivelpunkto. (*a kaj usone*: Bench Mark B.M.)

Kartmezurilo . . . Instrumento kiu havas malgrandan dentradon konektita al indikilo kiu moviĝas sur ciferplato. La ciferoj registras la distancon rulitan de la radeto kaj tiel la distancon de unu punkto al alia sur la karto.

Kverprofilo* . . . Profila tranĉo tra io perpendikle al ĝia akso.

Liniigo . . . La horizontala projekcio de relvoja akslinio sur la karto, montranta la kurbojn kaj tanĝantojn.

Liniiloj . . . Simpla: Longa peco da ŝtalo, ligno aŭ celuloido kun precize rektaj randoj de diversaj longecoj.
Paralela: La plej simpla formo konsistas el du liniiloj konektitaj per du egallongaj oscilantaj braketoj. La plej bona formo nomata, "rulanta paralela liniilo" havas apud ĉiu ekstremo, dentradetojn kuplitajn tiamaniere ke la liniilo ĉiam rulas paralele.

Mannivelilo . . . Mallonga nivelilo, tenebla en la mano. Per reflektata prismo oni povas samtempe vidi la objekton kaj la aerovezikon. Ĝiam la aeroveziko centriĝas en ĝia irejo la linio de vido estas horizontala.

Mezurrubando }
Mezurĉeno } Rubando el ŝtalo aŭ ŝtala ĉeno de difinita longeco kutime gradigita decimale, uzata por mezuri distancojn.

Mezurpinglo aŭ Sago . . . Longa drata pinglo kun ringo ĉe unu ekstremo, uzita kun la mezurrubando por marki sur la grundo la finon de ĉiu unuo de mezurrubando.

Nivelilo . . . Horizontala teleskopon muntita en du forkoj kaj movebla nur horizontale. La vertikala akso sur kiu ĝi rotacias estas muntita sur tri aŭ kvar ŝraŭbegoj per kiuj la linio de vido estas alĝustigata precize horizontale. La tuto estas muntita sur tripiedo. Ĉe la okulseno estas araneaĵa kruco aŭ metalaj pintoj per kiuj oni legas la ciferojn sur la nivel(vid)stango. Kelkaj niveliloj ankaŭ portas kompason. Uzata por konstati la altecon de unu punkto super alia.

Nivel(vid)stango Gradigita stango farita je du aŭ tri longoj kiuj teleskopigas unu sur la alian por facilportado. La teleskopon de la nivelilo estas direktata al la nivelstango por legi la ciferojn sur ĝi.

Plano . . . Desegno liverita por la gvidado de laboro. Fervojfako speciale indikanta la akslinion.

Planimetro . . . Ilo por mezuri areojn nesimetriaĵojn sur la plano.

Prisma Kompasso Estas nur ordinara kompasso kun prisma lenso por facile legi la gradojn.

Plumŝnuro aŭ Perpendiklilo Fadeno kun pinta pezaĵo ĉe fino. Uzata por lokigi la instrumentan centron ĝuste super donita punkto.

Registra Libro . . . Speciale linitaj libroj por registri la legaĵojn faritaj per teodolito aŭ nivelilo.

Platform(o)linio La linio sur la laŭlonga profilo montranta la supraĵon de la terplen(a)oj kaj la plankojn de la tranĉeoj.

Talus(o)stangetoj Stangetoj lokitaj por difini la supron kaj malsupron de plenaĵo aŭ tranĉeo.

Teodolito . . . Konsistas el teleskopon muntita sur transversa akso en du forkoj tiamaniere, ke oni povas klinigi ĝin supren aŭ malsupren. Se la teleskopon estas tute renversebla tra 360 gradoj, en Usono oni nomas ĝin "Transit."
Partoj de Teodolito

Cirklajo supra aŭ Supraplato La forko mem estas fiksita al rotaciebla gradigita plato (supra plato) kiu siavice rotacias sur aŭ kontraŭ alia gradigita plato. (cirklajo suba aŭ subplato).

Cirklajo suba aŭ Subplato Vidu supre. La du platoj povas esti kunfiksitaj kaj estas kune rotacieblaj.

Cirklajo vertikala Orte al la aliaj platoj, kaj muntita sur la suprecitita teleskopon estas alia gradigita ringo aŭ cirklajo vertikala per kiu oni mezuras la vertikalaĵajn angulojn je kiuj la teleskopon kliniĝas de la horizontalo.

Cirklajaj aksoj La aksoj de la du horizontalaj platoj estas konusformaj. Tiu de la supra plato estas muntita interne de tiu de la subplata konuso, kiu estas kava.

La akso de la subplato estas muntita kaj rotacias en alia tri aŭ kvarbraka ingo subtenata de tri aŭ kvar vertikalaj ŝraŭboj. Per tio oni povas alĝustigi la nivelecon de la platoj kaj ankaŭ de la tuta instrumento.

Siavice la niveligaj ŝraŭboj baziĝas sur alia tri aŭ kvarbrakaĵo, kiu estas fiksita per ŝraŭboringo al la tripiedo.

Ĉiu el la tri piedoj estas aparte movebla kaj alĝustigebla. Per ili oni krude alĝustigas la instrumenton al la malebeneco de la grundo.

Kompaso .. Alfiksita al multaj teodolitoj estas kompasoj, ĉu tute cirkla ĉu kun nadlo en mallarĝa trogo. Oni povas aranĝi la nulmarkojn sur la horizontalaj platoj tiel ke ili koincidas kun la magneta Nordpunkto. Tiam turnigante la teleskopon azimute oni povas legi la azimuton senpere sur la cirklaĵoj pli precize.

Niveliloj aerbulaj Sur la supra plato kutime kuŝas du aerbulaj niveliloj lokitaj ofte unu al alia por faciligi la starigon de la instrumento en ĝusta pozicio. Laŭlonge, sur aŭ sub la teleskopoj estas pli longa aernivelilo. Ĉiuj tri estas gradigitaj.

TELESKOPAJ PARTONOMOJ

Araneaĵoj aŭ Krucafadenoj Ĉe la okullenso en ringo estas krucigitaj araneaĵoj fadenoj. En kelkaj instrumentoj oni anstataŭigas la araneaĵojn per tri delikataj linioj gravuritaj sur vitra diafragmo. La kruco markas la optikan akson de la teleskopoj ĉe la okullenso, kaj ebligas la fiksadon per teleskopoj de ĉiu punkto. La pozicio de la ringo enhavanta la krucon estas alĝustigebla.

Fokusado .. Ambaŭ la okullenso kaj la objektivo estas fokuseblaj. La unuan oni faras glitigante la lenshavantan tubon en alia tubo kiu formas parton de la teleskopoj. Ĉi tiun agon oni nomas, "alĝustigo per paralakso." Oni fokusas la objektivon per dentrela ŝraŭbo.

Noktolanterno kaj Teleskopa akso Por plifaciligi la observadon nokte aŭ en tuneloj estas necese ke la araneaĵoj estu lumigataj. Tiucele la teleskopa akso ofte estas malsolida. Ĉe la centro de la akso interne de la teleskopa tubo estas muntita prisma speguleto tiel ke la lumoj de la lanterno lokita ĉe unu ekstremo de la akso brilas sur la speguleton kaj estas reflektata sur la araneaĵojn.

Aliaj partoj de teodolito

Taŭgantaj Ŝraŭboj Por ebligi la tre precizan alĝustigon de la vernieroj (vidu sube), ambaŭ horizontalaj kaj vertikalaj, la cirklaĵoj havas taŭgantajn ŝraŭbojn kaj krampojn. La ŝraŭboj havas tre delikatajn ŝraŭbrelojn. Tial estas necesaj multaj turnoj por movi la cirklaĵojn tra unu grado. Dezirante legi cirklaĵan gradon oni unue direktas la teleskopon al la objekto. Kiam la krucafadenoj proksimume trafas la objekton oni fiksas aŭ la teleskopon aŭ la supran platon per krampo. Tiam turnante la taŭgantajn ŝraŭbojn oni alĝustigas la krucafadenon al la objekto. La rezulton oni legas per verniero.

Verniero .. Ambaŭ cirklaĵoj havas vernierojn, kiuj estas lokitaj 180 gradoj aparte. Ili estas gravuritaj decimale kaj ebligas la taksadon de frakcioj da gradoj gravuritaj sur la cirklaĵoj.

Traprofilo .. Profila tranĉo tra ĉi sed ne necese perpendikle al ĝia akso: Kiam la tranĉo estas orta oni nomas ĝin "kverprofilo." Fervojfako ĉi tiu speciale rilatas al profilo orta al la akso de la trako.

Vidvergo .. Maldika pinta vergo, kelkafoje ĝi estas kolorigita per alternaj ringoj por esti plifacile videbla. La vergo estas uzata por lokigi punkton sur la grundon per teodolito aŭ alia direktotrovilo.

TRAKO kaj TRAKAREJOJ

Akcesorioj aŭ Fiksiloj Eklisoj aŭ (rel)splintoj; kontraŭrampiloj; relboltoj; relfortigiloj; relnajloj; sidplatoj; ŝraŭbingaj seruroj; trakŝraŭboj, k.t.p.

Frogo* .. Tiu parto de "trakforno" kie la relo de unu trako kruciĝas kun la relo de alia trako. (Vidu ilustraĵojn I.)

Krucaĵo .. Relajo kie unu trako kruciĝas kun alia sed malpli oblikve ol ĉe frogo kaj ĝenerale sen pintreloj.

Kurbo .. Ŝanĝo de direkto pere de unu aŭ pli da radioj.

„ **Facileniriga** Kurboj de regule variantaj radioj kiuj kunigas taŝanton kun simpla kurbo, aŭ kiu kunigas du simplajn kurbojn.

„ **Grado de** La angulo kiu kontraŭas al ŝnuro de 100 futoj (laŭ usona praktiko), aŭ kontraŭ 20 metroj laŭ la metra sistemo.

„ **Kunmetita** Ŝanĝo de direkto pere de du aŭ pli da simplaj kurboj de malsamaj radioj sed ĉiuj irantaj laŭ la sama direkto, kiuj kunigas unu al alia ĉe punktoj de komunaj taŝantoj.

Kromalteco aŭ **(superalteco)** La kvanto je kiu la ekstera relo ĉe kurbo estas plialtigita super la interna relo.

Liniigo .. La horizontala lokigo de relvojo aŭ trako rilate al ĝiaj kurboj kaj taŝantoj. (Vidu ankaŭ sub Termerzurado.)

Lini(git)eco .. La stato de la trako rilate al la konstanteco de direkto en mallongaj distancoj sur taŝantoj, aŭ konstanteco de variado en mallongaj distancoj sur kurboj.

Niveleco .. La stato de la trako kiam la du reloj havas la saman nivelon (altecon), kvare (transverse).

Simpla Kurbo .. Ŝanĝo de direkto pere de unu radio.

“S”-kurbo (Sokurbo) Du kurboj laŭ malsama direkto en kontinua linio.

Spuro* (de trako) La distanco inter la kapoj de la reloj mezurita orĉe al ili ĉe punktoj kiuj estas 15mm. malsupre de la relsupro.
a kaj usone: gauge ; *fr:* écartement ; *ger:* Spur ; *itale:* scartamento ; *hispa:* anchura, cartabón.

Spuro

„ **Larĝa** .. Spuro pli ol 1.435 metroj.

„ **Mallarĝa** .. malpli ol 1.435 metroj.

„ **Normala** .. de 1.435 metroj.

Supraĵeco .. La stato de la trako rilate vertikalan ebenecon aŭ glatecon en mallongaj distancoj.

Ŝpalo* .. Transa peco de relvoja trako kiu subtenas la reloj kaj per kiu la reloj estas retenataj laŭ la spuro dezirita.
a: sleeper ; *usone:* tie ; *fr:* traverse ; *ger:* Schwelle ; *hispa:* traviesa ; *itale:* traversina ; *ruse:* ŝpala.

Ŝpalo Duonronda Ŝpalo je kiu la malsupra faco estas pli larĝa ol la supra.

„ **Hakita** .. Ŝpalo kiu estas hakita je almenaŭ du flankoj.

„ **Kora** .. Ŝpalo montranta suklignon je nur unu aŭ du anguloj, kaj kiu sukligno ne mezuras pli ol 25.4mm. ĉe iu el la du anguloj sur linioj markitaj diagonale sur la ekstremaj facoj de la ŝpalo.

„ **Kvadrata** Ŝpalo kun kvar segitaj facoj.

„ **Plata** .. Ŝpalo segita nur je la supra kaj malsupra facoj.

„ **Splita** .. Ŝpalo el arbo de tia grandeco kiom ebligas la faradon de po du aŭ pli en sekcio.

„ **Verkora** .. Ŝpalo sen iom da sukligno.

Taŝanto (geom.) 1. Reka trako. La trako inter du kurboj.
2. Reko kiu taŝas kurbon.

„ **Suba** .. La distanco inter la komenco de kurbeco kaj la interseco de la du taŝantoj se ili estus plilongigataj ĝis renkonto.

Taŝento (trig.) Proporcio de la sinuso al la kosinuso.

Trako .. Ŝpaloj, du reloj kaj akcesorioj kiam ĉiuj partoj estas taŝe enlokigitaj.

Vertikala Kurbo (Rondigo de deklivŝanĝejo.) Kurbo uzata por kunigi kruciĝantajn aŭ intersekantajn deklivojn.

TRAKFORKO kaj TRAKFORKEROJ

Trakforko Simpla Komutilaro por ŝanĝi direkton de trajno de unu trako al alia, kiu konsistas el frogo, pintreloj kaj interreloj. (Vidu Ilustraĵon I.)

Trakforko Trivoja povas esti, (a) ambaŭflanka. (b) samflanka. (vidu Ilustraĵon I.)

Trakforkaj Partnomoj (vidu Ilustraĵon I)

1. **Deflankiga kurbo** La kurbo inter la pivoto kaj la frogantaŭo.
2. **Disblokoj** .. Ŝtalaj aŭ fanditferaj blokoj por teni aparte la relojn je ĝusta distanco.
3. **Flanĝejo** .. La interspaco (proks. 45mm.) inter kontraŭrelo kaj V-peco aŭ trakrelo.
4. **Frogplato** .. Ŝtalplato sur kiu estas muntitaj la frogreloj. t.e. V-pecaj reloj kaj kontraŭfroj.
5. **Interreloj** .. La reloj konektantaj la pintrelajn pivotojn kun la frogo.
6. **Kontraŭreloj** Estas uzataj por gvidi la radflangojn aŭ ĉe trakforkoj aŭ ĉe kurboj.

7. **Pintreloj** .. Pintigitaj reloj kiuj sidas ĝuste tuŝantaj ĉu unu ĉu alian de la trakreloj por direkti la trajnon laŭ la dezirata trako.
8. **Pintrelaj Glitplatoj** Ŝtalaj platoj por faciligi la movadon flanken de la pintreloj.
9. **Pintrelaj Pivotoj** La malantaŭo de la pintreloj kie ili pivotas. Ili estas tenataj je ĝusta apartiĝo por "pivotaj disblokoj."
10. **Pintrelaj Vergoj** Vergoj kunigantaj la du pintrelojn por ke ili funkcii samtempe.
11. **Spurfaco** .. La punkto sur la flanko de relkapo 15.5 mm. malsupre de la relsupraĵo, inter kiuj oni mezuras la spuron.
12. **V-peco** .. La koro de la frogo. Ĝi konsistas el du relopecoj pintigitaj kaj kunmetitaj por formi pinton. Inter la reloj estas "klinbloko" kiu havas klinaĵon ĉe la larĝa fino por levigi la flankon de la radoj tiel ke ĝi ne havas tendencon apartigi la relojn.

TRAKKRUCAĴOJ (vidu Ilustraĵon II)

- Oblikva** .. Kie unu trako transiras la alian je angulo.
- Orta** .. Kie unu trako transiras la alian orte.
- Tondilforma simpla** Oblikva krucaĵo havanta du frogojn kaj kvar pintrelojn por ebligi la transiron de trajno de unu trako al alia krom la ordinara transpasado. Kombinaĵo de krucaĵo kaj du trakforkoj samloke.
- Tondilforma duobla** Oblikva krucaĵo kun du frogoj kaj ok pintreloj. Estas efektive kombinaĵo de krucaĵo kaj kvar trakforkoj samloke.


SPECIMENAJ TRAKAREĴOJ

(vidu Ilustraĵon II)


Estas senlima variado de la formoj sed la ilustraĵo montras la ĉefajn ecojn necesajn por ia instalaĵo, kiuj estas memklarigaj.

Noto.—Oni povas aĉeti represaĵon de ci tiu terminaro ĉe *Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, por 6 pencoj anglaj aŭ du internaciaj respondkuponoj.*

DIAGRAMO de TRAKFORKO-SIMPLA



Trakforko Trivoja





Samflanka Trivoja Trakforko




I

KRUGAJOJ




Tondilforma


Simple



Double



SPECIMENAJ TRAKAREJOJ



II



POŝTMARKOJ POR KOLEKTANTOJ JE FAVORAJ PRESOJ

ĈIUJ MALSAMAJ

	<i>Silingoj</i>		<i>Silingoj</i>
15 Barbado ..	1½	25 Jamajko ..	2½
25 „ ..	3½	25 Maŭricio ..	2½
50 Britujo ..	1½	50 Nov-Zelando	2
25 Cejlono ..	1	25 Ora Bordo ..	2½
15 Cipro ..	1	25 Palestino ..	1½
25 „ ..	2½	50 Sud-Afriko	5
50 Egiptujo ..	2½	15 Sudano ..	2½
100 „ ..	8½	25 „ ..	3½
25 Hongkongo	2½	50 „ ..	10
25 Irako ..	1½	25 Travankoro	1
50 „ ..	3½	50 „ ..	5
25 Irlando ..	1½	25 Trinidado ..	2½
50 Kanado ..	1½	25 Koŝino ..	1½
100 „ ..	5	50 „ ..	5

PREZOJ EN BRITAJ ŜILINGOJ—PAGO KUN
MENDO—PREZLISTOJ SENPAGE.

Ni aĉetas poŝtmarkojn, sed skribu unue, ne
sendu. Interŝanĝo ne dezirata.

★

W. M. APPLEBY

P.T.S., DEL. I.E.L.

47 Clarence Street, CHELTENHAM, Anglujo

LA ESPERANTISTA

Ni presigas informon pri ĉiuj gazetoj, kiuj, laŭ nia scio, nuntempe aperas. Kie en la lastaj kolonoj estas streketoj, tio signifas, ke la koncerna gazeto ne resendis al ni la demandilon plenigitan. La cetera informo estas severe kopiita de la demandiloj resenditaj de la gazetoj mem.

Nomo	Adreso (1) Administracia (2) Redakcia	Fondita
<i>American Esperantist</i> (<i>Amerika Esperantisto</i>)	(1, 2) Room 227, 1410 H. Street, N.W., Washington, D.C., Usono	1907
<i>Arbeideresperantisten</i>	(1, 2) Boks 994, Oslo, Norvegujo	1924
<i>Arbetar Esperantisten</i>	(2) Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo	—
<i>Argentina Esperantisto</i>	(1, 2) Misiones 369, Buenos Aires, Argentino	—
<i>Aŭrovo (en brajlo)</i>	(1, 2) Vuk Echtner, Nusle II.— 738 Praha, Ĉeĥo- Slovakujo	1920
<i>Belga Esperantisto</i>	(1, 2) 44 Avenue de Bruyn, Wil- rijk, Antwerpen, Belgujo	1908
<i>O Brasil Esperantista</i>	(1, 2) Praça da República 54, Rio de Janeiro, Brazilo	Jan., 1938
<i>British Esperantist, The</i>	(1, 2) 142 High Holborn, London W.C.1, Anglujo	1905
<i>Bulgara Esperantisto</i>	(2) Str. P. VI. Alabin 50, Sofia, Bulgarujo	—
<i>Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista</i>	(1, 2) 56 Rue de la Rochefou- cauld, Paris 9, Francujo	1906
<i>Dansk Esperanto-Blad</i>	(1) Fannerup pr. Kolind, Danujo (2) Karise, Danujo	?
<i>Dia Regno</i>	(1) Soestdijkschekade 938 Den Haag, Nederlando (2) ĉe S-ro H. C. van Leeuwen, Wijke, Nederlando	1932

GAZETARO

Notu, ke la mallongigo "rk." signifas "internacia
respondkuponon de la poŝto, stampita en la ĝusta loko."

Organo de	Aperas	Jarabono	Kosto de korespond- anoncetoj
Esperanto Associa- tion of North America	monate	1 dolaro (20 rk.)	po 1 cendo por ĉiu vorto (mini- mume 25 vortoj)
Norvega Asocio de Laboristaj Es- perantistoj	monate	1.80 Norv. kr. (6 rk.)	akceptas; prezo laŭ arango
—	—	—	—
—	—	—	—
Societo de Ĉeĥo- Slovakaj Nevid- antaj Esperan- tistoj	5-foje jare	4 rk.	senpage por kor- espondado en brajlo
Reĝa Belga Ligo Esperantista	monate	35 Belg. fr. (20 rk.)	po 10 Belg. fr.
Brazila Ligo Es- perantista	dumonate	1 dolaro (15 rk.)	po 3 rk.
Brita Esperantista Asocio	monate	2ŝil. 6p. (12 rk.)	po 1p. por ĉiu vorto (mini- mume 12 vortoj)
—	—	—	—
Internacia Scienca Asocio Esperan- tista	dumonate	laŭ la lando (15 rk.)	akceptas nur por sciencaj, indus- triaj kaj komer- caj aferoj
Centra Dana Es- perantista Ligo	monate	2.50 Dan. kr. (9 rk.)	akceptas
Nederlanda Krist- ana Esperanto- Unuiĝo	monate	2.50 Ned. fl. (kun Kristana Gazeto)	senpage

LA ESPERANTISTA

Nomo	Adreso (1) Administracia (2) Redakcia	Fondita
<i>Elo Fraternal</i>	(1, 2) Luiz Gama 18, Bahia, Brazilo	Okt., 1933
<i>Esperanta Ligilo (en brajlo)</i>	(1, 2) Stocksund, Svedujo	1904
<i>Esperantista Bahiano</i>	(1, 2) Rua do Bangala no. 18, Bahia, Brazilo	Jan., 1937
<i>Esperanto</i>	(1, 2) U.E.A., Palais Wilson, Genève, Svisujo	—
<i>L'Esperanto</i>	(1, 2) Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano, Italujo	—
<i>Esperantobladet</i>	(1) Boks 4433, Oslo, Norvegujo (2) Boks 197, Bekkelaget, Norvegujo	3a periodo Jan., 1932
<i>Esperanto Internacia</i>	(1) Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo (2) Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando	Okt., 1936
<i>Espero Katolika</i>	(1) Nové Sady 49, Brno, Ĉeĥo-Slovakujo (2) Pahudstr. 134, Den Haag, Nederlando	1903
<i>Flamo</i>	(1) Katoo Kojĉi, 341 Motojamaĉi, Kumamoto-ŝi, Japanujo (2) Kooĵi Iĉihara, Monnai U.T.O.-maĉi, Kumamoto-ken, Japanujo	Okt., 1936
<i>Flandra Esperantisto</i>	(1, 2) Magdalenastraat 29, Kortrijk, Belgujo	1929
<i>Flandra Katoliko</i>	(1, 2) Lia Moŝto Kanoniko C. Van Hoogstraten, Abatejo, Grimbergen (Br.), Belgujo	1934
<i>For la Milito</i>	(1, 2) 4 Rue A. France, Saint Cyr s/Loire, Francujo	1935
<i>Franca Esperantisto</i>	(1, 2) 34 Rue de Chabrol, Paris 10, Francujo	1934

GAZETARO

Organo de	Aperas	Jarabono	Kosto de korespond-anoncetoj
Vinculo Internacia de Amizade	4-foje jare	senpage	po 1 rk. por 20 vortoj
Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj	monate	laŭ interkonsento	senpage
Esperanta Grupo de Bahia	neregule	senpage	po 1 rk. por 20 vortoj
—	—	—	—
—	—	—	—
Norvega Esperantista Ligo	monate (ne en Julio & Aŭg.)	7 rk.	3 rk. por 3 linioj : pliaj linioj po 1 rk.
Internacia Esperanto-Ligo	monate	7ŝil. Anglaj (28 rk.)	akceptas : vidu sub <i>Heroldo</i>
Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista	monate	12 rk.	2 rk. ĝis 20 vortoj
Ligo Esperantista de Gubernio Kumamoto	4-foje jare	12 sen (2 rk.)	senpage
Flandra Ligo Esperantista	monate	25 Belg. fr. (15 rk.)	po 5 Belg. fr. (3 rk.)
Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj	monate	20 Belg. fr.	2 rk. ĝis 30 vortoj
Ligo de Esperantistaj Pacifistoj	trimonate	6 Fr. fr. (3 rk.)	po 2 rk.
Societo Franca por la Propagando de Esperanto	10-foje jare	30 Fr. fr. (15 rk.)	po 1ŝil. angla

LA ESPERANTISTA

Nomo	Adreso (1) Administracia (2) Redakcia	Fondita
<i>Frateco</i>	(1, 2) Str. Car. Osvooboditel 45, Sevlievo, Bulgarujo	1932
<i>Helena Esperantisto</i>	(1, 2) Odos Rodou 21, Athinai 8, Grekujo	Jan., 1909
<i>Heroldo de Esperanto</i>	(1, 2) Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando	1920
<i>Hungara Heroldo</i>	(1, 2) Prof. J. de Mihalik, Sas- halom, Hungarujo	1927
<i>Infanoj sur Tutmondo</i>	(1, 2) S-ro H. Bourguignon, Besse-sur-Issole (Var), Francujo	Marto, 1934
<i>Informilo</i>	(1, 2) Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam-C, Nederlando	1935
<i>Informoj</i>	(1, 2) Postkast 6, Tallinn, Estonujo	—
<i>Interligilo de P.T.T.</i>	(1, 2) 46 Rue Lamartine, Paris 9, Francujo	—
<i>Internacia Medicina Revuo</i>	(1, 2) 19 Avenue Montjoie, Uccle 3, Belgujo	?
<i>Internacia Pedagogia Revuo</i>	(1, 2) Schoolstraat 13, Veen- dam, Nederlando	1922
<i>Internacia Radio- Servo</i>	(1, 2) Helsingborg, 3, Svedujo	?
<i>Internacia S.O.S. Bulteno</i>	(1, 2) S-ro M. Alglave, Blanc- Misseron (Nord), Francujo	1932
<i>Interna Ideo, La</i>	(1, 2) 189 Vivian Street, Wellin- ton, C.2., Nov-Zelando	1935
<i>Junna Vivo, La</i>	(1, 2) West-Graftdyk (NH), Nederlando	Julio, 1934
<i>Kanada Bulteno</i>	(1, 2) G.P.O. Box 272, Toronto, Kanado	Feb. 1939

GAZETARO

Organo de	Aperas	Jarabono	Kosto de korespond- anoncetoj
Universala Frataro	?	20 Bulg. levoj (3 rk.)	akceptas
Helena Esperanto- Asocio	dumonate	1 Usona dolaro (9 rk.)	po 5 Dr. por ĉiu linio (mini- mume 3 linioj)
Internacia Esper- anto-Ligo	semajne	6.80 Ned. guld. (54 rk.)	.60 guld. ĝis 20vortoj
Hungara Esperanto- Federacio	4-foje jare	4 Hung. pengoj (8 rk.)	.90 guld. ĝis 30vortoj po 1 rk.
—	monate	10 Fr. fr. (6 rk.)	unufoje senpage ; poste po 1 rk.
Nederlanda Esper- anto-Gruparo	monate	1.50 Ned. guld. (12 rk.)	po 1.25 Ned. guld. por dufoja presigo
—	—	—	—
—	—	—	—
Tutmonda Esper- antista Kura- cista Asocio	principe dumonate	4 Anglaj ŝil.	po 1 rk. por 3 linioj
Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj	6-foje jare	2.50 Ned. guld. (16 rk.) (kun aneco de T.A.G.E.)	senpage por in- fanoj & gein- struistoj
—	monate	—	ne akceptas
Radio-Klubo Esperantista	monate	12 Fr. fr. (9 rk.)	akceptas ; petu tarifon
—	monate	3½ ŝil.	po 2 rk.
Tutmonda Junu- lar-Organizo	10-foje jare	1 Ned. guld.	po 30c por ĉiu linio.
Kanada Esperanto- Asocio	dumonate	por membroj	?

LA ESPERANTISTA

Nomo	Adreso (1) Administracia (2) Redakcia	Fondita
<i>Kompreni</i>	(1) Faculté de Droit, 15 quai Claude Bernard, Lyon, Francujo (2) 55 Avenue Félix Faure, Lyon, Francujo	1934
<i>Komunikoj por la Gazetaro</i>	(1, 2) Vondelstraat 61, Amsterdam W, Nederlando	1930
<i>Korea Esperantisto</i>	(1, 2) 190 Jöhoku-Ço, Seoul, Koreujo	1937
<i>Kristana Gazeto</i>	(1) Soestdijkschekade 938, Den Haag, Nederlando (2) S-ro H. C. van Leeuwen, Wijke, Nederlando	1932
<i>Kristana Revuo</i>	(1, 2) 132 Slewins Lane, Hornchurch, Romford, Essex, Anglujo	Aüg., 1927
<i>Kritika Observanto</i>	(1, 2) 12 Gt. Castle Street, London, W.1, Anglujo	?
<i>Kritika Revuo</i>	(1, 2) 189 Vivian Street, Wellington, C.2, Nov-Zelando	Jan., 1939
<i>Laborista Esperantisto</i>	(1) Postbus 4050, Amsterdam, Nederlando (2) Postbus W.6, Amsterdam W, Nederlando	—
<i>Liberecana Sintezo</i>	(1) 28 Bd. St. Denis, Paris 10, Francujo (2) S-ro A. Germain, Boîte Postale 32, Paris 20, Francujo	1938
<i>Libereco</i>	(1) Coornhertstraat 4, Rotterdam W, Nederlando (2) Olympiaplein 106 A, Amsterdam, Nederlando	1935
<i>Ligilo</i>	(1, 2) Truhlářská 16, Praha II, Ĉeĥo-Slovakujo	—
<i>Lingua Auxiliari</i>	(1, 2) Av. Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro, Brazilo	—

GAZETARO

Organo de	Aperas	Jarabono	Kosto de korespond-anoncetoj
Universitata Esperanto-Klubo	monate	12 Fr. fr. (6 rk.)	po 5 Fr. fr.
Internacia Transport-laborista Federacio	monate	1.20 Ned. guld. (9 rk.)	ne akceptas krom de anoj de I.T.F.
Korea Esperantista Asocio	4-foje jare	(5 rk.)	senpage por legantoj
Nederlanda Kristana Esperanto-Unuiĝo	monate	2.50 Ned. guld. (kun Dia Regno)	ne akceptas
—	2-foje jare	8 rk. por 6 n-roj	senpage
Internacia de Socialista Kunbatalo	kvaron-jare	6 Fr. fr. (4 rk.)	ne akceptas
—	monate	5 ŝil. Anglaj	po 2 rk. por 25 vortoj
—	—	—	—
Nacia Konfederacio de Laboro & Iberia Anarkista Federacio	duon-monate	20 Fr. fr. (15 rk.)	ne akceptas
Socialdemokrata Esperantista Ligo Nederlanda	monate	1 Ned. guld. (8 rk.)	po 1 Ned. guld.
—	—	—	—
—	—	—	—

Nomo	Adreso (1) Administracia (2) Redakcia	Fondita
<i>Lingvo-Libro</i>	(1, 2) Soroksári-str. 38, Budapeŝt IX, Hungarujo	1933
<i>Literatura Mondo</i>	(1, 2) Soroksári-str. 38, Budapeŝt IX, Hungarujo	2a periodo 1931
<i>Litova Stelo</i>	(1, 2) Žemaičiu 15, Kaunas, Litovujo	1914
<i>Lumturo de Esperanto, La</i>	(1, 2) Villa Zamenhof, Sisteron, (Basses Alpes), Francujo	1935
<i>Militrezistanto</i>	(1, 2) 11 Abbey Road, Enfield, Mdx., Anglujo	—
<i>Nederlanda Esperantisto</i>	(1) Gerard Schaepestraat 7, Amsterdam-W, Nederlando (2) Burg. Keestrasingel 10, Culemborg, Nederlando	Jan., 1932
<i>Nederlanda Katoliko</i>	(1) Willemstraat 91, Heerlen, Nederlando (2) Pahudstraat 134, Den Haag, Nederlando	1909
<i>Nia Organo</i>	(1, 2) Soekalilah 14, Cheribon (Java), Nederlandindio	—
<i>Nia Voĉo</i>	(1) Heemskerkstr. 23a, Rotterdam C, Nederlando (2) Abr. Kuyperlaan 118c, Rotterdam C, Nederlando	Junio, 1935
<i>Nordfranca Esperantisto</i>	(1, 2) 18 Rue Albert 1er, Dunkerque (Nord), Francujo	1908
<i>Nova Bulteno</i>	(1, 2) 1111 Brooke Road, Rockford (Ill.), Usono	Jan., 1938
<i>L'Oazo</i>	(1, 2) c/o 94 Anderson Road, Ipoh, Perak, Malajo	Aprilo, 1936
<i>Oficiala Informilo de I.C.M.E.P.</i>	(1, 2) 4 St. A. France, Saint Cyr s/Loire, Francujo	1937
<i>Orienta Kulturo</i>	(1, 2) Komagome-Dozaka 228, Tokio, Japanujo	1936

Organo de	Aperas	Jarabono	Kosto de korespondanoncetoj
Aktivularo de Esperantistaj Libro-Amikoj	4-foje jare	.20 Usono dol. (3 rk.)	ne akceptas
—	6-foje jare	1.80 Usona dol. (23 rk.)	ne akceptas
Litova Esperanto-Asocio	dumonate	6 rk.	po 1 rk.
—	monate	10 Fr. fr. (6 rk.)	3 linioj senpage por ĉiu Jarabono
—	—	—	—
Nederlanda Esperanto-Asocio "La Estonto Estas Nia"	20-foje jare	2.50 Ned. guld. (20 rk.)	po 1 Ned. guld. por 1/16 paĝo
Nederlanda Katolika Ligo Esperantista "Nederlanda Katoliko"	monate	3 Ned. guld. (20 rk.)	senpage
—	—	—	—
Rotterdam'a poŝt-grupo 'Esperanto Estu Nia Celo'	monate	1 Ned. guld. (8 rk.)	senpage
—	monate	10 Fr. fr. (8 rk.)	senpage
Amerika Esperanto Instituto	6-foje jare	25 Usonaj cend. (2 rk.)	po 1 rk. por 2 linioj
L'Oazo Societo	monate	senpage	po 1 rk.
Internacia Centro de la Movado Esperantista Pacifista	trimonate	6 Fr. fr. (3 rk.)	po 2 rk.
Societo de Orienta Kulturo	3-foje jare	2 jenoj (6 rk.)	ne akceptas

LA ESPERANTISTA

Nomo	Adreso (1) Administracia (2) Redakcia	Fondita
<i>Orienta Kuriero</i>	(1, 2) P.O. Box 10, Hongkong	Aprilo, 1938
<i>Paris-Esperanto</i>	(1, 2) 130 Rue Amelot, Paris 11, Francujo	1906
<i>Pola Esperantisto</i>	(1, 2) Lubicz 34, Kraków, Polujo	1906
<i>Popola Fronto</i>	(1) 53 Rue Brise-Pain, Orléans, Francujo (2) Str. Mar 25, Valencia, Hispanujo	1936
<i>Praktiko, La</i>	(1, 2) Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando	Jan., 1932
<i>Progresanto, La</i>	(1) Postbus 4050, Amsterdam-O, Nederlando (2) Rietstraat 40, Utrecht, Nederlando	Okt., 1934
<i>Radiesteza Gazeto</i>	(1, 2) 63 Rue de Patay, Orléans, (Loiret), Francujo	Okt., 1937
<i>Radio-Esperanto</i>	(1, 2) 26 Avenue Dode de la Brunerie, Paris 16, Francujo	1930
<i>Renovigo</i>	(1, 2) Jesus Amaya, Ap. 59, Meksiko, D.F., Meksiko	—
<i>Revuo Oriento, La</i>	(1, 2) Hongoo-Motomači, I-13, Tokio, Japanujo	1920
<i>Ruĝa Esperantisto</i>	(2) 108 Welldon Crescent, Harrow, Mdx., Anglujo	—
<i>Scienca Gazeto</i>	(1, 2) 1111 Brooke Road, Rockford, Ill., Usono	Jan., 1932
<i>Scienco</i>	(1) Kitabaratyô 1-73, Syôwaku, Nagoya, Japanujo (2) Nisinotyô, 2-88, Zyûsô, Oosaka, Japanujo	Jan., 1936
<i>Sennacieca Revuo</i>	(1, 2) 67 Avenue Gambetta, Paris 20, Francujo	1921

GAZETARO

Organo de	Aperas	Jarabono	Kosto de korespond-anoncetoj
—	monate	4 ŝil. Anglaj aŭ 1 Us. dol. (22 rk.)	po 25 Usonaj cendoj (4 rk.) por 20 vortoj
Grupo Esperantista de Paris	3-foje jare	15 Fr. fr.	senpage por korespondo kun loĝanto de Paris
Pollanda Esperanto-Delegitaro	monate	7 Sv. fr. (15 rk.)	po 2 rk. por 10 vortoj kaj adreso
Grupo Laborista Esperantista de Valencia	monate	libervola	po 4 Fr. fr. por 4 linioj
Internacia Cseh-Instituto de Esperanto	monate	2.50 Ned. guld. (16 rk.)	po 0.45 guld. (3 rk.): abonantoj, senpage, ne akceptas
Federacio de Laboristaj Esperantistoj	monate	1.25 Ned. guld. (10 rk.) (kun Laborista Esperantisto	
—	monate	20 Fr. fr.	po 0.50 Fr. fr. por ĉiu vorto
Radio-Klubo Esperantista de Francujo	kvaron-jare	(kun membreco) 15 Fr. fr. (10 rk.)	po 10 Fr. fr. (7 rk.) por 2 linioj
—	—	—	—
Japana Esperanto-Instituto	monate	4 jenoj (20 rk.)	ne akceptas
—	—	—	—
—	6-foje jare	1 Usona dolaro (10 rk.)	po 1 rk. por 3 linioj
Japana Esperantista Sciencista Asocio	4-foje jare	3 Sv. fr. (10 rk.)	nur pri fakaj temoj: po 2 rk.
Sennacieca Asocio Tutmonda	monate	40 Fr. fr. (20 rk.)	po 6 Fr. fr. por 3 linioj

LA ESPERANTISTA

Nomo	Adreso (1) Administracia (2) Redakcia	Fondita
<i>Sennaciulo</i>	(1, 2) 67 Avenue Gambetta, Paris 20, Francujo	1924
<i>Skolta Bulteno</i>	(1, 2) 65 Tuddenham Road, Ipswich, Anglujo	1931
<i>Suda Stelo, La</i>	(1, 2) Slavonski Brod., Jugo- slavujo	1932
<i>Svenska Esperanto- Tidningen</i>	(1) Eldona Societo-Esperanto, Fack 698, Stockholm 1, Svedujo (2) S-ino E. Julin, Posten I a, Stockholm, Svedujo	1906
<i>Svisa Espero</i>	(1) Svisa Esperanto-Societo, Montmollin (Neuchâtel), Svisujo (2) S-ino L. Perrenoud, Monruz, (Neuchâtel), Svisujo	?
<i>Travailleur Espéran- tiste, Le</i>	(1) 16 bis rue Bardinet, Paris 14, Francujo (2) 6 villa Sabot, Malakoff (Seine), Francujo	?
<i>Tribune Espérantiste, La</i>	(1, 2) 11 Rue Pougin, Metz- Montigny (Moselle), Francujo	1929
<i>U A B O</i>	(1, 2) Stocksund, Svedujo	1924
<i>Voĉoj el Oriento</i>	(1, 2) P.O. Box 1732, Hongkong	Marto, 1938
<i>Vojo, La. (por infanoj)</i>	(1) Postbus 4050, Amsterdam-O, Nederlando (2) Marathonweg 15-II, Amster- dam-Z, Nederlando	1934
<i>Worker Esperantist, The</i>	(1, 2) 15a Shudehill, Manchester 4, Anglujo	1935

GAZETARO

Organo de	Aperas	Jarabono	Kosto de korespond- anoncetoj
Sennacieca Asocio Tutmonda	monate	(kun membreco) 40 Fr. fr. (20 rk.)	po 6 Fr. fr. por 3 linioj
Skolta Esperantista Ligo	dumonate	1 ŝil. Angla (5 rk.)	al abonantoj senpage
Jugoslavia Esper- anto-Ligo	monate	36 Din. (9 rk.) aŭ 3 ŝil. Anglaj	po 20 din.
Sveda Esperanto- Federacio	monate	3 Sved. kr. (10 rk.)	po 5 rk.
Svisa Esperanto- Societo	4-foje jare	1.50 Sv. fr. (5 rk.)	ne akceptas
Fédération Espér- antiste du Travail	dumonate	6 Fr. fr. (3 rk.)	po 1 rk.
—	kvaron- jare	15 Fr. fr.	ne akceptas
Universala Asocio de Blindul- Organizajoj	4-foje jare	1 Sved. kr. (4 rk.)	ne akceptas
—	monate	0.66 Usona dol. por 10 n-roj (8 rk.)	po 0.33 Usona dol. por 4 linioj
Federacio de Labor- istaj Esperantis- toj en la regiono de la nederlando lingvo	monate	0.65 Ned. guld. (5 rk.)	senpage
Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio	kvaron- jare	10 pencoj Anglaj (4 rk.)	po 6 pencoj por 1 linio, mini- mume 2 linioj

LERNEJOJ EN KIUJ ONI

La sekvanta tabelo estas kompilita el informo sendita al ni de diversaj fidindaj fontoj. Ni estas tute certaj, ke en multaj aliaj lernejoj oni instruas Esperanton, kaj por havigi pli kompletan liston ni kredeble sendos demandon al ĉiu membro dum la venonta aŭtuno.

